


Beletra Edeno

neregula beletra bit-revuo

n-ro 4 (majo 2024)



Ĉiuj kontribuoj estas bonvenaj.

Redaktis Vejdo (vejdo@163.com)

Kontribuis Hong Jia, Luiza Carol, Pipi, Laimundas Abromas, Yin Jiaxin, Lilia Nikolova, Liu Hongyuan, Herbeto, Yang Fang, Roberto Perez-Franco, Dorothea kaj Hans-Georg Kaiser, Guozhu, Minosun, Vejdo, Tiberio Madonna, Mikaelo Bronŝtejn, Rita Mkrťĉjan, Juvelo, Lily, Yi Qiao, Rovere Emanuele, Yanke, Wđington Rocha, Petro Palivoda, Bardhyl Selimi, Gu Zi, Rafael Henrique Zerbetto, Zhang Yue
AI-ilustris John Huang

Enhavo

Originala prozo

Hong Jia: La testamento de la avo.....	3
Luiz Carol: Florhomo.....	7
Pipi: Kia la semo, tia la rikolto.....	12
Laimundas Abromas: Kiel oni lernu lingvojn.....	15
Yin Jiabin: Skatolo da tefolioj.....	18
Lilia Nikolova: Du fabloj.....	19

Tradukita prozo

Lao She: Vizio (elĉinigiis Liu Hongyuan).....	21
Herbeto: (mikronovelo) Post akcidento.....	30
Yi Shu: Morto de la amo (elĉinigiis Yang Fang).....	31
Roberto Perez-Franco: Songô, Res una sumus, Eksuzoj, Provo kaj eraro, Amikoj (tradukis Norberto Dlaz Guevara).....	42
Fratoj Grimm: Maria-infano, Fabelo pri iu, kiu migradis por lerni timi (elgermanigiis: Dorothea kaj Hans-Georg Kaiser).....	47
Shen Jiji: La magia kapkuseno (elĉinigiis Guozhu).....	58
Liang Xiaosheng: Perdita pampelmuso (elĉinigiis Minosun).....	62
Herbeto: (mikronovelo) Ĉu trompisto?.....	64
Jiang Zilong: Serĉi “ĉapon” (elĉinigiis Minosun).....	65
Herbeto: (mikronovelo) Forgesemo.....	66
Chiung Yao: En profunda korto (4) (elĉinigiis Vejdo).....	67

Originala poezio

Tiberio Madonna: Sen vi.....	75
Mikaelo Bronŝtejn: Inundo reva, Rememoraĵo.....	77
Rita Mkrĉĵan: Poeto, Memoro, Virino, Mi amas fotojn.....	80
Juvelo: Trans tempo-diferencon.....	82
Hans-Georg Kaiser: Printempo estas juna vir’.....	83

Lily: Surluniĝo, Aprilo.....	85
Yi Qiao: La printempa belo, Revelacio de printempo, Printempa brizo.....	88
Luiza Carol: Sopiro.....	90
Vejdo: Sorĉa povo kontraŭ pluvo.....	93
Tradukita poezio	
Rovere Emanuele: Kvin kanttekstoj.....	97
Hai Zi: Ok poemoj (elĉinigrigis Yanke).....	100
Gu Cheng: La generacio, Malproksime kaj proksime, La strateto, Antaŭ la pordo (elĉinigrigis Minosun).....	106
Vinicius de Moraes: Preterpasantino (tradukis W ington Rocha).....	108
Qu Yuan: Demandado al la ĉielo (elĉinigrigis Vejdo).....	110
Ljubov Serduniĉ: Ni brodas historion de l' nacio (elukrainigrigis Petro Palivoda).....	123
Valbona R. Hadri: La elmigrinto, Iam, La revanto, Senvorte, Ĉu vi diras (elalbanigrigis Bardhyl Selimi).....	125
Tradukita teatro	
Ding Xilin: Post drinkado (elĉinigrigis Gu Zi).....	128
Eseo kaj artikolo	
Rafael Henrique Zerbetto: Stacioj de Amo: Pasia bitalbumo de ĴeLe...	135
Zhang Yue: Esperanto—Utopio en mia koro.....	137



John Huang, prezidanto de internacia Komerca kaj Ekonomia Federacio (IKEF) nordameriko, ĉefredaktoro de la revuo "La Merkato", estas ĉina-kanada esperantisto kaj komercisto. Li estas la oficiala fotisto por du sinsekvaj Universalaj Kongresoj en 2022 kaj 2023. Li esperantistiĝis jam en la 1980-aj jaroj kaj aktive partoprenis multajn Esperanto-agadojn en la sekvaj jardekoj. Li faris la AI bildojn de ĉi tiu numero de Beletra Edeno.

Foto sur la kovrilo: Grace Schattschneider, kanada fotistino kaj antropologino fotita de John Huang (aperigita sub ŝia konsento)

Hong Jia (Ĉinio)

La testamento de la avo

Mia avo jam forpasis dek jarojn, sed mi memoras pri lia testamento de tempo al tempo. Mi ne volas diri, ke lia testamento estas bele skribita, sed ĝi plenas je justeco kaj bonkoreco.

Antaŭ pli ol dek jaroj miaj geavoj vivis harmonie fore de siaj tri filoj. Emeriĝinte, ili loĝis en aparta domo kun pli-malpli granda kaj kvadrata korto. Laŭ la kortmuro prosperis diversspecaj floroj, kiujn mia avo ŝatis planti. Lia nura ŝatokupo estis priflegi herbon kaj florojn. Antaŭe li laboris kiel ĝardenisto en la urbeto. Kiam mi vizitis lin, li la tutan tempon klarigis al mi, kiel kultivi diversajn florojn. Kvankam mi ne tiom interesiĝis pri floroj, mi aŭskultis atenteme kun gusto. Mi ofte restis kelkajn tagojn ĉe la geavoj, kiam mi faris viziton al ili. La avino estis afabla kaj babilema virino. Ŝi ŝatis demandis al mi pri la hejmaj aferoj de miaj patro kaj aliaj du onkloj. Kompreneble mi senhezite verŝis al ŝi ĉion, kion mi sciis. La vivo ĉe miaj geavoj estis plezura kaj malfacile forgesebla. Sed baldaŭ ilia idilia kaj kvietita vivo venis al la fino. Mia avino suferis de intesta kancero kaj enhospitaliĝis. La subita novaĵo tumultigis la trankvilan vivon de miaj patro kaj du onkloj. La avo ne havis kapablon flegi la avinon en la hospitalo, kiu situis en la centro de la urbeto kelkajn liojn malproksima al la loĝejo de la avo. Fakte en la grandaĝo de iom pli ol okdek jaroj, se la avo povis zorgi pri si mem, jam sufiĉis. Kontraŭ tia kriza momento tri familioj de miaj patro kaj du onkloj kunvenis en nia hejmo. Du problemoj estis diskutitaj en la kunveno: kiel flegi la avinon kaj kion fari pri la maljuna avo. Pri la unua problemo oni interkonsentis, ke necesas dungi helpanton por flegi la avinon, ĉar la tri filoj okupiĝas pri sia propra laboro por vivteni la familion. Pri la dua problemo mia pliaĝa onklo proponis, ke la avo estu konfidita al maljunulejo, tiel ke li povos esti helpata de flegantinoj en la ĉiutaga vivo. Sed en al telefona interparolo kun la avo li rifuzis la proponon. Li diris, ke li preferas vivi sola en la domo ol iri al la mallibera maljunulejo. Kion fari? Fine mia patro konkludis, ke se la avo ne volantas iri al la maljunulejo, li povos loĝi kun siaj filoj respektive dum difinita tempdaŭro. Tamen miaj pliaĝa kaj plijuna onkloj ĉirkaŭfraze rifuzis. Unu plendis, ke al li mankas sufiĉa spaco en la apartamento por loki la avon, kaj la alia grumblis, ke li estas multokupita kaj ofte deĵoras tra la nokto. Evidente la respondeco prizorgi la avon falis sur la ŝultrojn de mia patro. Ĉar la avo ne volis provizore forlasi sian loĝejo, tiu ĉi problemo ne estis mencita plu inter la tri fratoj.

La malsano de la avino serioziĝis tagon post tagon. La kuracisto jam avertis al la

familianoj, ke la avino ne havas multan tempon por vivi. Post tri monatoj mia avino forlasis la mondon. La avo, kvankam en grandaĝo, preparis manĝon, purigis la ĉambron kaj faris aliajn hejmajn aferojn. Li solece vivis kaj la vivo jam fariĝis pli kaj pli malfacila por li. Mia patro decidis persvadi la avon transloĝiĝi en mian hejmon. Konvinkite la avo forvendis sian domon kaj loĝis en mia hejmo. Lia nova vivo en mia familio ne ĝojigis lin, ĉar ni ne povis provizi al li parcelon por kultivi florojn kaj li faris nenion. Tuttage, krom tio, ke li spektis la matenajn novaĵojn sur la televidilo, li portis tristan mienon kun mallevita kapo kaj ofte enfermis sin en sia ĉambro. Mi kaj miaj gepatroj de tempo al tempo babilis pri lia ĉagreniĝo. Iufoje mi demandis al li: “Avĉjo, kial vi ne iras eksteren por vin distri?”

“Ĉu tio helpas, mia knabo?” li respondis. “Ĉio jam ŝanĝiĝis, de kiam mi loĝis ĉi tie. Dumtage vi lernas en lernejo kaj viaj gepatroj laboras en sia respektiva loko. Mi min sentas tre soleca. Antaŭe, kiam via avinjo vivis, kvankam babilema, ŝi restis mia bona kunulino. Kelkfoje kun ŝiaj babilajoj sonantaj en miaj oreloj mi male sentis komfortecon. Cetere mi havis miajn florojn en la korto, kaj kvankam ili ne parolis al mi, mi flegis ilin kiel proprajn idojn.” Finfine li elverŝis kion li pensis en la koro.

Mi turnis min al la patro: “Mia avo vivas amaran vivon en nia hejmo. Eble vi ne scias, kion li bezonas en la vivo. Mankas al li nek manĝaĵoj nek vestoj. Li bezonas nur akompanadon de familianoj. Ĉu ni povus moderigi lian ĉagreniĝon iamaniere?”

Post konsiliĝo kun siaj du fratoj mia patro decidis peti po duontagan forpermeson de ĉiu semajno el la laborejo por akompani la avon. Tamen liaj du fratoj malvolontis fari regulajn vizitojn al la avo, preteksante, ke ili ne povas deŝiri sin de la profitdona negoco en la bazono. Kaj ili eĉ sugestis, ke ni dungu serviston per la pensio de la avo. Sed la avo ne aprobis, dirante, ke la filoj devas montri sian sindonemon al la avo per siaj propraj monrimedoj. El tio rezultis stranga suspekto ĉe la du fratoj, kiuj konsideris, ke la avo donas sian pension al nia familio por pli bona vivo. Mia patro ne argumentis kun ili. Vole-ne-vole mia patro nur faris plejebilon por akompani la avon.

Fakte la avo estis tre ŝparema. Por honeste dire li ne donis eĉ unu groŝon al mia patro kaj li vere vivis je la kosto de nia familio. Mia patro estis vere sindonema filo kaj li ofte diris al mi, ke li havas devon vivteni la avon sen elvringi monon el la maljunulo kaj tiu, krom la kosto de manĝaĵoj, preskaŭ faras elspezojn je nia kosto. Sed de tiam miaj du onkloj, skeptikis, ke nia familio ŝajne vivas de la pensio de la avo. Kutime ili ne vizitis nian hejmon por vidi la avon. Nur kiam la avo falis en malsanon, mia patro telefonis al ili kaj ili venis al mia hejmo por vidi la avon. En ordinaraj tagoj ili eĉ ne donis telefonvokon por saluti la avon. Tagon post tago ili fariĝis pli kaj pli flegmaj al sia propra patro.

Tiun jaron, dum la ferioj de la Printempa Festo la avo alvoki, laŭ ĉina tradicio,

rekuniĝon de ĉiuj familianoj. Li ordonis al mia patrino prepari riĉan manĝon por la antaŭvespero de la Festo. La du onkloj venis kune kun sia edzino. La avo tre ĝojis, vidante, ke liaj tri filoj povas kunsidi ĉe la festeno. La unua li proponis toston por la rekuniĝo de la familio, dirante, “Hodiaŭ mi tre ĝojas, ke ni ĉiuj familianoj povas rekuniĝi. Mi volas kapti la ŝancon esprimi dankon al mia plej aĝa filo pro lia malavara helpo al mi en la vivo. Ĉi tie mi vivas senĝene, zorgante nek pri manĝado nek pri vestado. Mi domaĝas mian pension. Mi donis neniun groŝon al la plej aĝa filo, ĉar mi konsideras, ke se mi suferos de kriza malsano, mi elspezos multon en kuracado. Tiam mi ne volas, ke vi tri filoj pagu por mia malsano. Mi ne volas, ke mia malsano influu vian normalan vivon.” Post tiuj vortoj li englutis tason da alkoholaĵo kaj ĉiuj ĉeestantoj enverŝis trinkaĵon en la gorgon.

Dum la paŭzeto aŭdiĝis flustroj. La pliaĝa onklo murmuris al sia frateto, “Ĉu vi kredas, ke la patro ne donis monon al la plejaĝa frato? Ties familia vivo ŝajne multe pliboniĝas. Mi aŭdis, ke lastatempe la plej aĝa frato aĉetis aŭton.”

“Ĉu vere?” La juna frato ekhavis dubon en la koro. “Ĉu vi implicas, ke la patro donis sufiĉan monon al li aĉeti aŭton? Ili ne povus aĉeti aŭton per siaj malgrasaj salajroj. Ŝajnas, ke nia patro traktas nin indifere. Ankaŭ ni ambaŭ estas el lia sango kaj karno. Neeble. Ni devas akiri nian porcion da mono el la patro.” Li stariĝis kaj, kun taso en la mano, rekte iris al la plej aĝa frato. “Gratulon! Mi aŭdis, ke vi aĉetis novan aŭton, tiel ke vi povas kuri ien, kien ajn vi volas. Nun ni tostu je via nova aŭto!”

Mia patro ekstuporis. “Dankon!” Li diris, “Sed mi aĉetis aŭton nur por oportunigi la patron. Li estas malsanema lastatempe kaj liaj piedoj ne estas tiel facilmovaj kiel antaŭe. Mi jam plufoje veturigis lin al la hospitalo. Mi ĝin aĉetis amortize, tiel ke mi povas pagi la koston poparte ĉiumonate.”

La dua onklo kontraŭdiris, “Ĉu la patro pagis iom por la aŭto aŭ subvenciis iom al via aŭto?”

Tiam la avo subite interrompis, “Ne, absolute ne! Mi ŝparas monon por mia eventuala kriza malsano. Mi absolute ne tuŝas ĝin por aĉeti luksaĵojn.” Li montris sin kolera. Mia patro penis pacigi la situacion. Fakte la festeno finiĝis en malĝojo.

Post tri monatoj la kriza momento vere venis. Mia avo pro mispaŝo stumbe falis teren kaj perdis konscion. Oni hasteme alvokis ambulancan kaj sendis lin al la hospitalo. Post zorgema ekzamenado la kuracisto diagnozis, ke la avo trafis apopleksio. Pro la severa stato de la malsano la avo devis esti najligita al la lito almenaŭ unu monaton. Post elhospitaliĝo li jam malhavis promenpovon kaj fariĝis rajdanto de radseĝo. Miaj gepatroj devis iri labori kaj mi mem vizitis la lernejon. Kaj la avo restis hejme sola kun malbonhumoro. Kion fari? Post la dorso de la avo liaj tri filoj kunvenis kaj decidis, ke pro respektiva okupiteco ili dungos servistinon

por zorgi pri lia farto. Sed tio kompreneble rabos multe da mono el ilia salajro. Aŭdinte tion, la avo oferis sian tutan monatan pension. Jes, la problemo de mono solviĝis, sed tiu de lia animstato ne. Li dronis en soleco kaj ĉagreniĝo tuttage, senhelpa kaj senkonsola. Li trenadis la vivon tagon post tago en mizero. Post nelonge li fine eligis sian lastan spiron.

Post funebraĵoj la tri filoj pene serĉis lian banklibreton, sed vane. Tiam venis advokato, kiu oficis proksime de nia loĝejo. Li deklaris antaŭ la vizaĝo de la tri filoj, “Via patro jam konfidis al mi sian testamenton antaŭ du jaroj. Kaj samtempe li donis al mi sian banklibreton kun sumo de miliono da juanoj. Mi legu la rilatan parton pri la dividado de mono. ‘La sumo inkludas la monon de domvendo kaj mian ŝparaĵon. Post mia morto, mi dividas la monon en kvar partojn. La unua parto de cent mil juanoj iras al mia plej aĝa frato por lia zorgado pri mi kaj kiel kompenso al la kosto de nutraĵoj kaj loĝado. La aliaj tri partoj estas en egala sumo, t.e. tri cent mil juanoj. Ĉiu el tri filoj ricevu unu parton. Kvankam ili faris malsamajn kontribuojn al nia familio, ili ĉiuj estas miaj sindonemaj idoj. Forgesu la pasintajn skeptikemon kaj malpacetojn inter vi.’” Post deklaro de la testamento de mia avo la advokato transdonis la testamenton kaj banklibreton al mia patro, kaj foriris.



La avo ignoris la skeptikemon kaj malpacetojn inter siaj filoj kaj restigis neniajn ostojn de disputo. Kiel prudente la avo agis!

Luiza Carol (Israelo)



La florhomo

Mi ekvidis ĝin de malproksime. Tiun serenan someran dimanĉon, mi estis grimpinta en la montaro ekde frumatene kaj ĵus haltis por ripozi. Mi estis freŝa abituriento kaj alvenis al tiu fora lando, por pasigi kun mia familio agrablajn feriojn en la pura aero de la montaro. Tiun tagon mi decidis grimpi tute sola en la silento de la arbara pado, por mediti trankvile, ĉu mi aliĝu al la fakultato de biologio aŭ al tiu de astrofiziko. Mi rigardis suben al la ŝoseo kiu serpentumis el la larĝa

aŭtorino, Luiza Carol

valo, kaj ĝuste tiam mi ekvidis... ĝin! Ĝi similis sorantan sunfloron kaj ĝi estis nekredeble bela, en la tagmeza sunlumo. Mi supozis, ke ĝi estas kajto aŭ eble soranta fotilo. Ĝi estis supreniranta malrapide el la valo kaj moviĝanta tra la aero samkiel granda orkolora meduzo moviĝus en akvo. Ĝi proksimiĝis kaj turniĝis super mia kapo kelkan tempon. Mi jam povis vidi, ke ĝi estis nek kajto nek fotilo. Sed kio ĝi estis?

Kiam ĝi proksimiĝis je distanco de nur kelkaj paŝoj, de sub la flor-aspekta aĵo videblis tigo kun verdaj folioj kiel brakoj. Ĝi malfaldis delikatajn radikojn, per kiuj ĝi alkroĉiĝis al apuda stumpo. Mia konsterno aliformiĝis en supozon, ke mi ekdormis kaj estas songanta. Trifoje mi provis fermi la okulojn kaj denove malfermi ilin, por kontroli ĉu la vizio malaperus. Ĝi ne malaperis. Tio kion mi havis nun antaŭ miaj okuloj povus ŝajni tute normala sunfloro. Tamen ĝi radiis ion strangan kaj samtempe allogan, ion kion mi ne kapablas nun priskribi.

“Saluton!” ĝi diris malrapide, per kantanta virina voĉo.

“Saluton!” mi respondis ridante. “Ĉu vi estas parolanta roboto?”

“Ne. Mi estas florhomo de alia planedo.”

Mi jam ne kuraĝis moviĝi, timante ke mi vekigis kaj tiam la bela sonĝo forvaporigis. En mian memoron revenis malnovaj fabeloj, kaj mi ekpensis ke eble mi renkontas sorĉitan belulinon, kiun mi heroece malsorcōs... Mi demandis:

“Ĉu vi fakte estas homo?”

“Jes kaj ne” ĝi respondis. “Se vi nomas ‘homo’ estaĵon penskapablan kaj emocikapablan, laŭ tia difino mi ja estas homo. Sed mi havas korpon de planto, tial

mi diris ke mi estas ‘florhomo’.”

Mi tute konfuziĝis. Sed ĝi aldonis, ke ankaŭ por ĝi estis granda ŝoko renkonti sur nia planedo parolantajn bestojn. Tamen ĝi jam alkutimiĝis pri tio.

Mi demandis, ĉu mi estas dormanta dum ni parolas.

“Jes kaj ne” ĝi diris. “Vi troviĝas mezvoje inter dormo kaj maldormo.”

Laŭ ĝiaj klarigoj mi komprenis, ke ĝi kapablas vidi la bioenergiojn kiujn la estaĵoj radias. Tio signifas ke rigardante min, ĝi vidis la tremantajn nuancojn de la energioj agantaj en miaj menso kaj animo. Mi maltrankvile kaj iom timeme demandis min, ĉu ĝi kapablas influi min pere de hipnozo.

“Ne maltrankviliĝu, mi ne estas danĝera.” ĝi diris, kvazaŭ aŭdante miajn pensojn.

Mi demandis:

“Ĉu vi aŭdas miajn pensojn?”

“Jes kaj ne...”

Mi jam malpacienis: “Ĉu vi ne povas respondi alimaniere ol ‘jes kaj ne’?”

Ĝi ridis por la unua fojo ekde kiam ĝi alvenis. Ĝia rido estis homeca, iom infaneca, bonhumora, trankvila, en kontrasto kun la stranga malrapideco per kiu ĝi prononcadis vortojn. Ĝi diris ke, se oni klopodas esprimi la veron, estas ofte malfacile respondi unuvorte. Kaj mi tutkore konsentas pri tio nun, kiam mi mem strebas priskribi tiun nekutiman eventon en mia vivo, apenaŭ trovante taŭgajn vortojn.

Ĝi aldonis:

“Jes, mi kapablas aŭdi viajn pensojn, sed nur kiam vi esprimas ilin pere de via voĉo. Alikaze mi ne aŭdas ilin. Tial mi respondis kaj ‘jes’ kaj ‘ne’ al via demando. Tamen laŭ la radiado de via bioenergio, mi vidas la kolorojn de viaj emocioj kaj konscias, kiam io maltrankviligas aŭ ĝenas vin.”

Laŭ ĝiaj klarigoj evidentiĝis, ke la vorto “mensogo” estas tre stranga por ĝi, ĉar ĝi ne kapablis kompreni, kial entute la “besthomoj” uzas la penskapablon por kaŝi siajn verajn sentojn kaj pensojn. Ŝajnas ke dum jarmiloj, la tuta historio de la florhomoj baziĝis sur senĉesaj klopodoj evoluigi siajn esprimkapablojn, por kundividi siajn verajn sentojn kaj pensojn. Evidentiĝis, ke tiu tasko estas ju pli malfacila, des pli ilia spirita vivo fariĝas pli kaj pli prilaborita. Sed ajna klopodo kundividi falsajn sentojn kaj pensojn ŝajnis al ili absurda.

La florhomo nomis sin Mirabela, ĉar tiun nomon ĝi ricevis sur la tero. Maljuna sinjorino, ĉe kiu ĝi loĝis dum ĉirkaŭ du jaroj, nomis ĝin tiel, kaj al ĝi plaĉis tiu nomo. Ni babilis longtempe. Ĝi rakontis interesajn aferojn pri si mem kaj sia fora planedo. Ĝi diris, ke tie ekzistas multaj aliaj plantoj kaj tre multaj bestoj, sed nur la sunfloroj estas penskapablaj. Oni povas kalkuli kelkdekda da specioj de sunfloroj, kaj ĉiu specio havas sian lingvon kaj siajn tradiciojn. Komunan lingvon ili ne havas kaj ne

bezonas. Ili kapablas iel alproprigi diversajn lingvojn, pere de bioenergio. Kiam Mirabela estis ĉirkaŭirinta min antaŭ ol alteriĝi, ĝi iel trovis en mia cerbo la tutan vortprovizon de la lingvo en kiu mi estis pensanta. Tiam ĝia menso kopiis kaj iel komprenis ĝin. Plurajn detalojn pri tio mi ne scias.

Mirabela estis la lasta el aro da similaj estaĵoj, kiuj estis alvenintaj al nia planedo antaŭ pli ol du jaroj. Ili perdis la kontakton kun sia planedo, kaŭze de la elektra radiado ĉirkaŭanta la teron. Evidentiĝis, ke la florhomoj estas tre ĝenataj de elektronikaj aparatoj, kiuj ne nur malhelpas al ilia kapablo komuniki inter si, sed ankaŭ ege malsanigas ilin kaj endanĝerigas ilian vivon. Ajna aparato ĉu mekanika ĉu elektronika timigas kaj konfuzas ilin, kaj ili malkapablas protekti sin kontraŭ la rapideco de aŭtoj, busoj, trajnoj ktp. Entute surteriĝis 22 florhomoj, sed post 2 semajnoj nur Mirabela restis vivanta. La plejparton el ili mortigis rapidaj veturiloj, kemiaĵoj, televid-antenoj, telefon-antenoj, alt-frekvencaj polusoj ktp. Tri el ili sukcesis kontakti simpatian vilaĝanon, sed la konsekvencoj estis katastrofaj. Tiu homo ekteruriĝis, supozis ke temas pri danĝeraj alilandaj aparatoj por spionado kaj tuj anoncis la policon. Rapide oni kaptis ilin pere de malsimplaj elektronikaj aparatoj, oni radiografiis ilin kaj oni konkludis... ke ili estas simplaj sunfloroj. Kompreneble, post kiam la teruraj aparatoj mortigis ilin, ili fariĝis simplaj velkintaj floroj. Verŝajne, la vilaĝanon oni konsideris frenezulo...

Post kiam ĝi perdis ĉiujn siajn kunulojn, Mirabela ploris longtempe kaj decidis eviti ajnan kontakton kun la homoj de la tero, kiujn ĝi jam timegis. Dum semajnoj ĝi iradis malgaje kaj solece en la montaro, kiel eble pli malproksime de homaj domoj kaj elektraj antenoj. Foje, dum forta pluvo kun hajlo, ĝi ŝirmis sin en izolita malplena fojno-ŝirmejo. Tie ĝi sidiĝis sola, pensante malgaje pri la strangaj homoj de la tero, kiuj ŝajnis al ĝi malicaj kaj absurdaj estaĵoj... Subite ĝi sentis sin tuŝita de ĝuste tia estaĵo, kiu elprenis ĝin en siajn manojn. Mirabela frostiĝis kaj fermis la okulojn, atendante la morton. Sed la estaĵo tenis ĝin delikate kaj alparolis ĝin tenere...

Tiel komenciĝis la ĉirkaŭ du-jara rilato inter Mirabela kaj s-ino Orlanda, la bonkora maljunulino kiu donis nomon al ĝi kaj gastigis ĝin unue en sia ĝardeno kaj poste ankaŭ en sia domo.

S-ino Orlanda estis ege maljuna emerita instruistino de bazlernejo. Ŝi ekamis la mirandan floron ekde la unua momento kiam ŝi vidis ĝin. Ŝi baldaŭ konsideris la instruadon al Mirabela kiel la pinton de sia kariero kaj eĉ la plej gravan sencon de sia tuta vivo! Ŝi uzis ĝisfunde sian dumvivan sperton por kuraĝigi kaj helpi la plej eksterordinaran lernanton, kiun ajna terana instruisto havis iam ajn...

Mirabela estis diligenta kaj scivolema. La florhomoj ne uzas skribadon kaj legadon sur sia planedo, sed ilia memoro multe transpasas la normalan memoron de la teranaj homoj. Mirabela kapablis aŭskulti sian instruistinon dum multaj horoj kaj parkerigi

ĉion kion ŝi diris. Ĝi kapablis akumuli fulmrapide grandan kvanton da informoj, kvazaŭ ĝia menso estus komputilo. Sed ĝi ankaŭ komprenis kaj interpretis tre bone la informojn. S-ino Orlanda instruis ĝin legi flue dum nur unu horo. Poste, Mirabela legis unu post la alia ĉiujn librojn, kiuj troviĝis en la librobretaro de ĝia gastiganto. Ĝi elprenis po unu libron per siaj fortaj radikoj, metis ĝin sur la tablon kaj trafoliumis ĝin pere de la folioj. Ĝiaj okuloj rapide fotokopiis la paĝojn, kaj ĝia memoro konservis ĉion, kio ŝajnis al ĝi interesa kaj eventuale utila.

La maljunulino ofte plendis pri diversaj doloroj dum ilia kunloĝado. Mirabela vidis kun bedaŭro la kolorojn de tiuj doloroj, komprenis la bioenergiajn malekvilibrojn kaŭzintajn ilin, kaj iom post iom lernis liberigi sian gastiganton de suferoj. Kiel ĝi faris tiun terapion, ĝi ne kapablis klarigi, sed s-ino Orlanda sentis sin pli kaj pli bone en la kompanio de la florhomo. Ĉiuvespere, la duopo kantis kune ĉu teranajn ĉu aliplanedanajn kantojn, kaj iliaj voĉoj intermiksiĝis gaje.

Ili interkonsentis ke, almenaŭ portempe, la ĉeesto de Mirabela sur la tero estu sekreto, por ke la troa scivolo de aliuloj ne ĝenu ĝin. La du filinoj de s-ino Orlanda kutimis viziti ŝin ĉiutage, por alporti manĝaĵojn kaj helpi ŝin pri domlaboroj. Ili ĝojis pri la subita gajeco de sia patrino. Al ili ŝajnis, ke s-ino Orlanda lastatempe parolas kaj kantas sola...

Mirabela pasigis multan tempon en la trankvila ĝardeno de s-ino Orlanda, trinkante lumon kaj babilante kun ŝi pri la similecoj kaj malsimilecoj inter la du planedoj. Al miaj demandoj, Mirabela respondis, ke la florhomoj nutras sin kutime nur per aero, akvo kaj lumo. La radikojn ili uzas precipe por alkroĉiĝi al diversaj aĵoj kiam ili ripozas. Sed ili povas ankaŭ ankrigi en la grundo kiam la vento blovas. La grundajn sukojn ili bezonas trinki nur kiam ili estas semoj kuŝantaj en la grundo. Tiam ili estas beboj, kiuj ankoraŭ ne bezonas lumon, tamen akvon kaj iom da varmeta aero ili ja bezonas. Kiam ili fariĝas etaj infanoj, ili jam estas ŝoso, kiuj eklernas trinki pli kaj pli da lumo, ĝis ili kreskas kaj kapablas sendependiĝi de la grundo. Mirabela jam atingis la aĝon kiam la florhomoj havas semojn en sia planedo, sed sur la tero ĝia korpo ne donis semojn, bedaŭrinde.

Iom post iom, Mirabela kreis por si novan veston el bioenergiaj radioj, pli bone adaptitan al la kondiĉoj de la tero. Helpe de s-ino Orlanda, ĝi iom post iom alkutimiĝis eniri ŝian domon kaj toleri la elektran lumon, la telefonon, la komputilon, la polvosuĉilon... Tamen tiu vesto tute ne protektis ĝin kontraŭ poluataj aero kaj akvo, ne helpis ĝin reagi ĝustatempe al la rapideco de la veturiloj... Ĉirkaŭ la izolita dometo de la junulino, kiu troviĝis rande de eta montara vilaĝo, la aero estis ege pura, la matena roso kaj la pluvogutoj ne entenis venenojn. Sed Mirabela devis ankoraŭ multe labori por realigi sian idealan veston, kiu permesu al ĝi moviĝi libere ie ajn sur la tero.

La tempo pasis, kaj s-ino Orlanda sentis sin pli kaj pli laca. Ŝi ekkomprenis, ke ŝia vivo proksimiĝas al la fino. Mirabela konsciis pri tio. Pli kaj pli ofte ili preĝis kune, en silento, fermante la okulojn. Ĉiu el ili preĝis laŭ sia propra kutimo, en sia propra lingvo. Estis mirinde kiom similaj estis iliaj kredoj kaj iliaj preĝoj, ĉar por ili ambaŭ la esenco de la vivo estis amo kaj sincereco.

Ili kune parolis pri la estonteco. S-ino Orlanda opiniis, ke nenio okazas hazarde en la mondo. Tial ŝi tutkore esperis, ke Mirabela sukcesos adaptiĝi tutece al la kondiĉoj de la tero, kaj ĝia korpo fin-fine donos semojn el kiuj novaj florphomoj aperos. Ili ambaŭ revis pri la pliboniĝo de la tuta homa socio danke al la influo de la nemensogemaj kaj amemaj florphomoj, ili revis pri la disvastiĝo de nova terapio kontraŭ doloroj, ili revis pri la starigo de interplanedaj rilatoj riĉigontaj kaj la materiajn kaj la spiritaajn vivojn de ambaŭ planedoj...

Unu nokton, s-ino Orlanda transpasis en la transmondon serena kaj ridetanta, sen ajna sufero. Mirabela kisis ŝin ame kaj foriris.

Nun ĝi troviĝis apud mi, petante helpon por adaptiĝi kiel eble pli bone al la kondiĉoj de nia planedo.

Mi hezitis.

Mi ektimis.

Kio okazus se evidentiĝus, ke tiu bela estaĵo estas fakte ruza kaj danĝera? Eble ĝi volas uzi mian helpon, por venigi danĝerajn estaĵojn sur la teron...

“Se vi ne fidas min, mi foriras. Adiaŭ” ĝi diris per malgaja voĉo kaj komencis malsupreniri al la valo.

Ĝia malgajeco eniris mian koron dolorige.

“Atendu!” mi kriis kaj subite leviĝis. “Atendu ke mi pripensu la aferon...”

Ĝi haltis sur la serpentumanta ŝoseo. Ĝi ŝanceliĝis.

“Ĉu vi tutkore deziras helpi min?” ĝi demandis.

“Mi ankoraŭ ne scias... Jes kaj.... NEEEEEEEEEEEEEEEE!”

Peza kamiono subite surveturis ĝin sur la ŝoseo kaj ellasis densan fumon malantaŭe.

Mi gapis senvorte malsupren. Ĉu mi ĵus vekiĝis el sonĝo?



Pipi (Ĉinio)



aŭtoro, Pipi

Kia la semo, tia

la rikolto

Kiam mi estis eta infano, mia avino rakontis al mi unu historion. Jen estas la historio. Antaŭ longe en tiu kaj tiu malgranda vilaĝo vivis paro da malriĉaj

maljunaj geedzoj, tre bonkoraj kaj helpemaj. Ili loĝis en kaduka dometo. Kiam la printempo venis, hirundoj, trans montojn kaj riverojn, alflugis de lontanaj varmaj landoj. Paro da hirundoj, senlace transportante pecetojn da tero en sia beko, konstruis neston sub la tegmento de la dometo de la maljunaj geedzoj. Baldaŭ poste, la nesto estis bone farita. Ili nestis en ĝi, demetis ovojn kaj kovis. Vidante, ke la paro da hirundoj gastis sub la tegmento, la maljunaj geedzoj sentis grandan feliĉon. Post dekkelke da tagoj hirundidoj unu tuj post la alia elŝeliĝis. La hirundo-gepatroj tuttage sin okupis kaptante insektojn kaj ilin donante manĝi al la idoj. Kun la tempo la idoj plenkreskis. Kiam ili havis plenan plumaron, ili devis lerni flugi. Komencis provan flugadon la unua, la dua, poste la tria ... kaj fine la kvina. Sed bum! oni ne scias kial tiu lasta falis teren kaj rompis al si unu kruron. Tiu baraktis kun ŝiranta krio sur la tero. Je tio, la maljunaj geedzoj alhastis, levis ĝin kaj enportis domon.

Ili gepatris al ĝi samkiel al sia propra infano. La edzo kaptis insektojn kaj la edzino manĝigis ĝin. Pasis tagoj post tagoj. La vundito resaniĝis sub la zorgado kaj flegado de la maljunaj geedzoj. La aŭtuno alvenis. La vetero friskiĝis. Ĉiuj hirundoj ekflugis al la varmaj landoj krom la vundito, kiu, kripla je unu kruro, ne kuraĝis iri kaj flugi. Unu tagon, la lama vundito subite ekbatis la flugilojn. Kaj tuj poste ĝi ĵetis sin eksteren, pafiĝis nesciate kien. Tio ĝojigis la maljunajn geedzojn. Sed ekster ilia atendo, tiu glisis returne, ĉirkaŭflugis la geedzojn kelkfoje, kvazaŭ esprimante dankon al ili, poste velis suden kaj malaperis en la malproksimon. "Bonan vojaĝon al vi, kara hirundo! Ĝis revido!" la geedzoj ĝojplene vokis kaj mansvingis al la direkto al la hirundo. Post la aŭtuno venis la vintro. Kaj poste la frosta vintro finfine cedis al la varma printempo. Hirundoj reflugis norden. Iun frumatenon, ĉe la aŭroro, la geedzoj aŭdis, ke io sonas ekster la fenestro. Estis unu hirundo, kiu beke frapas sur la fenestro. La geedzoj senprokraste elkuris el la domo kaj vidis, ke unu hirundo

kun semo en la beko lame paŝetas tien kaj reen sur la fenestro. Ili tuj rekonis en ĝi la vunditan hirundon per la lama kruro.

La edzino etendis la manojn al la hirundo. La birdo tuj flugis sur ilin, kaj starinte kelkan momenton, elbekigis la semon sur la manplatojn, kaj kvivitinte tri fojojn, ŝvebis for. Ĉe la vido de la semo, la edzino suflozis bonan ideon al la edzo: "Ĝi estas la semo de botelkukurbo. Ni semu ĝin ĉe la pordo, ni eble rikoltos grandan botelkukurbon!" Tiu lasta konsentis: "Bone! Mi tuj semu ĝin!" Post kelkaj tagoj, la semo ĝermis, kaj produktis kompletan viglan planton. Ĝi kreskis pli alten kaj rampis laŭlonge de la muro sur la tegmenton. Tre baldaŭ la tigo estis kovrita de neĝblankaj floroj. Sed nur unu floro el ili gravediĝis kaj akuŝis belan kukurbidon. Kun ĉiu tago la kukurbido fariĝis ĉiam pli kaj pli pufa. En aŭtuno ĝi jam estis mirinde granda. "Tempas rikolti ĝin. Ni deŝiru ĝin kaj faru el ĝi du kuleregojn!" la edzino rimarkigis. La edzo alportis eskalon, kaj laŭ ĝi suprengrimpis sur la tegmenton. La botelkukurbo estis tre granda kaj pezis kvazaŭ je mil ĝinoj*. La edzo per herkula forto movis ĝin suben sur la korton. "Kiel ĝi tiel pezas? Ni segu ĝin por vidi kion ĝi entenas," la edzino konsilis. La botelkukurbo estis segita. El ĝi tuj radiis ondo da blindiga ora lumo. La botelkukurbo estis plenplena de oraj moneroj!

La geedzoj ŝtoniĝis de mirego.

La sceno estis hazarde gvatita de unu vilaĝano. Li demandis al la geedzoj kiel ili havis tiom multe da oraj moneroj. La geedzoj detale rakontis al li la tutan historion de la afero de la komenco ĝis la fino. Post tio, mava ideo naskiĝis en la koro de la vilaĝano. En la sekvanta jaro, la vilaĝano elprenis unu junan hirundidon el la nesto sub la tegmento de sia dometo, malice rompĝian kruron kaj hipokritante bonintencon kovis ĝin. Aŭtune, kiam la vundita hirundo plene retrovis la sanon, ĝi sagis for, eĉ ne rerigardante. La vilaĝano atendis kun raviĝo, ke tiu en venonta printempo reflugu kaj alportu unu semon de botelkukurbo. Post aŭtuno sekvis vintro. Jen venis la printempo. La vundita hirundo vere reflugis kaj alportis al la vilaĝano unu semon de botelkukurbo. La vilaĝano frenezis de ĝojo. Li semis la semon ĉe la pordo. La plantido elteriĝis, alte elkreskis, floris, fruktis. Kiam aŭtuno ĉeis, giganta botelkukurbo pompe sidis sur la tegmento. Ĉe tiu vido la vilaĝano sin lulis en la revo, ke la grimpa planto certe estas graveda je miriadoj da oraj moneroj kaj enscenigos al li belan surprizon. Estis jam tempo, ke la vilaĝano kolektu la botelkukurbon! Sur eskalo li levis sin al la tegmento.

La botelkukurbo, grandega, plumbomase pezis! Ĝi estis tro peza, ke li povis porti ĝin. La vilaĝano alvokis sian edzinon por helpo. Finfine ili levis ĝin, sed kiam ili kun la botelkukurbo sobiris, kaj krak'! la eskalo subite rompiĝis en la mezo. Kaj bum! la geedzoj falegis teren. La edzo rompĝis sian kruron kaj la edzino falis kapantaŭe ĝis

la tero. Ŝia buŝo batiĝis kontraŭ ŝtono kaj ŝiaj du antaŭaj dentoj disrompiĝis. Kiel pri la botelkukurbo?

Ĝi terenfalas kune kun la gemastroj, kaj kuŝis rompita en pecetojn. Kaj el interne elrampis miloj kaj miloj da serpentoj. Ĉe tio, la geedzoj svenis de timo. La plago ŝlosis ilin endome dum pluraj monatoj. Kio pri la bonkoraj kaj helpemaj maljunaj geedzoj? Ili disdonis la orajn monerojn al tiuj, kiuj estis en mizero aŭ en danĝero. La maljunaj geedzoj estis sanaj, gajaj, kaj vivis feliĉe ĝis la morto. Pardonu, karaj legantoj, ke mi ŝtelis de vi karan tempon pro tio, ke la historio estas iom longa kaj seka, kaj mi ne povas ĝin limigi per kelke da frazoj!

Do, nun mi metu la finan punkton al la historio per la idiotismo, per kiu mia avino siatempe finis ĝin: Kia la semo, tia la rikolto!

*ĝino: pezunuo de Ĉinio, 1 ĝino = 1/2 kilogramo Dalian 2019.8.14



Laimundas Abromas (Litovio)



Kiel oni lernu la lingvojn

Estis somera semajnfino. Vesperiĝis.

Albinas Saladis restis hejme. Li sidis antaŭ la televidilo kun botelo da biero enmane, - oni disaŭdigis lastajn novaĵojn pri la mondeventoj. Neatendite eksonis telefono. Ĝi estis pli ol neatendita, ĉar telefonis Staseo, lia samkursano. Ili pasintjare finis studadon en la universitato kaj diplomiĝis pri fiziko. Dum la tuta jaro ili ne vidis unu la alian, nek interparolis. Kaj jen... telefonavoko.

aŭtoro, Laimundas Abromas

-Saluton Albinas. Ĉu vi volas vojaĝi al Moskvo? - senenkonduke komencis Staseo.

-Kion mi faru tie?- Albinas provis elturniĝi.

-Kun la karaktero, kian vi havas, vi devas veturi tien!... Vi akompanos min, mi prizorgos la biletojn.- kurte kaj firme finis Staseo.

Albinas ne volis fanfaroni, tamen oni diras, ke li ne malbone scipovis skandali. Kompreneble. Nun li jam ne plu havas tian entuziasmon, energion, eltrovemon. Tamen li ekkuraĝis kaj riskis.

Je la antaŭvidita horo li venis en fervojstacion. Tie jam atendis Staseo kun du biletoj enmane. Ili envagoniĝis kaj okupis sian kupeon. La trajno baldaŭ ekveturis. Ĉar vojaĝo longedaŭris, amikoj dronis en la rememoroj pri la studenta tempo, pasigita en la universitato ... Matene de la sekvanta tago ili jam estis en Moskvo.

Moskvo - urbego, miloj da homoj, ĉiuj ien kuris, rapidis, svarmis. Kaj amikoj dronis en tiu homamaso. Posttagmeze ili rimarkis, ke ili devojiĝis, ke perdis unu la alian. Albinas komencis nervoziĝi, kulpigi Staseon. En Moskvo Albinas eksentis sin trifoje malpli saĝa ol estis antaŭe. "Do, pro kio mi vojaĝis ĉi tien? Ĉu mi ne sciis, kia mi estas? Ĉu mi havis dubojn? Ho, ne! Mi ne povis alimaniere. Mi neniam serĉis facilajn vojojn. Meti antaŭ mi defion, tiel same, kiel enspiri freŝan aeron," - nestis en la kapo de Albinas.

Dum kelkaj tagoj Albinas vagabondis tra Moskvo. Li ne kuraĝis demandi iun, interparoli kun iu. Des pli, kion li povis diri al tiu? Pro larmoj kaj rigidiĝinta nazmuko tutegale li vidis nenion. Jen jam suno subiris, venis vespero. Li profunde enspiris freŝan aeron, poste longe tusis. Tuskraĉinte li iris plu kaj aliris Ruĝan Placon.

Laciĝis liaj gamboj kaj li bezonis ripozon. Li aliris Kremlon kaj dorsapogis sin je la Kremla muro. Li apenaŭ ripozetis, kiam aliris lin tri policistoj kaj komencis krii:

-Ŝto ti delajeŝ, balamut? Ti Kremlj ĥoĉiŝ razruŝit?¹

Albinas nenion komprenis, pri kio parolis policistoj, kaj kontraŭstaris. Pro tio li estis arestita kaj prizonigita.

Hejmen li revenis nur post duonjaro, perfekte lerninte la rusan lingvon. Reveninte hejmen li volis instrui la rusan lingvon al dezirantoj ĝin lerni. Tamen, bedaŭrinde, nek unu persono en la urbeto volis lerni la rusan lingvon. Albinas pensis, ke la lingvon de najbaro oni devas kompreni.

Pro la fiaskintaj intencoj li ĉion lasis kaj kun la turista grupo forveturis al Berlin. En la ĉefurbo de Germanio Albinas deflankiĝis for de la grupo kaj vizitis kelkajn kafejojn kaj bierejojn. Ebriiĝinte li vagabondis tra Berlin kaj laciĝinte aliris Parizan placon. Iomete ripozi li decidis en la ombro de Brandenburga Tor. Tuj aliris policistoj kaj ekkriis:

- Was bedeutet das? Was machen Sie?²

Policistoj rimarkis, ke li volas pisi apud Brandenburga pordego. Albinas kontraŭstaris kaj ne subiĝis, pro tio policistoj lin arestis kaj prizonigis... Hejmen li revenis nur post ses monatoj, perfekte parolante la germanan lingvon. Sur la urbetaj stratoj li promenadis bele vestinta, ĉar li revenis en prizonula vestaro. Multaj fraŭlinoj postiris lin, tial Albinas baldaŭ edziĝis. Li vendis multekoste sian prizonulan vestaron kaj aĉetis aŭton. Tamen tedis al li la sidi hejme kaj baldaŭ li sola pertrajne veturis al Parizo. Dum kelkaj tagoj li vagabondis en la ĉefurbo de Francio, vizitis kafejojn, kabaretojn, ĝis venis al Ejfel-turo. Li apogis sin ŝultre al la turo kaj volis faliĝi ĝin, tamen, ho ve! Tuj alkuris la ĝendarmoj kaj arestis lin. Kvankam li kontraŭis kaj malobeis, Albinas estis prizonigita... Dum ses monatoj li perfekte lernis la francan lingvon. Reveninte hejmen li instruis francan lingvon en la urbeta lernejo. Kvankam lia edzino naskis filon, tamen li tre enuis hejme, lin logis la vojaĝoj kaj lingvolernado. Baldaŭ li ĉion lasis kaj forveturis al Londono. Tie li ankaŭ trafis prizonon. Post ses monatoj li perfekte parolis la anglan lingvon. Reveninte hejmen li altpreze vendis prizonulan vestaron kaj aĉetis loĝdomon. Krome li ricevis laboron ĉe la urba administratejo kiel tradukisto-interpretisto. Dum lastaj kelkaj jaroj Albinas Saladis vizitis Madridon, Romon, Atenon, Istambulon kaj kelkajn aliajn ĉefurbojn. El ĉiu vojaĝo li revenadis nur post duonjaro. Precipe atendis lian revenon la loka junularo, kiun li vestis per importita prizonula vestaro. Intertempe lia edzino naskis ankoraŭ du infanojn. Dum ok jaroj, pasigitaj en vojaĝoj kaj prizonoj, Albinas perfekte lernis dekkvin lingvojn. Li legis multe da libroj kaj gazetoj, kiujn sendadis al li estintaj prizonamikoj.

Antaŭ unu jaro Albinas Saladis denove forvojaĝis. “Nun, kiam mi lingvistike konkeris preskaŭ tutan Eŭropon, decas ekrigardi pli vaste. Mi vojaĝos al Malproksima Oriento” - en la fervojstacio Albinas diris kaj adiaŭis la edzinon kaj infanojn. Forveturis li... kaj ne revenis. Vane atendis, vane ploris lia edzino kaj infanoj. Vane la junularo atendis novajn vestojn.

Neatendite ĉi-printempe en la urbeton venis iu arabo. Li iris al la loĝdomo de Albinas kaj longe ion kriadis en la nekonata lingvo. Edzino de Albinas, ricevinte de la edzo bazan klereon pri lingvistiko, venis sur la korton kaj, miksante la albanajn kaj danajn vortojn, demandis, kion volas estimata arabo. Ŝi komprenis la demandon de la alveninto: “Ĉu ĉi tie loĝas la ŝejko Ali Baba bin Assaladin?”.

Konsterniĝinte virino respondis jese, ankoraŭ ŝi volis klarigi, ke ŝia edzo forveturinta. Tamen tiu arabo elsakigis la botelon kun benzino, alkuris loĝdomon, frakasis fenestron kaj loĝdomon ekbruligis. La bonaj najbaroj alkuris kaj estingis la fajron kaj alveturintaj policistoj arestis teroriston kaj metis lin en la prizanon por ses monatoj. Neniu komprenis, kion balbutas tiu arabo. Nun ĉiuj loĝantoj de la urbeto senpacience atendas, ĝis pasos ses monatoj. Eble tiu arabo, lerninte la litovan lingvon, rakontos ion pri la samurbano Albinas Saladis.

Klarigoj:

1. *Kion vi faras, sentaŭgulo! Ĉu vi volas Kremlon ruinigi? (en rusa).*
2. *Kion signifas tio? Kion vi faras? (en germana)*



Yin Jiaxin (Ĉinio)



aŭtoro, Yin Jiaxin

Skatolo da tefolioj

Somere de 2002 sinjoro Wan, mia intima amiko, transloĝiĝis aliloken. Adiaŭante li donacis al mi skatolon da tefolioj. Mi malofte trinkas teon, konante nemulte pri tefolioj. Sinjoro Zhou amikiĝis al mi jam dekelkajn jarojn. Li kaj lia edzino tre ŝatas teon kaj bone konas diversajn tefoliojn. Oni diras: “Spadon donacu al kavaliro, ŝminkon donacu al belulino.” Do, al sinjoro Zhou mi transdonacis la tefoliojn de sinjoro Wan.

La tefolioj tre plaĉis al gesinjoroj Zhou, kiuj

diris, ke ili neniam spertis tian bonan tefolion, kia ĝi: tuta ĉambro tuj pleniĝis de bonodoro kiam ili infuzis la teon, kaj estas mirinde, ke la teo helpas plibonigi dormadon dum plej multe da specoj refreŝigas menson .

Kelkajn tagojn poste, sinjoro Zhou telefonis al mi demandante, ĉu mi bezonas helpon de li.

“Ne,” mi respondis.

Sekvatage, ankaŭ lia edzino telefonis al mi demandante, ĉu mi bezonas helpon de ŝi.

“Ne,” mi respondis.

Min perpleksigis ilia telefonado. Gesinjoro Zhou servas en la urba registaro kiel oficialuloj kun forta potenco. Oni ofte per flatado petis favoron de ili. Sed mi neniam faris tion.

Baldaŭ, gesinjoroj Zhou vizitis min. Dum interbabilado, ili denove demandis, ĉu mi bezonas ilian helpon. Mi la kapon skuis, dirante, “Mi scivolos, kial vi ĉiam divenas, ke mi bezonas helpon de vi.”

“Pri la tefolio,” sinjoro Zhou diris, “ni jam konsultis specialiston. Ĉi-speca tefolio estas speciale farita, kaj nenie aĉetebla. Laŭtaksite, la skatolo da tefolioj tre alte valoras. Kial vi al ni donacis aĵon tian multekostan, se vi ne postulas nian helpon?”

Aŭdinte lian diron, mi ne sciis, ĉu plori aŭ ridi.

Mi telefone demandis sinjoron Wan pri la tefolioj, kaj sciigis, ke dum sia inspektado en nia urbo prezidinto Jiang donacis po skatolo da tefolioj al ĉiuj altrangaj oficialuloj, inter kiuj troviĝas la patrino de sinjoro Wan, kaj ŝi neniam trinkas teon pro suferado de sendormeco, kaj ili ambaŭ, filo kaj patrino, konas nek la efikon nek la prezon de la tefolioj.

Veraj amikoj inter si nur zorgas pri amikeco, ne pri donaco ĉu kara aŭ malkara.

Lilia Nikolova (Bulgario)



Du fabloj

aŭtorino, Lilia Nikolova

Viro vidis bruligatan serpenton morti kaj decidis eltiri ĝin el la fajro. Kiam li faris tion ĉi, la serpento mordis lin kaj kaŭzis al li teruran doloron. La viro delasis la serpenton kaj la reptilio falis ree en la fajron.

Do la viro ĉirkaŭrigardis kaj trovis metalan stangon kaj uzis ĝin por eltiri la serpenton el la fajro kaj savi ĝian vivon.

Iu, kiu rigardis, alproksimiĝis al la viro kaj diris: "Tiu ĉi serpento mordis vin. Kial vi daŭre provas savi ĝin?"

La viro respondis: "La naturo de la serpento estas mordi, sed tio ĉi ne ŝanĝos mian esencon, kiu estas helpi. "

Ne ŝanĝu vian naturon nur ĉar iu vundas vin. Ne perdu vian bonan koron, sed lernu antaŭgardi vin.

* * *

Proverbo: "Neniam parolu al azeno".

La azeno diras al la tigro:

- La herbo estas blua.

La tigro respondas:

- Ne, la herbo estas verda!

Kverelo eksplodis kaj ili iris al la leono, reĝo de la arbaro, por solvi siajn diferencojn.

Antaŭ ol ili atingis la lokon en la arbaro, kie la leono sidis sur sia trono, la azeno ekkriis:

- Via Moŝto, ĉu estas vere, ke la herbo estas blua?

La leono respondas:

- Jes, ja, la herbo estas blua.

La azeno estis feliĉa kaj daŭrigis:

- La tigro ne konsentas kun mi, kverelas kaj ĝenas min. Bonvolu puni lin.

La Besta Reĝo anoncis:

- La tigro estos punita per 5 jaroj da silento.

La azeno ĝoje eksaltis kaj plu ripetis multfoje:

- La herbo estas blua, la herbo estas blua...

La tigro, akceptinte sian punon, demandis la leonon:

- Via moŝto, pro kio vi punis min? La herbo estas verda, ĉu ne?

La leono respondas:

- La herbo ja estas Verda.

La surprizita tigro demandis:

- Kial do vi punas min?

La leono respondas:

- Ne rilatas ĉu la herbo estas blua aŭ verda. Vi estas punita ĉar kuraĝa kaj inteligenta besto kiel Tigro ne povas pasigi sian tempon diskutante kun azeno. Kaj poste vi venas al mi kun ĉi tiu demando.

La plej malbona tempoperdo estas disputi kun malsaĝulo kaj fanatikulo, kiu ne interesiĝas pri vero aŭ realo, nur pri venko de siaj kredoj kaj iluzioj.

Neniam malŝparu vian tempon pro sencelaj disputoj. Estas homoj, al kiuj kiom ajn pruvojn kaj faktojn vi havigi, ili ĉiam ne povas kompreni. Ili nur volas pravi, kvankam tio ĉi estas malproksime de la ĝusteco.

Kiam la malklereco krias, la inteligenteco silentas.



Lao She (1899-1966)



aŭtoro, Lao She

Vizio

Lao She estas ĉinaj fama moderna romanisto, kiu gajnis la unua la laŭdtitolon "la popola artisto" de la Nova Ĉinio.

Jam pasis la festo de Klaro kaj Brilo en probabla konjekto: ĉu malusaj floroj preskaŭ plene floras? La festo certe iom malfruiĝis ĉijare, ĉar papilioj ankoraŭ ne plenkreskis. Tamen abeloj estis tiel energiaj ĉe naskiĝo, ke ŝajnis al ili ke la mondo estas aminde dolĉa. Blankaj nuboj malpeze ŝvebis en la ĉielo, kaj hirundoj amuziĝis sin najlante en la nubojn. Ripozis la vento, sed la branĉoj de salikoj intence balanciĝis, kvazaŭ incitetante la verdon ĉirkaŭan. La serena surkampa verdo supreniris kviete sur la monteton. Ŝajnis, ke ju pli ĝi alteniras, des la koloro pli helas, ĉar la delikata verdo timas esti laca; kaj sur la pinto de l' monteto ankoraŭ vidiĝis pli da flavaj linioj ol la verdaj. Sur la arboj ĉe l' monttalo montriĝis delikataj burĝonoj, eĉ se ili ankoraŭ ne verdiĝis. La blua ĉielo malantaŭ la monteto estis varmiga, se ne, kial sovaĝaj anseroj tien flugis kantante en vicoj? Inter ŝtonoj sin kaŝis hontemaj orkideoj, kies folioj eĉ ne estis tiel grandaj kiel ties burĝonoj.

Aromon el la monteto oni nur enspiris kun la okuloj fermitaj, por savi sin de peno serĉi la fonton de l' bonodoro. Vidu, ke bonodoras eĉ tiuj falintaj folioj lastjaraj. Tie troviĝis kelkaj blankaj kapretoj, kies mekoj hazarde maltroigis ilian ĝojon pro tio ke ili iom malĝojis. Ifoje almoviĝis kaprido barbohava sed senkorna, kiu pormomente stuporis ĉe ŝtonego kaj poste forkuris saltante kun levita vosteto.

Mi sunumiĝis sur la deklivo pensante pri nenio, sed gutis pretervole el mia koro poemeroj, kiuj falis en la verdan maron de mia brusto senbrue, nur kun ridetoj malaperintaj antaŭ ol la ondetoj atingis la vangojn; sed neniam formiĝis kompleta verso. En la poemkosmo ŝajnis, ke eĉ mi mem estas nur ia signo ie en ĝi.

Ju pli da sunumiĝo, des pli da korfaciliĝo. Mi eksentis la ĝojon de papilioj kiam ili ŝvingis siajn flugilojn. Ĉirkaŭpremante la genuojn, mi ĉirkaŭen ŝanceliĝis kun la ritmoj de ŝvingantaj salikaj branĉoj. Ĉiu el la olivecaj folietoj sur la branĉoj ŝajnis eta orelopurigilo perceptanta la voĉon de l' printempo. De tempo al tempo mi

rigardis en la ĉielon. Ha, sur la rando de tiu blanka nubo sidis hirundeto, kiu estis tiel malgranda ke ĝi preskaŭ miksiĝis kun la ĉielo, kvazaŭ nigra makuleto en la vasteco de blua lumo. Mia animo ŝajnis tien alflugi.

La vojeto sur la deklivo de l' lontana monto aspektis kiel flava linio en la verdmarkita provinco sur la mapo. Rigardata malsupren estis tiu vasta tritikkampo, kiu etendiĝis pli kaj pli malalte, kvazaŭ tien fluante de la deklivo, ĝis ĝin baris malhale verda pinaro. Mi vere esperis, ke tie, kie ondas la pinaro, estus golfo. Kiam mi stariĝis kaj moviĝis kelkpaŝe supren, mi tamen trovis, ke ne. Tie troviĝis kelkaj arboj ne tre klare videblaj, inter kiuj sporade sin kaŝis kelkaj malaltaj kabanjoj. Milda venteto alblovigis feblajn kokkrietojn.

La lontanaj kokkrietoj sonis iom tragike tra la serena printempa ĉielo; sed mi ne povis konfirmi, ĉu ĉio antaŭ miaj okuloj estas vera aŭ fikcia, ĉar tio kuŝas inter la sonĝo kaj la vero kvazaŭ ora linio de sono. Subite mi ŝajne vidis kokkreston sangruĝan: tio estus koko, espereble blanka, en la koro aŭ en la vilaĝo aŭ ie aliloke.

Denove mi sidiĝis; ne, sed laŭplaĉe kuŝiĝis, lasante la okulojn duonfermitaj por ricevi la bluan lumon de la ĉielo; mia rigardo iris ĉiam pli alten kaj pli profunden. Samtempe la varma blua lumo laŭgute verŝis sur la okulojn ne fore de mia koro. Nur momenton poste mi fermis la okulojn por percepti la enkoran serenon ĉielon kaj ridetemon.

Mi ne endormiĝis kaj sciis, ke mi preskaŭ staras ĉe la sojlo de sonĝlando, sed ankoraŭ klare aŭdas la interŝanĝajn vokojn kaj kvivitojn. Estis strange, ke, ĉiam kiam mi falis en la staton duondorman, mi vidis tiun lokon. Kvankam mi ne sciis kia loko ĝi estas, tamen ĝi ĉiam aperas tia antaŭ miaj okuloj antaŭ ol mi endormiĝas. Oni povus nomi ĝin preludo de sonĝo.

Ne tre granda estis ĉi tiu loko, kie troviĝis nek montoj nek maro. La loko aspektis kiel ĝardeno, sed sen klara limo. Ĝi estis preskaŭ neregula triangulo kun la tri pintoj mergitaj en la fluanta tenebro. Ĉe unu angulo, kiun mi ĉiam unue vidis, estis etendaĵo da densaj floroj ruĝaj kaj orflavaj. La suno ripozis, lasante mallumon regi malantaŭ la peco mikside de ruĝaj kaj flavaj floroj. La obskura fono siavice malheligas la ruĝon kaj flavon, kvazaŭ la ruĝa peonifloro pentrata sur la nigra botelego, tiel malhela ke ĝi faris la belecon iom terura. Mi ekvidis la veron, ke la malhela fono igas la ruĝet-flavan terpecon konservi ties propran koloron kaj ne elŝpruci ĉirkaŭen eĉ iomete. Cetere, la suno ne brilis, tiel ke la koloroj ne flugis alten en la ĉielon, sed nur tute restis sur la tero. Mi ĉiam vidis unue ĉi tiun terpecon kaj, tuj kiam mi ĝin vidis, mi ĝin rekonis eĉ se mi ne vidis la ceterajn, ĝuste kiel la vido de la Aroma Monto sciigas al mi la precizan situon, kie sin kaŝas Biyun Templo.

Por la ceteraj du anguloj, maldekstre estis longa deklivo plene kovrita per sovaĝaj floroj griz-purpuraj, kiuj enhavis iom solidan forton en sia beleteco, aŭ la lunlumo povis plimultiĝi la grizan parton per koloro arĝenta por montri iom da poezia spirito; sed mi ne memoris, kie estis malgranda luno. Ĉiuokaze, mi ĝin ne abomenis. Anstataŭe, mi amis tiun purpuron kiu ŝajne estis malheligita per la prujno, kvazaŭ juna patrino portanta robon moruskoloran. La plej bela estis la dekstra angulo, kie

troviĝis pajlotegmenta kabano. Antaŭ ĝia pordo kreskis mincaj ĉinaj rozuoj en florado; ĉiuj floroj estis rozkoloraj.

Se miaj okuloj turniĝis de maldekstre dekstren, de griz-purpura al ruĝet-flava kaj plue al hel-roza, mi ŝajne vidis la renversan sinsekvon de sezonoj aŭ de aŭtuno ĝis frua printempo. La vivo ne nur ne daŭris de florado ĝis kadukado, sed eĉ prenis rozojn kiel ĝian finon de aromo kaj ĉarmo.

Meze de la triangulo vidiĝis etendaĵo da herboj, malhele verdaj, molaj kaj dikaj kaj iom malsekaj. Ĉiuj folioj rekte staris, kvazaŭ aŭskultante al la dista pluvo. Ne troviĝis la vento, nek flugantaj insektoj; tio estis mistera monteto, kie vivis nur koloroj.

En la realo, mi neniam vidis tian vizion, ĝi tamen ĉiam ekzistis, antaŭirante mian sonĝon. La malhela verdo de Anglujo, la purpuraj montetoj de Skotlando, la obskura arbaro de Germanujo, aŭ iliaj praavoj, sed kiu tion precize scias? Elpreni la sunlumon el la brilaj koloroj apud la ekvatoro iom similas al tio, sed ne estas en tia vizio pluvarkosimilaj serpentoj kaj koloraj birdoj. Lasu! Malgraŭe mi ĝin konas.

Multfoje mi renkontis la vizion. Ĝi kaj la versoj “la montoj altas kun la luno eta, la akvo malleviĝas kaj la ŝtonoj vidiĝas” estis paro da pentraĵoj en mia koro. Mi neniam vizitis tiun kabanon. Aŭ mi estis tiel allogita de tiuj koloroj, ke mi ne eĉ iom moviĝis, aŭ mi estis entirita disde la herbejo en sonĝon kun aliaj koloroj. Ĝi estis amiko, kiun mi ofte renkontis. Ni sciis la nomon unu de la alia, sed ne interparolis pri ambaŭaj detaloj. Mi ne sciis, kia koloro estas ĝia centro, kie eble sin kaŝas ia mistera muziko – mi vere esperis, ke io bruos.

Ĉifoje mi decidis iri esplori la vizion.

Mi alvenis al la ĉinaj rozuoj kun la penso, aŭ eble pro tio, ke mi timis aŭdi miajn proprajn piedpaŝojn. Al mi la rozfloroj iom aludis, ke estas ĉirkaŭ la Drakboata Festo. Estis mia espero, ke malhele flava papero ie algluiĝas, kun cinabra juĝisto presita inter du faskoj de absintoj. Sed tute mankis. Mi nur aŭdis krimon “ĉerizo!” el mia koro. Tro kvieta estis tiu loko.

Fermis la pordo de la kabano, kaj pendis blankaj kurtenoj sur la pordo kaj fenestroj. Ne troviĝis ombro de floroj, ĉar ne sufiĉis la sunlumo. Nenio aŭdiĝis interne, kvazaŭ tie naskiĝus kvieteco. Mi senbrue apertigis la pordon kaj bonvenatis de kvieto, pureco kaj bonordo. Jes, ili bonvenis min! Ĉio en la ĉambro apartenis al “homoj”, se la pejzaĝoj eksteraj apartenis al “fantomoj”; espereble mi ne uzis vortojn tro akrajn.

Oni per kurteno dividis la grandan ĉambron en du partojn, unu grandan kaj la alia malgrandan. La kurteno estis ankaŭ blanka, kun malgrandaj papilioj broditaj sur ĝi. Oni meblis la eksteran ĉambron nur per longa tablo, malgranda ovala tablo kaj seĝo; ĉiuj estis malhele verdaj kaj ne per-olee dekoritaj. La kuseneto sur la seĝo estis verdeta, kaj kelkaj libroj kuŝis sur la tablo. Sur la longa tablo staris miniatura pineto kaj du bronzaĵaj speguloj, kaj la rustkoloro de la speguloj estas pli hela ol tiu de la pineto. En la interna ĉambro metiĝis malgranda lito kovrita per verda kovrilo preskaŭ ĝistera. Super la litkapo pendis malgranda korbulo, en kiu estis iom da

jasmenfloroj preskaŭ sekiĝaj. Sterniĝis sur la planko oblonga dika kuseno, apud kiu metiĝs paro da malgrandaj verdaj pantofloj kun broditaj blankaj floroj sur ili.

Mia koro ekbatis! Mi neniel mergiĝis en la kompleksan kaj brilnan poezion de Keats; nelukseco kaj simpla beleco estis la tono ĉi tie, kaj ili neniam estis la iluzio de Coleridge, ĉar mi konis la verdajn pantoflojn kun broditaj blankaj floroj sur ili.

La historio pri amo ĉiam estas ordinara, tiel ordinara kiel la printempa pluvo kaj aŭtuna prujno. Sed ordinaraj homoj preferas elfosi iom da poezio en tiuj ordinarajoj; do probable mankas al la plej multaj aferoj en la mondo pli da koloroj. Povraj homoj! Esperu, ke mia historio ankaŭ havos iom da amuzo, kiun ĝi meritas.

Ne estis tiel bela kiel tiufoje. Mi diris “tiufoje”, ĉar ĉio estis bela en tiu tago kaj tiu momento. La malusa floro en ŝia hejmo floris en grandan blankan neĝpilkon. El la subtilaj bambuoj kreskantaj laŭ la muro ĵus burĝonis novaj bambuŝosoj. La ĉielo estis delikate klara. Ŝiaj gepatroj ne estis hejme. La granda blanka kato dormis ŝtonan dormon sub la floroj. Aŭskultante ke mi venas, ŝi elflugis el sub la kurteno kiel hirundo. Tro malfrue ŝanĝante siajn ŝuojn, la paro da malgrandaj verdaj pantofloj sub ŝiaj piedoj ŝajnis du hele verdaj folioj. Ŝi tiel ĝojis kiel la matena suno, la du ŝajnaj pompecoj sur ŝiaj vangoj ruĝis pli multe ol kutime. Ŝajnis, ke du aromaj ruĝaj koroj fokusis du putetojn sur la vangoj, en kiuj superfluis karmina fontakvo. Tiutempe ŝi ankoraŭ portis du longajn harplektaĵojn.

Kiam ŝiaj gepatroj estis hejme, ŝi povis nur rigardi min tra la fenestro aŭ provi rideti kun mi kiam mi preterpasis. Ĉi-foje ŝi estis kiel katineto renkontanta amuzan kunulon. Mi neniam sciis, ke ŝi “kapablas” esti tiel vigla. Kiam ni eniris kune en la ĉambron, ŝia ŝultro tuŝis mian. Ni ambaŭ nur aĝis dek sep jarojn. Ni diris nenion, sed niaj kvar okuloj diris unu al la alia, ke ni estas treege ravitaj. Mi plej ŝatis rigardi la ĉinan pentraĵon “ĉiuj birdoj omaĝas al la fenikso” sur la muro de ŝia domo, sed ĉi-foje miaj okuloj estis tro okupitaj por ĝin aprezi. Mi rigardis tiujn malgrandajn verdajn pantoflojn. Ŝi retiris siajn piedojn, ruĝiĝante eĉ ĝis ŝiaj oreloj; ŝi tamen ankoraŭ ridetis. Mi volus demandi ŝin pri ŝia hejmtasko, sed mi ne tion faris. Mi volus demandi, ĉu estas tute blankaj novnaskitaj katidoj, sed mi ne tion faris. Mia koro estis plena de demandoj, sed la buŝo estis silentigita de ia potenco. Mi sciis, ke ŝi estas la sama, ĉar mi vidis, ke ŝia blanka kolo iom moviĝas, kvazaŭ ŝi volus engluti kelkajn negravajn vortojn kaj hezitus eldiri ion kio meritis diri.

Ŝi sidis sur malgranda biksa tabureto apud la fenestro, kun la ombro de malusaj floroj balancanta flanke de ŝia vizaĝo. Kelkfoje ŝi rigardis ekster la fenestron, verŝajne timante ke iu envenos. Kiam ŝi konfirmis ke neniu troviĝas, la floraj ombroj sur ŝia vizaĝo estis trasorbitigitaj ĝisruĝe en ĝojo. Senpacienca sed kun ĝojo, ŝi alternigis siajn manojn por tuŝeti la randon de la tabureto. Fine ŝi direktis al mi profundan rigardon kaj nevole sed nepre devige diris, “Ni iru!” Mi jam forgesis min mem, kaj nur vidis, ne aŭdis, du vortojn – mi ne sciis kiajn vortojn – elirantaj el ŝia buŝo. Sed profunde en mia koro mi sukcesis diveni la veran signifon de ambaŭ vortoj, ĉar ankaŭ mi havis iom da tia zorgemo. Mia koro rifuzis sin movi, sed mia cerbo sciis, ke ĝi devas iri. Miaj okuloj estis najlitaj en la ŝiaj. Ŝi volis mallevi sian kapon,

sed antaŭ ol ŝi povis tion fari, ŝi kuraĝe levis ĝin denove, renkonte al miaj okuloj intence, sentime, timide kaj ne volante esti timida. Ĝis ni spontanee mallevis la kapon, ni levis ĝin denove kaj rigardis unu la alian. Ŝajnis, ke niaj koroj tuŝas unu la alian.

Mi iris tre malrapide, kaj ŝi akompanis min eksteren de la kurteno, kun roso kovrita sur miaj okuloj. Atinginte la duan pordon, mi turnis la kapon kaj trovis, ke ŝi jam alvenis ĝis sub la malusa floro. Mi forŝvebis kiel plumo.

Post tiam ne plu estis tiaj ŝancoj.

Iufoje ŝia familio defalis, kaj okazis funebraĵoj kiuj tamen ne estis tre tristaj. Mi diris al ŝi kelkajn vortojn sub la lampo. Ŝi portis sur si funebran veston kaj, kunmetante la manojn sur la brusto, ludis per bukoj de la funebra vesto. Starante tuj apud mi, ni povis preskaŭ aŭdi la pafetojn de varma pasio sur la vizaĝo unu de la alia, kvazaŭ la greno brue kreskis post pluvo. Sed tamen ni interŝanĝis nur kelkajn sekajn vortojn – kelkajn movojn de la buŝo kaj la lango – dum niaj koroj tute ne zorgis pri ili.

Ni ambaŭ aĝis 22 jarojn, sed la Movado de la 4-a de Majo ankoraŭ ne naskiĝis. Kontaktoj inter viroj kaj virinoj ankoraŭ ne populariĝis kiel ordinara afero. Post diplomiĝo mi fariĝis la estro de elementa lernejo, kio estis la plej granda honoro de mia vivo, ĉar ŝi sendis al mi gratulan leteron. Ĉe la fino de la letero, kie estis presita umefloro, ŝi donis rimarkon: Ne respondu! Mi do ne kuraĝis respondi. Sed en mia koro ŝajne brulis torĉo, kaj mi faris ĉion eblan por ordigi la lernejon. Mi respondis al ŝia letero per kompleta lernejo, dum ŝi aplaudis al mi pro mia sukceso en mia sonĝo – per siaj manoj, jadeskaj manoj, kune kun la pojnjoj!

Proponi edziĝon estis io, kion ne povus imagi. Multaj senkonsciaj sed potencaj obstakloj staris inter ni, kiel kruelega tigro, kiu fieris pri sia forto.

Estis io, kio sufiĉas por min konsoli. Miaj kor-ligitaj oreloj neniam aŭdis, ke ŝi jam fianĉiniĝis. Estis io pli bona, ke mi samtempe servas kiel la estro de civila lernejo, kaj ŝi instruis kelkajn lecionojn. Mi esperis nenion alian krom tio, ke mi povus ŝin ĉiam ajn vidi. Ŝi sciis, kiel min eviti – malgraŭe ŝi estis jam pli ol dudek-jara knabino. Ŝi perdis siajn naivecon kaj viklecon, kiujn ŝi havis kiel knabino dek-sep- aŭ dek-ok-jara, sed akiris la dignon kaj misteron de virino.

Ankoraŭ du jarojn poste mi veturis al Nanyang. En la tago, kiam mi iris al ŝia domo por diri adiaŭon, ŝi hazarde ne estis hejme.

Dum miaj jaroj eksterlande mi neniel sciigis pri ŝi. Neeblis rekte interŝanĝi leterojn, kaj plie, nereakta informpeto min ĝenis. Mi povis renkontiĝi kun ŝi nur en sonĝo. Estis strange, ke la virino en mia sonĝo estas ĉiam “ŝi”. Diversaj sonĝoj igis min jen plorĝemi jen ĝojegi. Ankaŭ estis unika gusto en la fantazio de amo. En mia sonĝo ŝi restis knabino dek-sep-jara: ŝi havis etan vizaĝon rondan, kaj iom da ĉarmo en siaj delikataj okuloj. Ŝi ne havis altan staturon! Ŝi havis molan korpon kaj iris per facilaj paŝoj. Ŝia longa nigra harplektaĵo kreis la plej pasian dorsan figuron. Mi ankaŭ memoris la manieron, ke ŝi kombis siajn harojn, sed mi ĉiam sonĝis pri ŝia dorsa figuro kun harplektaĵo.

Post reveno al hejmlando, nature mi unue serĉis ĉion pri ŝi. Ĉiuj informoj ŝajnis onidiroj, ke ŝi fariĝis kaŝita prostituitino!

Eĉ tia kor-pika informo ne reduktis mian pasion; kontraŭe, mi eĉ des pli volis vidi kaj helpi ŝin. Mi iris al ŝia domo, sed ŝi ne plu loĝis tie. Mi povis vidi nur parton de la malusarbo transmure. La domo jam forvendiĝis.

Finfine, mi trovis ŝin. Ŝi estis jam frizita, kun la haroj kombitaj malantaŭen. Ŝi portis sur la nuko grandan verdan kombilon. Ŝi surhavis rozkoloran robon, kies manikoj longis nur ĝis la kubutoj; ŝiaj brakoj jam ne estis tiel supraj. Ŝi multe sin ŝminkis, tiel ke sur la frunto kaj okul-anguloj vidiĝis faltoj. Malgraŭ tio, ŝi ankoraŭ bele ridis, kvankam ne plu tiel vigle. Se ne estus pudro kaj oleo sur ŝia vizaĝo, verŝajne ŝi aspektus postakuaŝa virino malsana. Ŝi neniam ĵetis al mi rektan rigardon, kvankam ŝi ne aspektis honta sur sia vizaĝo. Ŝi ankaŭ ridetis kaj parolis, sed distrita je siaj vortoj kaj ridetoj, kiel se ŝi volis esti tute ĝentila al mi. Mi provis demandi al ŝi pri ŝia financa situacio, sed ŝi ne tre volis respondi. Ŝi ekbruligis cigaredon, kaj la fumo eliris el ŝiaj nazotruoj tre glate. Metante sian livan genuon sur la dekstran, ŝi rigardis supren al la leviĝo kaj falo de la fumo, kio ege enuigis ŝin kaj ankaŭ elmontris ŝian firman karakteron. En miaj okuloj staris larmoj, kiujn ŝi neeble ne vidis, sed ŝi donis neniam respondojn. Ŝi senĉese rigardis siajn manfingrajn ungojn kaj milde premis malantaŭen sian hararon; ŝajnis, ke ŝi vivas nur por ili. Kiam temis pri familianoj, ŝi nur silentis antaŭ mi. Mi devis foriri. Kiam mi eliris, mi donis al ŝi mian adreson, dezirante ke ŝi povus peti aŭ ordoni, ke mi ion faru. Ŝajnis, ke ŝi tute ne aŭskultis min. Kun rideto ŝi turnis sian rigardon aliloken sen intenco forvidi min. Ŝi pensis, ke mi estis elirinta, sed fakte mi staris senmove ĉe la pordo. Tiele, kiam ŝi turnis sian kapon, miaj okuloj renkontiĝis. Kaj ŝi returnis sian kapon en ekbrilo.

La unua amo estas la unua floro de juneco, kaj oni ne povas ĝin forĵeti indifere.



Mi petis alies helpon por sendi al ŝi iom da mono; ŝi akceptis ĝin sed ne respondis.

Miaj amikoj rimarkis mian doloron, ĉar iliaj brovoj estis la plej perfidaj. Ili afable prezentis al mi amatinon, sed mi kapneis per milda rideto. Mi devis atendi ŝin. La unua amo estas ĉiam la plej dolĉa kiel juna bebo, ĉu tiu bebo estas eta tolpupo aŭ kelkaj ŝtonetoj. Iom-post-iome, mi komencis paroli pri ŝi kun kelkaj miaj plej intimaj amikoj. Ili diris nenion pri ŝi pro konsidero pri mi, sed ŝajnis, ke ili ŝercas pri mi sarkasme, ĉar ili vidis min tro stulta, tio estis, ke ŝi ne meritis esti amata. Ju pli ili tion faris, des pli firma mi fariĝis. Estis ŝi kiu estis malferminta la pordegon de mia am-ĝardeno, kaj mi devis iri kune kun ŝi ĝis la fino de la vivo. Kompato havas malpli da gusto ol amo,

sed pli da homaj sentoj. Baldaŭ mi petis amikon por konfesi al ŝi, ke mi volas edziĝi kun ŝi. Mi ne kuraĝis iri mem. Revenante, mia amiko alportis kelkajn ŝiajn ridegojn. Ŝi diris nenion alian krom ridadi. Pri kio ŝi ridis? Pri mia stultaĵo, sed tio ne ridindas. Ĉu homo amplena ofte iom stultiĝas? Tio sufiĉas por esti fiera. Se ŝi ridis pri si mem, tio nur rezultis el tio, ke ŝi estis embarasita plori. Troa melankolio iafoje igas homojn ridegi.

Stulteco donis al mi iom da kuraĝo, kaj mi decidis iri vidi ŝin. Tio, kion mi volis diri, estis bone preparita kun detaloj kaj ankaŭ multfoje provludis. Mi diris al mi mem, ke mi devas sukcesi anstataŭ perdiĝi. Ŝi ne estis hejme. Mi dufoje reiris kaj ne vidis ŝin. Ĉe mia kvara vizito, ene de la ĉambro mi vidis malgrandan simplan ĉerkon, en kiu ŝi kuŝis. Ŝi mortis de abortigo.

Antaŭ ŝia ĉerko mi metis korbon da plej freŝaj rozfloroj, kun larmoj el mia koro sur ties petaloj, kaj tiele finiĝis mia unua amo kaj komenciĝis dumviva malpleneco. Kial ŝi falis en tian situacion? Mi ne plu volis pridemandi. Ĉiaokaze, ŝi por ĉiam vivos en mia koro.

Kiam mi fiksas rigardon sur tiuj malgrandaj verdaj pantofloj, mi sentis moviĝon en la kurteno malantaŭ mi. Turnante la kapon, mi vidis, ke la malgranda papilio brodita sur la kurteno ĉirkaŭflugas super ŝia kapo. Ŝi restis kia ŝi estis kiam ŝi estis dek-sepaŭ dek-ok-jara, tiel malpeza kaj svelta, kiel feino kiu flugis malsupren sed ankoraŭ ne firme staris. Mi retrois unu paŝon, kvazaŭ mi timus fortimigi ŝin se mi antaŭenpaŝus. En tiu momento, ŝi fariĝis knabino pli ol dudek-jara. Ŝi ankaŭ retropaŝis, dume pli kaj pli multiĝis la faltoj sur ŝia vizaĝo. Ŝi ekridis senbride, dum mi sidis ĉe la liteto. Apenaŭ mi sidiĝis, kiam mi leviĝis denove kaj jetis min sur ŝin, tre rapide. En tiu ege kurta momento ŝi denove returniĝis al sia aspekto dum la aĝo de dek sep jaroj. Dum nur unu sekundo mi vidis la ŝanĝon de ŝia duonvivo. Ŝajnis, ke ŝi jam sin liberigis el la regado de tempo. Mi sidis sur la seĝo, kaj ŝi nestis en mia sino. Ankaŭ, mi sentis ke mi reakiris sur la vizaĝo la ruĝon antaŭ dek kvin aŭ dek ses jaroj. Ni simple tiel sidis, aŭskultante la ondadon de ambaŭ koroj. Ni forgesis la tempon. Fine mi trovis la sonon kaj algluis miajn lipojn al ŝia orelo, demandante:

“Ĉu vi sola loĝas ĉi tie?”

“Mi ne loĝas ĉi tie, sed tie,” ŝi respondis, montrante mian koron.

“Vi neniam forgesis min, ĉu?” mi firme kaptis ŝiajn manojn.

“Kiam kisite, mi rigardas vin elkore!”

“Sed ĉu vi permesas, ke iu alia kisu vin?” mi mienis sen ia ajn envio.

“Kun la amo en la koro, lipoj ne ripozos. Kiu diris al vi, ke vi ne kisu min?”

“Ĉu mi ne timis, ke mi ofendus viajn gepatrojn? Ĉu poste mi ne iris al Nanyang?”

Ŝi kapjesis, “Timo perdigas al vi ĉion, kaj apartigado intensigas la baton de amplena koro.”

Ŝi rakontis al mi pri sia vivo antaŭ sia morto. En la jaro kiam mi iris eksterlanden, ŝia patrino mortis. Ŝi do vivis iom pli libere. La floroj el la muro nature allogas abelojn kaj papiliojn, kaj al ŝi amindumis kelkaj viroj. Ŝi ankoraŭ sopiris al mi, sed la korpo ofte havis malpli paciencon ol amo, ĉar ne ĉiuj amplenaj floroj estas

umefloroj. Fine ŝi akceptis la amon de junulo nur pro tio, ke li aspektis kiel mi. La junulo tre amis ŝin, sed mi ankoraŭ loĝis en ŝia memoro. Fizika gajno ne signifas la kontentigon de amo, kaj similaj voĉo kaj aspekto ne povas anstataŭigi la veran formon de amo. Li fariĝis dubema, ĉar ŝi konfesis, ke ŝia koro estas en Nanyang. Ili disigis unu de la alia. Tiutempe ŝia patro perdis ĉiujn siajn posedaĵojn, kaj ŝi devis edziniĝi. Ŝi vendis sin al la filo de riĉa familio por vivteni sian patron.

“Vi ne iros instrui por gajni monon?” Mi demandis.

“Mi povas nur instrui la elementan lernejon, kaj la salajro ne sufiĉas por la fumado de mia patro!”

Ni ambaŭ frostiĝis. Mi pensis: se mi revenus tiam, ĉu mi povus kontentigi la bezonon de ŝia patro kun mia financa kapablo? Kaj mi nur povus larĝe aperti la okulojn por vidi ŝin vendanta sin, ĉu ne?

“Mi kaŝis la amon en la koro,” ŝi diris. “Mi nutris ĝin per la teo kaj rizo perlaboritaj per mia korpo. Mi profunde timis, ke amo ne ekzistos, se la korpo mortos; sed fakte mi eraris. Lasu ĝin flanken. Li estis tre ĵaluza kaj, kion ajn mi faris kaj kien ajn mi iris, li ĉiam min sekvis. Li ne povis eltrovi neperfektaĵojn en mi, sed perceptis, ke mi ne amas lin. Iom post iom, anstataŭ malŝati min, li superŝutis min per publikaj insultoj, kaj eĉ batis min; li devigis min konfesi, ke mia koro apartenas al iu alia. Li ne povis plu tion elteni, nek zorgis pri vivpanoj. Ŝi elpelis min el la domo, lasante al mi eĉ neniun robon. Mia patro petis monon de mi kiel antaŭe, sed mi mem devis vivi per manĝaĵoj kaj vestoj, kaj plie mi ĉiam kutimiĝis al bonaj manĝaĵoj kaj decaj vestoj. Mi utiligis mian korpon por kontentigi la korpon, kaj korpo estis la kapitalo preta. Tiu, kiu donis al mi monon, aĉetis de mi iom da ŝajniga rido. Mi lertis en ridado, kaj ekzercis ĉarmajn ridetojn en la spegulo. La diverseco de medioj igis min retiriĝi unu paŝon kaj pensi pri tio, ke tia “popeca vendo” estas pli bona ol ke min regis tiu filo de riĉa familio dum la tuta tago. Sur la strato, multaj homoj montris al mia dorsa silueto kaj ĝemis, sed finfine mi estis libera, eĉ fiera. Kelkfoje, kiam mi renkontiĝis kun virinoj ne bele vestitaj, mi sentis min ankaŭ iom fiera. Kvarfoje entute mi iam ricevis abortigon, sed post doloro mi denove ridis.

“En la komenco, mi estis iom famkonata, ĉar mi ne nur estis ludaĵo de riĉa hejmo, sed ankaŭ povis legi kelkajn vortojn. La novriĉuloj kaj malnovriĉuloj ambaŭ volis zorgi pri mi. Mi ne havis tempon por pensi, eĉ nek volis savi monon. Mi vivis tute por miaj vestoj kaj aroma pudro. La hodiaŭa beleco estas la hodiaŭa vivo, kaj morgaŭo havos sian propran tagon por zorgi pri si mem. Koncerne la korpan lacecon, mi nur zorgis pri la nuna ekscito, sed ne pri la estonteco. Baldaŭ tiu vivo ne plu daŭrigeblas. La tabako de la patro estas senfunda truo. Kaj abortigo ankaŭ bezonas multe da mono. Antaŭe mi ne volis savi monon; kaj nature mono ne estis mem savita. Mi kuraĝis savi eĉ neniun enuigan fieron. Mi devis iri serĉi monon en tre malvirta maniero, kelkfoje rabi malkaŝe. Iu aŭ alia ĝemis montrante mian dorsan silueton, kaj mi, turnante la kapon, ridetis al li. Unufoja abortigo aldonis al mi du aŭ tri jarojn. La speguloj ne trompas homojn: mi jam fariĝis olda kaj turpa. Senbrideco sufiĉas por kompretigi maljunecon. Mi plejble utiligis mian korpon por servi homojn fizike,

alie mi ne havis klientojn. Mi dormis kun la pordo apertanta, ĉar mi apartenis al la publiko sed ne al mi mem. Oni povis aĉeti mian korpon ĉiam ajn dum 24 horoj potage. Mi malaperis en la maron de volupto, kaj ne vivis en la mondo de homoj kun lucida menso. Vidante la virojn freneze moviĝantaj sur mi, mi kalkulis la monon perfingre, ne pensante, sed nur kalkulante, kiel mi povas gajni pliajn kvindek cendojn. Mi ne ploris, ĉar plor-mieno ne aspektis bela. Mi nur maltrankvilis pro mono, senkonsidere al mi mem.”

Ŝi ripozis dummomente, kaj la gutoj de miaj larmoj malsekigis la randon de ŝia robo.

“Vi revenis!” ŝi daŭrigis. “Vi ankaŭ estas pli ol tridek-jara. Mi memoras, ke vi estis 17-jara lernanto de elementa lernejo. Viaj okuloj jam ne estas tiuj, kiuj rigardis miajn verdajn pantoflojn tiujare – kiom da jaroj pasis? Vi tamen, pli-malpli, restas vi mem, dum mi jam mortis. Vi povas daŭrigi vian sonĝon pri la unua amo, dum mi jam ne plu havis sonĝon. Mi tute ne dubis pri tio, ĉar mi sciis, ke vi nepre akceptos min, se vi revenos. Kiam mi vere vidis vin, mi jam ne povis trovi min mem. Kion do mi donos al vi? Kiam vi ne revenas, mi por ĉiam ne rifuzos vin; mi diris al ĉiu ajn, ke mi vin amas. Nun vi revenis kaj mi povas nur ridegi. Sed vi ne revenis, ĝis mi falis en tian situacion. Ĉu vi ne intence mistifiki min? Se vi neniam revenus, mi ĉiam havus sonĝon pri Nanyang dum vi ĉiam havus min en via koro. Ĉu tio ne estas bela? Vi tamen revenis, tiel malfrue...”

“Sed ‘malfrue’ ne signifas ‘tro malfrue’,” mi intermetis.

“‘Malfrue’ ja signifas ‘tro malfrue’. Mi mortigis min.”

“Kio?”

“Mi mortigis min mem. Tio, kion mi destinas, povas vivi nur en via koro, en poemo; per kio vivo diferencas de morto? Mi mem faris tion dum abortigo. Se vi akompanas min, mi ne povas ridi. Kiel mi povas perlabori monon sen ridado? Estas do nur unu vojo, kiu nomatas morto. Vi revenis malfrue, sed mi ne plu volis morti malfrue. Se mi mortus iom poste, mi eĉ ne havus la esperon vivi en via koro. Mi loĝas ĉi tie, kie estas via koro. Ne estas sunlumo ĉi tie, nek sono, nur kelkaj koloroj. Koloroj daŭras pli longe, kaj fariĝas nia memoro. Jen la paro da etaj pantofloj, sur kiu estas la koloro verda. Vi kaj mi konos ilin por ĉiam.”

“Sed mi ankaŭ memoras tiujn piedojn. Ĉu mi rajtas ilin rigardi?”

Ridetante, ŝi kapneis.

Mi insiste kaptis ŝiajn piedojn, fortiris ŝiajn ŝtrumpetojn kaj, rezulte, vidiĝis senkarna blanka piedosto.

“Foriru!” Ŝi ekpuŝis min. “De nun ni ne havos la okazon revidi unu la alian! Mi deziris vivi en via koro, tamen ne eblas nun; mi deziras esti ĉiam juna en via koro.”

La suno kliniĝis okcidenten, la vento iom plifortiĝis kaj ŝvebis grizaj nuboj en la oriento – estis iom pli malvarme. La printempa pejzaĝo multe pli sombrigiĝis en sonĝo. Mi leviĝis kaj denove vidis la malhelajn verdajn pinarbojn. Mi ne sciis, kiom longe mi staris. Iuj tordiĝantaj malaltaj figuroj venis de malproksime, kun ia muziko neklare aŭdebla. Kiam ili alproksimiĝis, multaj birdoj kun blankajflugiloj estis

timigitaj for de la kampoj. La birdoj vekriante flugis cis la monton. Mi klare vidis, ke grupo da homoj haste marŝas kaj post ili tuj leviĝas iom da polvo. Tri aŭ kvin tamburistoj iris antaŭe, ilin sekvis kelkaj homoj en blankaj funebraj vestoj, kaj ĉe la vosto de la procesio estis ĉerko. Oni enterigis mortintojn ankaŭ en printempo. Oni disŝutis plenmanon da monimitaĵojn, kiuj falis sur la tritikajn kampojn kiel flugantaj papilioj. La nigraj nuboj en la oriento fariĝis pli densaj, kaj la verda koloro de salik-branĉetoj fariĝis multe pli malhela, eĉ iom pli trista. Tute senscia en la koro, mi ekmemoris nur tiujn malgrandajn verdajn pantoflojn, kiuj faris printempan sonĝon kvazaŭ du foliojn sur la arbo senmorta.

* Unue aperis en *Literaturo*, Nro 4, Vol. I, okt. 1an, 1933, originale titolita *Vision*, enmetita en *Al la Foiro*, Liangyou Kompanio de Libro-presado Ŝanhajo, sept. 1934.



tradukinto *Liu Hongyuan*

Mikronovelo

Post akcidento

Post akcidento la viro, kiu jam fariĝis blinda, senĉese kriadis: “Flegistino, flegistino, ĉu vi estas ĉi tie? Ĉu vi povus pasigi al mi la poŝtelfonon?” Senparole ŝi donis al li la poŝtelfonon. “Ĉu vi povus helpi min sendi mesaĝeton al mia koramikino? Skribu: Pardonon. Ni disiĝu, ĉar mi jam enamiĝis al alia virino...” Restante ankoraŭ senparola, la flegistino prenis la manon de la viro kaj larmoj falis el ŝiaj okuloj.

Elĉinigiĝis *Herbeto*

Yi Shu (1946-)



Morto de la amo

elĉinigis Yang Fang

Mi vekigis pro tio, ke laŭhora pagita laboristino komencis uzi polvosuĉilon en la salono.

Mi frotis miajn okulojn. Mia tuta frunto acide doloretis. Ree funkciis la televidilo, kiun mi eble ne malŝaltis.

Ĉio ne gravas.

aŭtorino, Yi Shu

Mi nudpiede paŝis en la kuirejon por preni lakton. Mi ekpensis sidante sur la radmovebla seĝo.

Kion mi povas fari?

Mi nepre divorcos disde Ĝundong. Eĉ se sen divorciĝo, tio ne min helpus. Li volas forlasi min kaj ne revenas hejmen tri tagojn. Mi devas akcepti la fakton, ke li ne min amas plu.

Mi prenis trankviligan pilolon. La nova tago min ree enuigas.

Mi ne volas loĝi plu en ĉi tiu domo pro troo da rememoroj. Tamen mi ne povas reiri al la domo de gepatroj, ĉar mi vere eskapis el tie, kie troviĝas mallarĝaj ĉambroj kaj simplaj mebloj. La maljuna patro tudas pro kraĉaĵoj ŝtopitaj en la gorĝo, iras en klozeton por elsputi ilin. Malnova eluzita radioricevilo ĉiam siblas en la ĉambro. Post mallŝaltado de la radioricevilo la televidilo laboradas anstataŭe de la dua posttagmeze ĝis la dua en profunda nokto.

La mondo estas tiel mizera, la homa vivo estas tiel mizera. Tio ne estas kulpo de la maljunulo, sed.. la socio kulpas.

Ne, mi ne loĝos kune kun ili.

Pro tio, kiam Ĝundong vortigis siajn intecojn antaŭhieraŭ nokte, mi diris: “Vi elloĝu de ĉi tie kaj mi ne foriros.” Mi ne havas lokon por loĝi.

Tial li transloĝiĝis.

Mia kapo terure doloras. Mi englutas du pilolojn de aspirino.

Mi ne scias, kiam mi jam elkonsumis la lakton. Skribinte la liston de aĉetotaĵoj, mi telefone postulas sendadon de ili el la proksima vendejo.

Servistino demandis, “S-rino, ĉu mi forĵetu tiujn florojn?”

La florzvazo entenas malhele nigrajn rozojn, jam frue velkintajn. “Jes, ili forĵetu.”
Mi ja ŝajnas hieraŭa rozo.

Mi devas agi kun elstarigita brusto. Ankoraŭ ne tre aĝa, mi havas mian salajratan okupon. Kiu scias, eble mi povos reedziniĝi.

Sed tio, kio turmentas min ĝis sufero, estas, ke mi ankoraŭ amas lin.

Devigite disiĝi de iu eta tranĉilpiko. Komence min kaptis nur miro kaj konsterniĝo. Mi ne sentis doloron kun sango fluanta el la vundo. Kiam mia animo kvietiĝis, la doloro jam penetris en la koron.

Mi konfuzite pensas, kion mi faru.

Je eksono de la telefonilo mi prenis la aŭdilon.

Aŭdiĝis la voĉo de la panjo: “Cong, mia filino, vi ne nepre divorcu, kio ajn okazias...”

Mi tuj demetis la aŭdilon.

Ŝi pene donis al mi admonon, sed mi ŝajne ne komprenis. Ŝi ne povas min helpi por eterne kaj nur vane kriaĉi al mi por eterne. Kion ajn mi faras, tion ŝi oponas. Mi ne prenas tion serioze, ke ŝi ne havas povon, sed mi tre abomenas, ke ŝi ne lasas al mi iri sur mia propra vojo.

Mi eligis suspiron. Se vi ploras, vi devas eviti la aliajn; se vi ridas, vi devas inviti la mondon al ridado.

Denove sonis la tintilo de la telefonilo.

“Ho la.”

“Ĉu vi estas Congcong?” demandis la alia ekstremo.

“Jes.”

“Mi estas via kuzino.”

“Ha lo.”

“Ĉu mi povus viziti vin?”

“Ĉu necesas? Divorco estas ordinara,” mi respondis.

“Ne maltrankviliĝu. Mi nur faros ordinara viziton.” Ŝi demandis, “Ĉu vi restas hejme la tutan tempon?”

“Jes, Vi povas veni, sed mi eliros por kelka tempo posttagmeze.”

“Mi komprenas. Mi ne restos tre longe. Kion vi ŝatas manĝi?”

“Mi ne havas apetiton.” Mi demetis la aŭdilon.

La servistino vaksas la plankon ritme kaj malrapide.

Abrupte mi vizias la scenon de nia transloĝiĝo en ĉi tiun domon: hasteme aĉeti meblojn, ŝanĝi la fenestrajn kurtenojn kaj farbi la murojn blanke. Sed nun la hejmo tuj disiĝos.

Kun korŝiro mi faligas varman larmon, klinante la talion.

Mi neniel imagas, ke li forlasos min, ŝanĝante sian koron dum palpebruma daŭro.

Kiom da ĝojo ni ĝuis en ĉi tiu domo! Post laboro ni ambaŭ hastis hejmen. Eĉ la taksio haltis ĉe ruĝa trafiklumo, ni blasfemis, ĉar ni volis hejmeniri tri minutojn pli frue por intervidiĝi unu kun la alia.

Mi kredis plene, ke ni amas nin ĝis niaj haroj blankiĝos.

Mi viŝsekigis mian larmon konfuzmense.

Eksonis la porda tintilo. La servistino malfermis la pordon kaj la kuzino eniris. Ŝi nete sin vestis. Kvankam en varmega vetero, ŝi surportis helkolora kostumo el kompakta silko super sia bruna haŭtkoloro.

Mia kapdoloro ŝajne iom moderiĝis. Bruliginte cigaredon, mi demandis, “Ĉu la jaĥto de via familio jam suriris la maron?”

“Jes,” ŝi eĥis, “vi havas bonan vizaĝkloron, sed via patrino multe zorgas pri vi.”

“Ŝi nur zorgas pri miaj bagateloj, ĉu surhavi sufiĉe da vestaĵoj, ĉu kunporti ŝlosilojn elironte. Zorgado ne nepre feliĉigas.” Mi diris trankvile, “Kuznjo, vi ja estas tre feliĉa. Via patrino aĝas nur pli ol kvardek jarojn.”

“Kvardek naŭ jaroj. Kaj via patrino?” ŝi demandis, “ŝi proksimiĝas al la aĝo de sepdek jaroj?”

“Jes.” Mi klinis la kapon.

“Ne estu tro maltrankvila. Perdi edzon ne signifas la finan tagon de la mondo. Li ne certe estas la tuto de via vivo. Iom post iom ĉio pliboniĝos,” ŝi min konsolis.

“Kuznjo, vi ne povas kompreni,” mi skuis la kapon.

“Ĉu mi ne povas kompreni? Ŝi replikis. “Mi divorcis antaŭ du jaroj.”

Mi iris al la sofo kaj sidiĝis.

“Ĉu vi scias, kiel belas la sunlumo?” ŝi demandis.

“Tio ne koncernas min,” mi diris.

“Ne indas, ke vi zorgas pri li tiel elkore. Li estas nenio pli ol ordinara viro. Ĉu li havas tri okulojn!”

Mi kapjesis, “Jes, mi scias.”

“Hodiaŭ estas sabato. Se vi volantas, mi povas trinki posttagmezan teon kune kun vi. Ni iru al la hotelo Sha Ti. Nu, ĉu vi memoras? Siatempe post kiam ni dancis en Baguio, ni ĉiuj iris al la hotelo por nokta kafo.”

Gratante la kapon, mi ekridetis, “Jes, tiam Eelen prezentis kantadon ĉe Sha Tin. Ĉu vi ankoraŭ memoras? Dulisa estis infano, mi timas. Ŝia patro posedis bandon tie.”

“Tiuj junuloj, kiuj rendezuis kun ni, ĉiuj havis nemalbonan temperamenton,” ŝi ridis, “ili ĉiuj havis aŭton kaj poste ili ĉiuj lernis fremdlande.”

“Vi iris,” mi diris, “sed mi ne.” Mi oscedis.

“Dimenĉe ni eliru,” ŝi petis min.

“Mi jam prenis trankviligan pilolon kaj mi ne povas min movi. Mi volas dormi,

post kiam la servistino ŝanĝos la littukon.”

“Congcong, vi ĵus ellitiĝis,” ŝi diris, “kial vi ree ekhavos dormon?”

“Ja, en la sonĝo troviĝas belaj suno kaj luno. Mi ŝatas dormi.” Mi diris: “Pardonon al mi.”

Ŝi eklevis ŝultrojn. “Mi ne volas devigi vin. Mi foriru unue.”

Mi akompanis ŝin ekster la pordon.

La servistino diris, “Sinjorino, mi jam plenumis ĉion kaj la varoj, kiujn la vendejo liveris, jam lokiĝis en la ordo. Mi venos postmorgaŭ.”

“Bone, bone,” mi diris, “foriru do.”

La pordo fermiĝis. Ĉiuj foriris, nur mi restis. Tiu sceno tre similis al tiu de retenita lernanto post lernaj horoj en bazlernejo, en kiu ĉiuj lernantoj foriris kaj nur li sola estis retenita, fronte al la nigra tabulo, kun hontemo kaj humileco, tre volante sin ĵeti por strangoli la instruiston.

Ĉu mi povus strangoli Ĝundong? Mortigi postulas kompenson de la vivo. Mi ne malamas lin. Tio, kion li faras tiamaniere, baziĝas sur lia propra kialo, almenaŭ ekestas ĝojo ĉe li kaj lia amatino.

Mi ankoraŭ memoras, kiel mi konatiĝis kun Ĝundong.

Kiam mi, deknaŭ-jara, laboris ĉe Feliĉa Valo (Happy Valley), pro enuo post tagmanĝo, ni butikumis. La aliaj koleginoj ŝovis sin en kosmetikaĵ-vendejojn kaj konfekciaĵ-vendejojn, dum mi ŝatis iri al proksima aŭto-agentejo de Lamborghini kaj Maserati. Mordetante pomon, mi ofte pririgardis la aŭtojn, starante ĉe la fenestro longan tempon.

Tiama populara modelino Twiggy stiris rozruĝan Maserati-aŭton. Kun abundo da mono ŝi sciis, kiel elspezi ĝin bone. Se oni ne elspezas monon, la mono ne estas utila. Ŝi estis vere enviiga.

La mondo de la deknaŭa jarcento plenis je espero. Iele ajn aperis Masereati-princo, kiu povas edzinigi min en la kastelo. Kiu zorgas, ĉu li estas blanka aŭ nigra ĉevalo!

Tamen aperis nur Ĝundong.

Li diris, “Mi ne havas sufiĉe da mono por aĉeti Lamborghini, sed mi havas nur Volkswagen.”

Li aĝis dudek jarojn. Ĵus diplomiĝinte el la arkitekta fako de Hongkong Universitato, li oficis en la instituto de la registaro. Mi konsideris lin tre interesa kaj aminda, sed mi ne pensis, ke mi edziniĝos al li.

Li diris, “Ĉiufoje kiam mi hejmeniras per aŭto, mi ĉiam vidas, ke junulino kun blankaj ĉemizoj kaj jupo, starante antaŭ la aŭto-vendejo, absorbite mordetas pomon. Tagon post tago, se mi ne vidas ŝin, mi eksentas perdiĝemon kaj mi penas delogi ŝin.”

Aĉetinte bukedeton da kariofildiant-floroj, li alpaŝis kaj donis ĝin al mi, dirante,

“Mi ne havas sufiĉe da mono por aĉeti Lamborghini, sed mi havas nur Volkswagen.”

Fine mi edziniĝis al li.

Ni tenis amon du jarojn kaj poste havis trijaran geedziĝan vivon. Nun mi estas iom pli ol dudekkvar-jara.

La apartamento, kie ni loĝas, estas geedziĝa donaco donita de lia patro. Ni deponas dekkelkaj miloj da dolaroj en la banko. La ornamaĵo sur mia mano estas la memoraĵo donacita de lia patrino.

Tamen miaj gepatroj donacis al mi nenion, sed nur amason da plendoj.

Mi diris al la patro, ke Lily He ne sukcesis pro nenio. Ŝi estas filino de panjo He. Post geedziĝo mi preskaŭ oficiale rompis disde la hejmo, sed sen ajna perdo.

Ni ambaŭ ne havas infanon.

Eble antaŭ duonmonato oni diris al mi, ke Ĝundong havas amatinon.

Post laboro li komencis hejmeniri pli malfrue. Sidante en la sofo, mi devis lin atendi plurajn horojn. Mi pensis pri kverelo kun li, sed la rezulto kondukis nur al tio, ke li havos motivon hejmeniri. Ankaŭ mi pensis, ke mi kontaktos kelkajn amikojn, inter kiuj troviĝas kelkaj viroj.

Ili ĉiuj estas seninteresaj. Eĉ se mi volus, pro kolero, min elvendi, mi ne povus kuŝi kun tia homo sur la lito.

Junulo gvidis min al sia apartamento kaj prezentis al mi, kiel li dekoris la apartementon, je kia prezo la klimatiziloj kaj luksaj murŝrankoj kostas, kie li aĉetis la manĝotablon. En la areo de pli ol kvin cent kvadrataj futoj li ne permesas vulgarajn nek simplajn meblojn. Tio sonis, kvazaŭ tiuj aĵoj estus lia atingo, kiujn li penus akiri per sango kaj ŝvito dum la tuta vivo, kaj kvazaŭ oni sentus tion gloro, se li kuirus manĝon en lia kuirejo. Ĉi ĉion mi aŭdis kun naŭza sento en la koro.

Devenante de la deca familio, li diplomiĝis el usona universitato. Ĝundong vere superis tiujn ulojn tre multe kaj ne mirinde, ke li plaĉis al multaj junulinoj, kvankam li jam edziĝis unu fojon. Poste mi eliris kun mezaĝulo, kiu havas edzinon. Mi timis, ke pro senscienco de sia edzino pri li, li ofte drinkis ekster la hejmo, kondukante tenere kaj afable. Eble pro sia humila deveno de malriĉa familio, li havis paron da krudaj manoj kun dek fingroj makulitaj de mucida polvo. Sed tio ne gravis. Li portis oran Rolex-brakhorloĝon, sed ĝia bendo estis fabrikita en Hongkongo. Mi tre malŝatas tian paradon. Se vi volas ŝpari monon, do ne aĉetu la brakhorloĝon, alie, ne ŝparu tiun oran brakhorloĝan bendon. Ĝundong ankaŭ havis tian brakhorloĝon, kaj pro ĝia pezo, preferis pendigi ĝin sur la zono.

Ĉio rilatas al Ĝundong.

Neniu estas supera al Ĝundong.

Mi tute ne havas intereson eliri kun la aliaj viroj.

Krome ankoraŭ estis juna kuracisto, post konigo de li al mi far alia persono, ne

rendevuis kun mi. Okaze kiam ni renkontiĝis, li ĉiam montris sian ĝentilan rideton al mi. Jen tio pruvis, ke siatempem Ĝundong kovis eksterordinaran senton al mi. Li almenaŭ kuraĝigi sin devigi min ekparoli.

Nuntempe la altkvalitaj viroj ja tro malmultas.

Jes, Ĝundong estas nenio. Tamen ĉio en ĉi tiu mondo postulas komparadon. Neniu povas esti komparata kun li.

Hodiaŭ estas sabato, sed kie li loĝus post sia elmoviĝo el la hejmo? Kun kiu li pasigus la belan nokton? Mi ĉagreniĝe komprenas, ke ni jam venis al la fino.

Mi anstataŭigis la du-personan liton per la unu-persona. Mian blablaadon antaŭ endormiĝo li jam ne plu aŭdis. Mia vivo laŭe velkiĝos.

Mi nepre vizaĝas al la realeco. Ĉiutage mi oficas sen ajna emocio. Post hejmeniro mi drinkas kaj prenas medikamentojn fronte al la televidilo, kaj dronigas min en pensojn kun larmantaj okuloj. Mi ne malsamas ol Ĝundong, sed sopiras al li en mia koro, esperante, ke li estu kun mi.

Li ne povas scii, neniam.

Mi levas la litkovrilon por dormi. Mi pentas, ke mi ne iris kun la kuzino trinki teon. Fakte tio ne tre gravas. Pli bone promeni ekstere kaj kapleve rigardi la ĉielon. Ja ni ĉiuj povas vivi nur dum palpebruma tempdaŭro. Ĉio fariĝos malplena kaj la ĉielo denove klaros post palpebrumado.

Mi ŝaltas la radioricevilon.

Aŭdiĝas tiu malnova kanto “Verdaj manikoj”.

“Lamentindas, ke ja vi perfidas mian amon, estas tre nedece min forlasi malprudente, mi sincere amas vin dum la longlonga tempo, mi amuzas kaj ĝojigas vin pro via kuno.”

Ĉi kanto naskiĝis dum la epoko de Ŝekspiro minimume antaŭ pli ol kvar cent jaroj.

Mi nun havas la tempon duoble pli ol la antaŭan kaj pripensas eĉ bagatelojn foj-refoje.

Mi prenas du dormigajn pilolojn el la boteto. Oni diras, ke tia engluto de dormigaj piloloj estas mortiga. Kiam vi ne povas endormiĝi, prenu pliajn du pilolojn; kaj se vi ankoraŭ ne endormiĝas, prenu pliajn du pilolojn; kaj poste vi ne povos vekigi plu.

Mi ne volas morti vere, sed ne povas.

La damninda kapdoloro! Kie troviĝas aspirino?

Finfine la limdato alvenis. Li revenis lastnokte kaj tre trankvile diris, “Mi volas procedi por divorco.”

Levinte la kapo, mi ankaŭ tre trankvile demandis, “Kial?”

“Mi ne plu vin amas,” li diris.

“Ho,” mi diris laŭ mia memoro, “Multan dankon. Se estus aliaj anstataŭ vi, ili

certe ne estus tiel malkaŝema kiel vi. Ili penus ĵeti mil kaj dek mil riproĉaĵojn sur la alian partion por pruvi, ke ili ne estas malfideloj.”

“Mi tre bedaŭas, “ li diris.

Mi ekbalancis la kapon. Mi diris, “Por evitigi al vi suferon kaj embarason, vi pli bone transloĝu eksteren kaj mi restas.”

“Vi pravas, mi pensas,” li diris, “mi donacas la domon al vi, sed ĝi ne estas kompenco. Nur... ke vi sentu vin pli oportune. Tre malfacilas lui domon.”

Post tio li transloĝis eksteren.

Leviĝinte el la lito, mi emis vomis, certe pro perturbo en la stomako. Mi ne devas fuŝi la tutnovan littukon per vomajo. Mi barakte iris al la klozeto. Klinante min super la lavpelo, mi ŝpruce elvomis sangon.

Kun konsterniĝo mi rigardas la disŝprucantan sangon. Ho, Ĉielo! Kio okazas al mi? Tuj poste min atakis vertiĝo.

Mi bezonas helpon, Ĝundong. Sango svarme fluis el la stomako tra gorgo, tiel ke mi ne povis fermi la buŝon.

Rampinte al la telefonilo, mi levis aŭdilon. Mi telefonis al lia kompanio, esperante, ke li ankoraŭ estas tie.

Lia sekretario respondis al telefonvoko. Mi diris, “Mi estas lia edzino. Mi malsanas, mi...”

Ĝuste tiam mi perdis la konscion.

Mi vekigis en malsanulejo.

Li sidis apud mi.

Rigardante lian vizaĝon, mi eksenti kordoloron, sed mi ne esprimis ajnan feblecon.

Mi diris, “Mi ne mortigis min, mi...”

Turninte sian kapon, li interrompis min, “Estas stomaka sangado, pro alkoholaĵo, trodozo da aspirino kaj dormigaj piloloj.” Li parolis modere kaj senemocie.

Lia amo al mi jam mortis. Mi forte retenis la elfluantan larmon.

Mi diris, “Mi certas, ke vi vidis sangosuĉan zombion, kiam vi venis.” Mi eĉ ne povis trudi rideton.

Li diris, “Vi restis senkonscia unu tagon kaj du noktojn. Kaj nun estas lunda mateno. Kial ne zorgi pri via sano? Ni ĉiuj sentas maltrankvilecon. Via patrino vizitis vin, plorante plengorĝe.”

Mi eksentis hontemon. La patrino ĉiam perdigas al mi la vizaĝon en ĉiuj aferoj, grandaj kaj malgrandaj. Mi provis kviete diri, “Mi ne intencis fari tion.”

Post paŭzeto li demandis, “Kial vi ne kverelas kun mi?”

Mi feble demandis, “Ĉu necese, laŭ via opinio?”

“Do, listigu miajn misojn. Ĵetu blasfemojn kaj batu min.”

“Se mi agus tiele, vi povus havi kvietan animstaton?”

“Vi tute ne donus al mi kvietan animstaton, ĉu?” li incitis min.

“Mi ne kverelos kun vi,” mi difris, “mi vin amas.”

“Senutile.” Li diris, “Mi jam ne amas vin plu.”

“Mi scias.” Mi rigardis la horloĝon sur la muro, dirante, “Vi povas foriri. Vi certe estas okupita, mi pensas.”

“Mi prenos vin, kiam vi elhospitaliĝos.”

“Nenecese. Mi mem povas piediri. Dankon, Ĝundong, pro mia ĝenado al vi.”

Dirinte nenion, li turnis la kapon kaj foriris. Flegistino venis fari injekton al mi. Ŝi diris, “Ĉu li estas via koramiko? Li montras sincerecon kaj bonkorecon. Li multe maltrankviliĝis pri vi.”

Turninte la kapo, mi eksplodis per plorado, faligante grandajn larmgutojn.

Kiam mi elhospitaliĝis, li venis preni min kaj redonis al mi la ŝlosilojn al nia domo.

Li diris, “Kiam vi estos oportuna, ni iru al la advokato fari signaturon por separo, kaj krome mi transdonos la domon sub vian nomon.”

“Jes,” mi diris.

Li fiksrigardis min, “Kial vi montras vin tiel pacema?”

“Se mi saltus kaj salteĝus, kverelegus kun vi, ĵetus varmbotelon sur vian kapon, vi ankoraŭ divorcos kun mi. Plibone mi ŝparu tiun forton.”

Li demandis, “Ĉu vi ne malamas min?”

“Ne, mi ankoraŭ vin amas.”

“Ĉu vi ne venĝos vin pro mi?”

“Mi ĵetis al li ekrigardon, “Kial mi venĝos min? Kion bonan tio alportos al mmi?”

“Kiel ajn obeema vi fariĝus, mi ne amus vin plu. Pli bone vi faru scenon al mi, elverŝante vian koleron.”

“Dankon pro via konsilo. Mi ne havas koleron por elverŝi.”

“Mi ne kredas, “ li ekskuis sian kapon.

“Mi ne volas, ke vi kredas,” mi diris, “ne gravas, ke vi ne kredas.”

“Zorgu pri via sano. Kuracisto jam transfuzi al vi tri funtojn da sango. Poste ne licos engluti aspirinon. Memoru!”

“Dankon.”

Li eksplodis de kolero. “Ne estu tiel ĝentila, ĉu bone?” li hurlis, “Kial vi ne plore krias, kiel aliaj virinoj?”

Mi stupore rigardis lin. Kiam viro ne plu amas sian edzinon, ĉu ŝi kulpas plori, silenti aŭ morti?

“Je la dua morgaŭ posttagmeze ni iros al la oficejo de la advokato.”

“Bone, “ li diris.

Li forveturis per malgranda Volkswagen.

La laŭhore pagita laboristino ekpurigas la ĉambron.

Demetinte la ŝlosilon, mi diris al ŝi, “Forviŝu la polvon zorgeme. Ĉio devas esti brile pura.”

Ĉio ŝajne ne okazis.

Telefoninte al la kompanio, Ĝundong jam petis kvin-tagan forpermeson anstataŭ mi. Vere li estas fidinda por trakti la aferon.

La kuzino diris, “Li restigas al vi la domon, tiel ke vi havas lokon por enloĝi sen ajna zorgoj.”

Jes. Tio estas pli bona ol ke mi vizaĝus paron da gepatroj en la aĝo de sepdek jaroj. Ili ambaŭ posedas neniun alian povon ol tiun de detruado. Ili vigloplene kritikis ĉi tiun kaj tiun.

Ĝundong ja estas konsiderema pri mi. Estas aliaj viroj, kiuj pli malbonas ol li.

La kuzino leĝere diris, “Li estas pli bona ol ...mia edzo nenifaranta. Dum ĉiu manĝo li drinkis bieron, kiun mi pagis. Sed tio ne sufiĉis, kaj li des pli postulis, ke mi donu la tutan monsakon al li, kiel aliaj virinoj. Kia temperamento! Ĉu li volis, ke mi vivtenu lin? Mi riproĉis lin, sed li simple rifuzis dormi en la hejmo. Kaj fine ni divorcis. Kia ĝojiga afero! Nun kiam mi ekpensas pri tio, mi ankaŭ sentas delicon. Eble tio estas la plej ĝojiga afero dum mia tuta vivo.” Ŝi ridis kun plezuro.

Mi ridete demandis, “Kial vi edziniĝis al li?”

“Mia panjo premis min al geedziĝo kun li,” ŝi plendis, “tiujare mi estis deksep-jara kaj sciis nenion. Mia panjo, nekomprenema, kolere levis ŝtormon pri mia edziniĝo. Mi decidis edziniĝi al nedeca viro. Mi volis vidi, kion mia panjo faros pri mi.”

Mi ekridis, “Rezulte neniu el vi mortis.”

“Jes, mi sentas delicon.” La kuzino ankaŭ ridis, “Tiu ulo konsideris, ke li jam trompe akiris la knabinon, kiu neniel forflugos el lia mano... Eble nun li jam vekigiĝis el la bela sonĝo kaj multe pentis pri tio.”

Mi levis la kapon, “Sed mi ankoraŭ amas Ĝundong.”

La kuzino subite haltigis sian ridon kaj kun malplena vizaĝesprimio klinis la kapon. “Mi ne pentas pri mia edziniĝo al li,” mi diris, “li iam tre amis min. Tio tre gravas, vi scias. Almenaŭ iu amis min... tre gravas.”

Poste mi iom post iom kvietiĝis.

Ni surskribis sur la atestilo de separo. Li dankis min, ke mi donis al li oportunecon, kaj mi silente foriris de li.

Lia patrino faris al mi viziton kun iom da bedaŭro. Ŝi estis bonkora maljunulino.

Mi sciis, ke tio estas la lasta fojo rilatanta al nia familio. Mi zorgeme servis ŝin per teo kaj kukoj, per teo kaj kompatato.

Kian utilon alportas la kompatato?

Mi timis aŭskulti la noktmezan tusadon de gepatroj, kiam mi reiris al ties hejmo.

La gemaĵjunuloj ĉiuj kolektive tudas dum nokto. Ili estas vere teruraj.

Tial mi preferis loĝi sola en ĉi domo plena je rememoroj.

Ĉio en la ĉambro estas tenata kiel antaŭe ne por mia intenco atendi lian revenon, ĉar ne necesas redekori la domon. Variigi la domon ne signifas ŝanĝi mian internan mondon.

Mi sentas, ke la tagoj fariĝas malplenaj kaj mi ne plu havas estontecon.

Tagon post tago mi vidis multajn virinojn sukcesajn en kariero aŭ en geedziĝo. Mi des pli sentas min humila.

Starante ĉe la aŭtovendejo en Feliĉa Valo, mi trovis, ke ili jam komencas vendi Honda-aŭtojn. Estas tre malfrue. Ĉio jam tute ŝanĝiĝis.

Farinte mordeton de la pomo en la mano, mi pensis amare, ke tempo forfluis senrevene kaj mi ne plu irus al la aĝo de dek naŭ jaroj.

Kun rideto la manaĝero de la vendejo iris renkonte al mi. “Fraŭlino, eniru pririgardi.”

Mi malrapide skuis la kapon.

Antaŭ pli ol kvin jaroj, ĉe proksimume sama sezono kaj preskaŭ sama loko, Ĝundong sukcesis ĉasi min. Li elektis min kiel sian edzinon. Kaj nun post kvin jaroj li elektis la alian.

Unufoje, kiam mi trinkis teon, mi vidis lin promeni kun knabino kaj eniri la butikon. Ŝi, neĵuna, havis bonan haŭton kaj paron da longaj femuroj, laŭmode vestite.

Ĝondong aspektis ankoraŭ tiom alloge. Li surportis blankan T-ĉemizon, lozan diktolan pantalonon kaj paron da sportaj ŝuoj. La ora brakhorloĝo ankoraŭ malstrikte pendis sur la ledzono. Tiu fremdulo konata de mi ankoraŭ doloris min ĝis la koro sangis. Mi gapis lin kaj mia rigardo ne volis deŝiri sin de li.

Ili sidiĝis kun aliaj amikoj kaj ŝi sidis tre proksime al li, preskaŭ nedisiĝeble. Li aldonis siropon en ŝian teon. Turninte sian kapon, li vidis min, kaj mi tre nature montris rideton, evitante lian rigardon. Por ne embarasi lin, metinte dek-dolaran bankbileton sur la tablon, mi tiris la kuzinon por foriri.

La kuzino diris, “Kial ni devas foriri? Estas ili, kiuj devas foriri.”

Mi nur ridetis. Kial ni devas insiste resti tie?

Sed kiam mi turnis la kapon, mi vidis lin stari apud la kuzino kaj mi ŝtoniĝis.

Li tenere demandis al mi, “Ĉu vi foriras?”

Konfuzite mi ekbalancis la kapon, “Jes.”

Li demandis, “Kial vi ne trinkas kun via koramiko?” En la tono de malnova amiko. “Mi ne havas koramikon.”

“Kial vi ne havas?”

Mi ekpensis, “ Mi ne povas eliri kun tiu, kiu estas malsupera al vi.”

Li ekklinis sian kapon kaj tuj ridetis.

La lifto alvenis kaj la pordo malfermiĝis.

Li diris, “Ĝis la revido.”

Mi reciprokis, “Ĝis la revido.”

Mi kaj la kuzino eniris la lifton kaj la pordo fermiĝis.

Mia larmo elfluis kviete kaj la koro ŝiriĝis.

La kuzino diris, “Mi ne imagis, ke la hodiaŭa vetero estas tiel bela.”

Mi levis la kapon. Jes vere. Ĝundong eble iros al la maro akvoskii posttagmeze.

Li estas lerta akvoskianto kaj bone lernigis min. Mi ne povas ne kovi dankemon al li.

Mi dirus al li, “Via amo al mi kvazau lumigas mian vivo kiel la suno.”

Serio da rendevuoj kaj serio da ĝojaj ridoj malfaldis novan paĝon en mia vivo.

La kuzino demandis, “Kial vi ridetas? Pro kio vi ridetas?”

Mi ne povis doni la respondon.

Ŝi murmure diris, “Tiom rapide, tiom rapide li ekhavas alian virinon. Viroj tre facile tion faras, ĉu ne? Tre facile.”

Mi diris, “Mi ne stiris longe. Mi ŝoforu. Ni veturu al Repulse Bay por vidi feniksajn arbojn,”

“Okej.”

Mi mallerte stiris, sed mi fine barakte atingis la cellokon.

Dum trinkado de ruĝa teo, la kuzino diris, “La homa vivo ankoraŭ estas kun plezuro. Jen vidu tiun gehomojn. Kiel ĝojaj ili estas!”

Ĝundong lernigis akvoskii, tiu bonŝanca knabino.

“Kiel bela la pejzaĝo! Sed ni ankoraŭ pasigos longan pecon de nia vivovojo. Jes, la vojo iom kurbas, ĉu tio gravas? Ni fine atingos Romon.

Mi subite ekmemoris la lastajn versliniojn de la poemo far Byron.

“If I should see thee: after long year,
How should I agree thee, with silence and tears.”

“Se mi povus vidi vin, post longaj jaroj,
Kiel mi gratulus vin, per silento kaj larmo.”

Levinte la kapo, mi resoondis al ŝi, “Jes, mi komprenas. Jen vidu la florojn sur la feniksaj arboj, en eksplodema pompo, sen plendemo kaj paradante sur la arbokronoj. Tiaj bunteco de koloroj kaj abundo de la floroj tre similas al la forta amo, kiu mortos sen ajna pentu.”

La amo inter mi kaj Ĝundong mortis, sen ajna pentu.



Roberto Perez-Franco (Panamo)



La sonĝo

“Mi volas sonĝi, ke mi rigardas min dormi”

Mitch HEDBERG

Homo iris en sian liton kaj endormiĝis. Dum la

aŭtoro, Roberto Perez-Franco

dormado li sonĝis, ke li dormis kaj sonĝis ke liaj sonĝoj estis tiel realaj kiel lia maldormo. Li sonĝis, ke en siaj sonĝoj li vidis tiom multajn kolorojn, aŭskultis tiom multajn sonojn, parolis tiel flue kaj amis tiel intense kiel en sia maldormo. Li sonĝis, ke li estis nekapabla distingi sian dormon disde sia maldormo ĝis la punkto ne scii ĉu li dormante sonĝas aŭ maldormante vivas en la realo. Kaj la vorto “realo” perdis sian signifon. Tiam li sonĝis, ke li vekigis kaj decidis neniam plu endormiĝi, por eviti sonĝi. Kaj li maldormis por ĉiam, en sia sonĝo.

1998

Res una sumus

al Jorge Luis BORGES

“life is a kind of chess”

Benjamin FRANKLIN

Ke ĝi rezultis post plurjarcenta ludado de opoziciaj armeoj, perfektigata de homoj diverspopolaj kaj diversepokaj. Ke saĝulo Sisa kreis ĝin por pruvi al persa reĝo lian dependecon ĉe la regatoj. Ke Hermeso inventis ĝin - pintan verkon de la pinta homo - kiel donacon al sia idaro. Ke Adamo elpensis ĝin dum ripozado en la paradizo. Ĉiuj estas falsaj teorioj.

La homaro konas ŝakludon jam dek ses jarcentojn; kvin, la nuntempaj variaĵoj. Sed ĝi ne estis farita: ŝakludo estis malkovrita, ne kreita. Ĝi ekzistas ekde la unua momento, kiam io ekekestis. Du dimensioj sufiĉas: sur la plursegmenta ebena, lumo kaj mallumo, interbatalas du partioj. Iliaj movoj devenas de bazaj teoremoj, eŭklidaj

laŭ simpleco: la reĝo, ekzistokialo, iras unu spacon en ĉiu akso aŭ en ambaŭ. La damo ĝislime longigas la reĝan movon. La turo estas negacio de la oblikvaj movoj de la damo. La kuriero, la malo. La ĉevalo kunligas ambaŭ. La peono imitas nur unu el ili, minimumigite, al la kontraŭulo.

Ekster la tempo kaj la spaco, imagante la universon antaŭ ol krei ĝin, Dio pruvis, ke en la konsidero pri dudimensia mondo estas jam implicita la ŝakludo, neevitebla sekvo de la ebena kaj la dupoluseco. La zitroj diras, ke Alaho kreis Satanon por havi iun venkotan sur la tabulo; li ne povas venki sin mem perfekte ludante perfektan ludon: Dio kontraŭ Dio rezultigas ĉiam egalecon.

Proklamas ili, ke ekzistas senfinaj variaĵoj de ŝakludo, kaj ke tiu konata de la homo estas nur la plej simpla, la sola, kiun ni povas kompreni. Ili asertas, ke nia universo, kiu estas ekster nia komprenkapablo, estas la plej kompleksa ŝaklada variaĵo ankoraŭ alirebla de la homa percepto. Ankaŭ en tiu ĉi variaĵo la diablo estas la sola kontraŭulo kapabla mildigi al Dio lian solecon. La neŝanĝeblaj leĝoj de la fiziko, kiujn nia scienco apenaŭ komencas malkovri, estas la bazaj reguloj en tiu ĉi variaĵo. En ili la homo kaj la steloj estas antaŭdeterminitaj, same kiel la gambito de damo en la variaĵo ludata de ni. La saharaj zitroj insistas, ke estas specoj de ŝakludo ankoraŭ pli kompleksaj ol la videbla universo, kaj ke Dio ilin trovas kaj elprovas senfine.

2006

Ekskuzoj

al Monika, sen kies amoro

mia ekzilo en ĉi tiu mondo estus sensenca

Ekvidinte flavan lumon mi malrapidigis la aŭtomobilon. Okaze de la ruĝa mi haltigis ĝin. Profitante la paŭzon mi rigardis ŝin kaj, post kelkaj sekundoj karesante ŝian kolon, mi kisis ŝin. Ne satigis min miaj mil kisoj al ŝi en la teraso, ankaŭ ne du mil ĉe la ŝtuparo nek la tri mil donitaj en la aŭtomobilo antaŭ ekfunkciigi la motoron. Mi kredas, ke ŝiaj lipoj estas dependigaj: kisante ŝin mi volis tion fari por ĉiam. Tamen ŝi surpriziĝis pro tia kiso survoje. Mi ridetis:

–La lumo estas ruĝa – mi diris, levante la ŝultrojn.

Ankaŭ ŝi ridetis, kaj mi plu stiris. Du urboblokojn poste alia karmesina lampeto min favoris: mi intense kisis ŝin kaj karesis ŝiajn harojn. Ŝi scivole rigardis min kun palpebrumo simila al papilia flugilsvingado.

–La lumo estas ruĝa – mi diris naive.

Ŝi mallevis la okulojn kaj senĝene ridis. Mi plu stiris, ebria pro tiom da pasio, kaj silente benis la mirandan cerbon, kiu inventis la trafiklumojn. Jam antaŭ ŝia loĝejo mi malŝaltis la motoron. Ŝi, kun milda rideto sur siaj matenruĝaj lipoj, fikse rigardis mian konfuzon.

–Kio okazas? – mi demandis, perpleksa.

Se konsideri la kutimon, en tiu momento ŝi elirus el la aŭtomobilo, sed pro iu kialo ŝi restis senmova sur la sidloko. Mi volis diri ion pli, sed mi ekvidis rubenan ekbrilon en ŝiaj pupiloj, etan karminan anĝelon en abismo gagatkolora. Ŝi adiaŭe longe kisis miajn surprizitajn lipojn. Poste ŝi rigardis min kaj diris:

–Ĉu vi vidas la stratangulon? La lumo estas ruĝa.

2000

Provo kaj eraro

Adamo mordis la pomon. Gusto kaj aromo estis identaj al tiuj de la ordinara frukto. Dio, kiu dum jarcento atendadis la mordon, kaŝita malantaŭ vito, elsaltis kaj diris:

–Aha! Mi volis kapti vin tiel, sendankulo. Vidu ĉion, kion mi faris por vi. Mi donis al vi paradizon por eterna vivo kaj virinon por akompani vin. Kiel kondiĉon mi petis nur, ke vi ne manĝu de tiu arbo.

Ion volis diri Adamo, sed Dio parolis la unua:

–Ne kulpu Evan; tio estas tre simpla ekskuzo.

Siavice Eva volis paroli, sed Dio tuj diris:

–Ne diru al mi la malnovan rakonton pri la serpento.

La besto, kiu ankoraŭ estis proksime, grimpis la arbon kaj plu aŭskultis kun la rezignacio de aktoro, kiu foriras de sceno mil fojojn ripetiginta.

–Nun – diris Dio – mi verdiktos. Ambaŭ estos forpeltitaj. Vi, Adamo, laboros por ricevi panon. Finiĝos la feliĉaj tagoj de abundeco. Nun vi devos akvumi la sekan grundon per via ŝvito por ricevi ĝiajn malmultajn fruktojn. Vi, Eva, dum longa tempo ĝuis seksumadon sen zorgoj. De nun vi sangos ses tagojn ĉiumonate kaj facile gravediĝos. Fine, en doloro vi naskos bebon, kies kapo estos tro granda por via vagino. Vi restos hejme por ŝanĝi vindaĵojn, frotpurigi plankojn kaj lavi telerojn. Kaj vi, serpento, rampos sur la planko...

–Atendu momenton – interrompis Adamo.

Ĉar Li ankoraŭ ne alkutimiĝis al tio, ke Liaj inspiroj estu interrompitaj, Dio faris la koleran mienon, kiun Mikelaĝelo donis al Lia vizaĝo en fresko. Sed Adamo tiam

ne rigardis Lin: fikse rigardante la morditan frukton, li movis bulon sub sia vango. Post kelksekunda meditado, li diris:

–Ĉu vi scias, Dio? La afero ne valoras la penon... Mi redonas al vi vian pomon.

Li elbuŝigis la bulon ankoraŭ ne englutitan, kaj algluis ĝin kiel eble plej bone al la mordita frukto, kiun li poste metis sur branĉon de la malpermesita arbo. La serpento gapis al la ĉeestantoj kaj silente rampis ĝis alia branĉo. Dio, elreviĝinta pro tio, ke la fino – tiel detale preparita ekde la kreo de tiu ĉi universo - fiaskis denove, foriris de la Ĝardeno kaj iris krei aliajn mondojn, kun novaj variaĵoj. Adamo kaj Eva plu vivis en la Paradizo sen labori kaj sen naski. Ili mortis, jarcentojn poste, pro enuo.

2006

Amikoj

Mi estis jam akceptinta la proksimecon de mia morto, kiam mi ekvidis la grandegan figuron de Pluŝo malantaŭ la blanka konfuzo de la ŝtormo. Mi paŝis al ĝi kaj rimarkis, ke ĝi estis malpli peza sed ankoraŭ impona. Ĝia sovaĝa beleco vekis en mi bedaŭron, kaj mi sentis min kulpa. Mi karesis ĝian muzelon; ĝi flaris mian vizaĝon. Momenton poste ni kune kuŝiĝis sur la neĝo, tre lacaj. Proksima promontoro protektis nin kontraŭ la brutala batado de la neĝoŝtormo. La suno malofte kaj mallonge aperis malantaŭ la glaciaj nebulfluoĵoj. Mi pensis, ke nur la akra flarkapablo de la urso ebligis nian renkontiĝon en la polusa izoleco. Jam kiel urseto Pluŝo konis mian odoron.

Mi ne sciis, ĉu ĝia instinkto estis damaĝita de la foresto de ĉiuj uloj de la jam formortinta sama specio. El la dek du embrioj preparitaj de ni en la Instituto, nur ĝi supervivis. Ĝi kreskis majesta sed kondamnita al soleco. La mallibereco iĝis ĝia turmento. Kvankam mi pentas nun, mi kredis favori ĝian bonstaton, kiam mi petis al la Direktoro liberigi ĝin en la Arkto, kie ĝiaj antaŭuloj iam regis. Pravis tiuj, kiuj argumentis, ke la klimatsanĝiĝo jam detruis la ekosistemon, kaj ke ĝi ne trovus predojn. Mi kredas, ke ili akceptis mian peton nur pro tio, ke la projekto revivigi la specion estis jam malsukcesa, kaj ili suspektis, ke Pluŝo volis pli liberecon ol vivon. Vagante ĝi forkonsumis siajn grasrezervojn. Mi forkonsumis miajn nutraĵojn sekvante ĝin de malproksime, senpova antaŭ la tragedio. Post la eluziĝo de la radiobaterio mi perdis la lastan esperon pri saviĝo.

Senhelpaj sed kunaj sur la glacio, ni atendis la morton baldaŭ venontan pro malsato kaj malvarmo.

– Tio ne estis la fino, kiun mi volis por vi, amiko – mi diris karesante ĝian grandan blankan kapon – kaj nun mi vidos vin morti apud mi.

Ĝiaj nigraj okuloj, duonfermitaj kaj makulitaj de neĝo, rigardis min. Kun zorgaj movoj kaj daŭre karesante ĝin, mi elprenis mian ponardon el la dorsosako. Mia koro suplikis*: “Pardonu min”. Sed la peto ne necesis; ĝi bone komprenis. Mi tion sciis, kiam mi sentis mian kolon kraki, kiam ĝiaj kojnodentoj malrapide enprofundiĝis en mian karnon. Mi ne sentis doloron; nur la varmeton de la sango kaj ĝian spiradon super mia vizaĝo.

**Neologismo. La verbo en la hispana originalo, “suplicar” (el la latina supplicāre), signifas: peti ion kiel gracon aŭ favoron; peti ion kun humileco kaj submetiĝo.*

2006



tradukinto, Norberto DLAZ GUEVARA (Kubo)

Tradukita de Norberto DIAZ GUEVARA en 2023, kaj reviziita de Jorge Rafael NOGUERAS kaj la aŭtoro.



Fratoj Grimm



fratoj Grimm

vi estas malriĉa kaj bezonema, alkonduku vian infanon, mi intencas preni ĝin kun mi, por esti ties patrino kaj por zorgi pri ĝi.“



prenu do la ŝlosilojn por la dek tri pordoj de la ĉiela regno kaj konservu ilin: dek du pordojn vi rajtos malfermi kaj rigardi la belegaĵojn en la ĉambroj; sed la dektria, al kiu apartenas tiu ĉi malgranda ŝlosilo, estas malpermesita al vi. Gardu vin, ke vi ne malŝlosu ĝin, alie vi fariĝus malfeliĉa.

La knabino promesis esti obeema, kaj kiam Virgulino Maria forestis, ŝi komencis rigardi la loĝejoj de la ĉiela regno. Ĉiutage ŝi malŝlisis pordon, ĝis la dek du estis malfermitaj. En ĉiu sidis apostolo kaj estis ĉirkaŭata de granda brilo, kaj ŝi ĝojis pri

Maria-infano

Ĉe granda arbaro vivis lignohakisto kun sia edzino; ili havis nur unu infanon, ĝi estis trijara knabino. Sed ili estis tiom malriĉaj, ke ili ne plu havis la ĉiutagan panon kaj ne sciis kian manĝon doni al ĝi. Iumatene la lignohakisto eliris plena de zorgoj en la arbaron por labori, kaj kiam li hakis la lignon, staris subite antaŭ li bela granda damo, kiu havis kronon el lumantaj steloj sur sia kapo kaj ŝi parolis al li: „Mi estas Virgulino Maria, la patrino de la krist-naska infaneto;

La lignohakisto obeis, alkondukis sian infanon kaj transdonis ĝin al Virgulino Maria. Ŝi prenis la infanon kun si en la ĉielon. Tie ĝi fartis bone, ĝi manĝis sukeropanon kaj trinkis dolĉan lakton kaj ŝiaj vestoj estis el oro, kaj la anĝeloj ludis kun ĝi. Kiam la knabino fariĝis dekkvarjara, Virgulino Maria iam vokis ŝin al si kaj parolis: „Kara infano, mi intencas entrepreni grandan vojaĝon,

ĉiuj ĉi mirindaĵoj kaj belaĵoj, kaj la anĝeletoj, ĉiam akompaninte ŝin, ĝojis kun ŝi. Tiam nur la malpermesita pordo ankoraŭ estis fermita.

Jen ŝi eksentis grandan scivolon ekscii, kio estas kaŝita malantaŭ ĝi, kaj ŝi parolis al la anĝeletoj: „Tute malfermi mi ne volas ilin kaj mi ankaŭ ne volas eniri, sed mi volas malŝlosi ilin, por ke ni povu iom rigardi tra la fendo.“

„Ho ne“, diris la anĝeletoj, tio estus peko, Virgulino Maria malpermesis tion, kaj facile ĝi povus fariĝi via malfeliĉo.“

Jen ŝi silentis, sed la scivolego en ŝia koro ne silentis, sed ronĝis kaj pikadis fervore je ĝi kaj ne lasis pacon al ŝi. Kaj kiam ĉiuj anĝeletoj foje eliris, ŝi pensis: „Nun mi estas tute sola kaj povus enrigardi, ja neniu ekscios ion, se mi faros tion.“ Ŝi elserĉis la ŝlosilon, kaj kiam ŝi tenis ĝin enmane, ŝi ankaŭ metis ĝin en la seruron, kaj kiam ĝi estis en ĝi, ŝi ankaŭ turnis ĝin. Jen la pordo salte malfermiĝis kaj ŝi vidis tie sidi Sanktan Triunuon en brilo kaj gloro. Ŝi staris dum kelke da tempo kaj rigardis ĉion kun miro, poste ŝi iom tuŝis per fingro la brilon, jen la fingro fariĝis tute ora. Sed baldaŭ ŝi eksentis grandegan timon, klake fermis la pordon kaj forkuris. Kaj la timo ankaŭ ne plu volis retiriĝi, ĝi povis komenci ion ajn, sed la koro frapis plu seninterrompe kaj ne volis trankviliĝi; ankaŭ la oro kroĉis sin plu je la fingro kaj ne lasis deigi sin, egale kiom forte ŝi lavadis kaj frotadis ĝin.

Ne daŭris longan tempon, ĝis kiam Virgulino Maria revenis de sia vojaĝo. Ŝi vokis la knabinon al si kaj repostulis de ŝi la ĉielajn ŝlosilojn. Kiam la knabino etendis la ŝlosilfaskon al ŝi, Virgulino Maria rigardis ŝiajn okulojn kaj parolis: „Ĉu vi malfermis la dektrian pordon?“

„Ne“, respondis la knabino.

Jen Virgulino Maria permane tuŝis ŝian koron, sentis kiel ĝi frapas kaj frapas, kaj rimarkis do, ke ŝi ne atentis ŝian malpermeson kaj malfermis la pordon. Ŝi parolis ankoraŭfoje: „Ĉu vi certe ne faris?“

„Ne“, diris la knabino duan fojon.

Jen Virgulino Maria ekvidis la fíngron, kiu fariĝis ora pro la tuŝo de la ĉiela brilego, ŝi do vidis, ke ŝi pekis kaj parolis trian fojon: „Ĉu vi ne faris?“

„Ne“, diris la knabino je tria fojo. Jen parolis Virgulino Maria: „Vi ne obeis min kaj aldone eĉ mensogis, vi ne plu meritas esti en la ĉielo.“

Tiam la knabino profunde endormiĝis kaj, kiam ŝi vekigis, ŝi kuŝis malsupre sur la tero, meze de sovaĝejo. Ŝi volis voki, sed ŝi ne povis eligi sonon. Ŝi eksaltis kaj volis forkuri, sed kien ajn ŝi turniĝis, ĉiam retenis ŝin densaj dornaj heĝoj, kiujn ŝi ne povis trarompi. En la tristejo, en kiun ŝi estis enfermita, staris maljuna kava arbo, tiu fariĝis ŝia loĝejo. Ŝi rampis en la arbon, kiam venis la nokto kaj dormis en ĝi; kaj kiam ŝtormis kaj pluis, la arbo protektis ŝin. Sed tia vivo estis mizera, kaj kiam ŝi pensis pri tio, kiel bonfartiga estis la ĉielo kaj, kiel la anĝeloj ludis kun ŝi, ŝi ploris

kordissire. Radikoj kaj arbaraj beroj estis ŝia ununura nutraĵo, ŝi serĉis ilin ĉie, kien ŝi povis moviĝi. Dum la aŭtuno ŝi kolektis la falintajn nuksojn kaj foliojn kaj portis ilin en la kavaĵon. La nuksoj estis ŝia nutraĵo dum la vintro, kaj se venis neĝo kaj glacio, ŝi rampis kiel kompatinda besteto inter la foliojn, por ke ŝi ne tremu pro frostoj. Ne daŭris longan tempon, ĝis kiam disŝiriĝis ŝiaj vestoj kaj falis pecon post peco de ŝia korpo. Tuj kiam la suno denove radiis varme, ŝi eliris kaj sidiĝis antaŭ la arbon kaj ŝia longa hararo kovris ĝin de ĉiuj flankoj kiel mantelo. Tiel ŝi sidis jaron post jaro kaj sentis la mizeron de l' mondo.

Foje, kiam la arboj denove freŝe verdis, ĉasis la reĝo de la lando bestojn en la arbaro kaj persekutis kapreolon, kaj ĉar ĝi fuĝis en la arbustaron, kiu ĉirkaŭis la arbaran lokon, li deĉevaliĝis, disŝiris la dornoheĝon kaj trabatis vojon per sia glavo. Fine trafenitinte, li vidis sub arbo mirinde belan knabinon, kiu sidis tie kaj estis kovrata de sia ora hararo ĝis la piedpintoj. Li staris kviete kaj rigardis ŝin plena de miro, poste li parolis al ŝi: „Kiu vi estas, kial vi sidas ĉi tie en tiu trista loko?“

Sed ŝi ne respondis, ĉar ŝi ne povis malfermi sian buŝon por paroli. La reĝo daŭrigis la parolon: „Ĉu vi volas iri kun mi en mian kastelon?“

Jen ŝi nur iom kapjesis. La reĝo prenis ŝin surbraken, levis ŝin sur sian ĉevalon kaj rajdis kun ŝi hejmen. Kaj alveninte en la reĝan kastelon, li ordonis vesti ŝin per belaj vestoj kaj abunde donis al ŝi ĉion ajn. Kaj kvankam ŝi ne povis paroli, ŝi estis tamen ĉarma kaj bela, tiel, ke li elkore enamiĝis al ŝi, kaj ne daŭris longa tempo, ĝis kiam li edzinigis ŝin.

Kiam pasis ĉirkaŭ jaro, la reĝino naskis filon. Poste en la nokto, kiam ŝi kuŝis sola en sia lito, aperis Virgulino Maria kaj parolis: „Se vi diros la veron kaj koncedos, ke vi malŝlosis la malpermesitan pordon, mi malfermos vian buŝon kaj redonos al vi la kapablon paroli. Sed, se vi obstinas peki kaj neos ĝin insiste, mi kunprenos vian novnaskitan infanon.“

Jen do estis donita al la reĝino la kapablo respondi, sed ŝi restis rigide malcedema kaj parolis: „Ne, mi ne malfermis la malpermesitan pordon.“ Tial Virgulino Maria prenis la novnaskitan infanon el ŝiaj brakoj kaj malaperis kun ĝi.

Je la alia mateno, kiam la infano ne troveblis, ĉirkaŭiris onidira murmurado de la homoj, ke la reĝino estas hommanĝulino kaj murdis sian propran infanon. Ŝi aŭdis ĉion ĉi kaj ne povis diri ion kontraŭ tio. Sed la reĝo ne volis akcepti tion, ĉar li tre amis ŝin.

Post jaro naskis la reĝino denove filon. En la nokto ankaŭ Virgulino Maria denove envenis kaj parolis: „Se vi koncedos, ke vi malfermis la malpermesitan pordon, mi redonos al vi vian infanon kaj malblokiĝos vian langon, sed se vi kroĉos vin al la peko kaj neos ĝin, mi kunprenos ankaŭ tiun ĉi novnaskitan infanon.“

Jen la reĝidino denove parolis: „Ne, mi ne malfermis la malpermesitan

pardon.“ Tial Virgulino Maria forprenis la infanon el ŝiaj brakoj kun si en la ĉielon. Je la mateno, kiam ankaŭ tiu infano estis malaperinta, diris la homoj tute laŭte, ke la reĝino voris ĝin. Kaj la konsilistoj de la reĝo postulis, ke oni ekzekutu ŝin. Sed la reĝo tiom amis ŝin, ke li ne povis akcepti tion kaj li ordonis al la konsilistoj, minacante ilin per korpo- aŭ mortopuno, ne plu paroli pri tio.

En la sekva jaro naskis la reĝino belan filineton, jen nokte trian fojon aperis Virgulino Maria kaj parolis: „Sekvu min.“ Ŝi prenis ŝin ĉemane kaj kondukis ŝin en la ĉielon kaj montris al ŝi tie ŝiajn pli aĝajn infanojn, ili ridis al ŝi kaj ludis per la mondoglobo. Kiam la reĝino ĝojis pri tio, parolis Virgulino Maria: „Ĉu via koro ankoraŭ nun ne moliĝis? Se vi koncedos, ke vi malfermis la malpermesitan pardonon, mi pretos redoni al vi viajn du filojn.“ Sed la reĝino respondis trian fojon: „Ne, mi ne malfermis la malpermesitan pardonon.“

Jen Virgulino Maria lasis sinki ŝin denove al la tero kaj forprenis ankaŭ ŝian trian infanon.

Je la sekva mateno, kiam ĝi diskoniĝis, vokis ĉiuj homoj laŭte: „La reĝino estas hommanĝulino, oni devos kondamni ŝin.“

Kaj la reĝo ne plu povis rifuzi la konsilistojn. Oni procesis kontraŭ ŝi, kaj ĉar ŝi ne povis respondi kaj ne defendi sin per vortoj, oni kondamnis ŝin morti sur la ŝtiparo. Oni kunkolektis la lignon, kaj kiam ŝi estis firmligita al fosto kaj la fajro ĉirkaŭe komencis bruli, jen degelis la firma glacio de ŝia fiero kaj ŝia koro ekmoviĝis pro pento. Kaj ŝi pensis: „Aĥ, se mi ankoraŭ povus koncedi antaŭ mia morto, ke mi malŝlosis la pardonon.“ Jen ŝi subite rehavis dum momento sian voĉon kaj laŭte povis voki: „Jes, Maria, mi faris tion!“ Kaj tuj el la ĉielo komencis plui kaj la pluvo estingis la flamojn kaj super ŝi trarompigis lumo kaj Virgulino Maria ŝvebis malsupren kaj havis la du filojn ĉe siaj flankoj kaj la novnaskitan filineton surbrake. Ŝi parolis afable al ŝi: „Al tiu, kiu pentis sian pekon kaj koncedis ĝin, estu pardonita.“ Kaj ŝi transdonis al ŝi ties tri infanojn, malblokis ŝian langon kaj havigis al ŝi fortunon dum ŝia tuta estonteca vivo.

Originalo: Marienkind

Fonto: Jakobo kaj Vilhelmo Grimm: Infan-kaj domfabeloj, Eldono lastmana, eldonejo Reclam

Fabelo pri iu, kiu migradis por lerni timi

Patro havis du filojn, la pli aĝa estis prudenta kaj saĝa kaj sciis kiel konduki en ĉiu situacio. Sed la pli juna estis stulta, li ne povis kompreni kaj lerni ion. Kaj kiam la homoj vidis lin, ili diris: „Li fariĝos ŝarĝo por la patro!“

Se oni devis fari ion, tiukaze devis plenumi tion ĉiam la pli aĝa. Sed, se la patro ordonis al li alporti ion ankoraŭ malfrue aŭ eĉ en la nokto, kaj la vojo etendiĝis parte preter preĝeja tombejo aŭ tra alia timiga loko, li respondis kutime: „Aĥ, ne, patro, tien mi ne iros, mi tremas pro timo!“ Kiam vespere ĉe la bivakfajro oni interŝanĝis rakontojn, kiuj anserhaŭtigis onin, la aŭskultantoj diris kelkfoje: „Aĥ, mi tiom timas!“



La pli juna sidis en angulo kaj aŭskultis tion, sed li ne povis kompreni, kion tio signifas. „Ĉiam oni diras, ke oni tiom timas, ke oni timas tiom! Sed min timigas nenio. Ankaŭ tio estas certe arto, kiun mi tute ne komprenas.“

Iam okazis, ke la patro parolis al li: „Aŭskultu, filo, tie en la angulo. Vi fariĝas granda kaj forta, tial vi ankaŭ devos lerni ion, per kio vi povos pagi vian panon. Ĉu vi rimarkas, kiel via frato

penegas? Sed je vi miaj penoj montriĝis vane.

„Nu, patro“, li respondis, „mi volonte lernus ion, se tio estas ebla. Tiel mi volus lerni timi, pri tio mi komprenas ankoraŭ tute nenion.“

La pli aĝa ridis, kiam li aŭskultis tion kaj li pensis: „Dio mia, kia ŝtipkapulo estas mia frato, li estos sentaŭgulo dum sia tuta vivo, kurbigu frue hoko laŭ bezonoj de la loko.“

La patro ĝemis kaj respondis: „La timon vi ja ankoraŭ lernos, sed vian panon vi ne pagos per tio.“

Baldaŭ poste vizitis la preĝeja servisto la familion. Jen la patro lamentis pri sia vivo, li rakontis, ke lia pli juna filo pri ĉio estas tiel mallerta, ĉar li scias nenion kaj ne lernas ion. „Imagu, kiam mi demandis lin, per kio li intencos pagi sian panon, li efektive postulis lerni timi.“

„Se estas nur tio“, respondis la preĝeja servisto, „tion li lernos ĉe mi, sendu lin do al mi, mi ja kvazaŭ forrabotos lian kapricon.“

La patro estis kontenta, ĉar li pensis: „Iom li ja stucos la flugilojn de la knabo.“

La preĝeja servisto do prenis lin en la domon kaj li devis sonorigadi la sonorilon. Post kelkaj tagoj li vekis lin je noktomezo, ellitigis lin kaj ordonis, ke li grimpu en la preĝeja turo supren kaj sonorigu la sonorilon. „Vi ja lernos timi“, li pensis, iris sekrete antaŭe supren, kaj kiam la knabo estis supre kaj turnis sin kaj volis manpreni

la sonorilan ŝnuron, li vidis stari sur la ŝtuparo ĉe la sonortruo, blankan figuron.

„Kiu estas tie?“ li vokis, sed la figuro ne respondis, ne ekŝanceliĝis kaj ne moviĝis. „Respondu“, vokis la junulo, „aŭ tuj foriĝu, vi nokte ĉi tie havas nenion por fari.“ Sed la preĝeja servisto restis senmova, por ke la junulo pensu, ke li estas fantomo. La junulo vokis duan fojon: „Kion vi celas ĉi tie? Parolu, se vi estas honestulo, aŭ mi ĵetos vin sur la ŝtuparo malsupren.“

La preĝeja servisto pensis, ke li ne faros tion efektive, li ne eligis sonon kaj staris kvazaŭ ŝtonigita. Jen la junulo vokis trian fojon al li, kaj kiam ankaŭ tio estis vana, li kuris al li kaj puŝis la fantomon tiel, ke ĝi falis dek ŝtupojn malsupren kaj sternis sin en angulo. Poste li sonorigis la sonorilon, iris hejmen, enlitiĝis sen diri eĉ vorton kaj tuj ekdormis. La edzino de la preĝeja servisto atendis sian edzon dum longa tempo, sed li ne revenis. Fine ŝi ektimis, ŝi vekis la junulon kaj demandis: „Ĉu vi ne scias, kie estas mia edzo? Li grimpis antaŭ vi en la turo supren.“

„Ne“, respondis la junulo, „sed tie staris iu aliflanke ĉe la sonortruo sur la ŝtuparo, kaj ĉar li ne respondis kaj ankaŭ ne volis foriri, mi pensis, ke li estas fripono kaj malsuprenpuŝis lin. Iru do tien, kaj rigardu, ĉu estas li. Tion mi bedaŭrus.“

La ulino forsaltis kaj trovis sian edzon, kiu kuŝis en angulo kaj lamentis, ke rompiĝis unu el liaj kruroj.

Ŝi portis lin malsupren kaj rapidis poste kun laŭta kriadio al la patro de la junulo. „Via knabo“, ŝi vokis, „kaŭzis grandan malfeliĉon, mian edzon li ĵetis surŝtupare malsupren, tiel, ke rompiĝis unu el ties kruroj. Forkonduku la sentaŭgulon el nia domo.“

La patro ektimis, kuris al la knabo kaj insultis lin: „Kia sendia bubajo, tion certe la diablo flustris al vi.“

„Patro“, li respondis, „aŭskultu min, mi estas tute senkulpa. Li staris tie en la nokto kiel iu, kiu intencas fari malbonon. Mi ne sciis, kiu li estas kaj mi avertis lin trifoje, ke li parolu aŭ foriru.“

„Ah“, diris la patro, „kun vi mi travivas nur malfeliĉon, foriru de miaj okuloj, mi ne plu volas vidi vin.“

„Jes, patro, tre volonte, atendu nur ĝis mateniĝos, tiam mi ekiros kaj lernos timi, tiel mi ja komprenos arton, kiu povos nutri min.“

„Lernu laŭplaĉe tion, kion vi volas“ diris la patro, „al mi ĉio estas indiferenta. Jen kvindek talerojn, kun ili iru en la vastan mondon kaj diru al neniuj, de kie vi venis, kaj kiu estas via patro, mi devus honti pro vi.“

„Jes, patro, estu tiel, kiel vi deziras, se vi ne postulos pli, tion mi povos memorteni facile.“

Kiam nun la mateno komenciĝis, la junulo metis siajn kvindek talerojn en poŝon, iris eksteren sur la grandan vojjon kaj ĉiam parolis al si mem: „Ah, se mi povus timi!

Aĥ! Se mi povus timi!“

Jen proksimiĝis viro, kiu aŭdis la monologon de la junulo, kaj kiam ili forpaŝis tiom, ke oni povis vidi la pendumilon, diris la viro al li: „Rigardu, tie estas la arbo, kie sep uloj edzinigis la filin-on de la ŝnurfaristo kaj nun ili lernas flugi. Sidigu sub ĝin kaj atendu la nokton, tiukaze vi ja lernos timi.“

„Se tio estas ĉio, kio necesas“, respondis la junulo, „tiukaze tio estas facile farebla; kaj, se mi lernos timi rapide, vi ricevu miajn kvindek talerojn. Venu morgaŭ matene denove al mi.“

La junulo do iris al la pendumilo, sidigis sin sub ĝin kaj atendis ĝis vespero. Kaj ĉar li frostotremis, li bruligis fajron, sed nokte la vento blovis tiom malvarme, ke li ne povis varmigi sin spite al la fajro. Kaj kiam la vento kunpuŝigis la pendumitojn, tiel, ke ili moviĝis tien kaj tien, li pensis: „Mi frostotremas malsupre ĉe la fajro, sed ili eble tie supre frostotremas kaj baraktiĝas eĉ multe pli.“

Kaj ĉar li havis kompaton, li starigis eskalon, grimpis sur ĝi supren, malligis unu pendumiton post la alia, kaj portis la sep ulojn malsupren. Poste li incitis la fajron, blovis, kaj sidigis la pendumitojn ĉirkaŭe, por ke ili varmiĝu. Sed ili sidis tie kaj ne moviĝis, kaj la fajro ekbruligis iliajn vestojn. Li diris: „Gardu vin, alie mi rependumigos vin.“

Sed la mortintoj ne aŭdis lin, ili silentis, kaj lasis bruli siajn ĉifonojn. Jen la junulo ekkoleris kaj diris: „Se vi ne volas gardi vin, mi ne povas helpi al vi. Sed mi ne volus bruli kun vi“, kaj tial li rependumis ilin laŭvice. Tiam li sidigis sin al sia fajro kaj endormiĝis, kaj je la sekva mateno la sama viro venis al li por ricevi la kvindek talerojn kaj diris: „Nu, ĉu vi nun scias, kio estas timo?“

„Ne“, li respondis, „pro kio mi sciu tion? Tiuj tie supre tute ne malfermis la buŝon kaj ili estis tiel stultaj, ke ili lasis bruli la malmultajn ĉifonaĉojn sur la korpo.“

Jen la viro ekkomprenis, ke li tute ne ricevos la kvindek talerojn. Li diris forirante: „Kun tia ulo mi ankoraŭ ne konatiĝis.“

Ankaŭ la junulo reiris sur sian vojon kaj denove ripetis al si mem: „Aĥ, se mi povus timi! Aĥ, se mi povus timi!“

Tion aŭdis veturigisto, kiu paŝis post li, kaj li demandis: „Kiu vi estas?“

„Mi ne scias“, respondis la junulo.

La veturigisto daŭrigis: „De kie vi venas?“

„Mi ne scias.“

„Kiu estas via patro?“

„Tion mi ne rajtas diri.“

„Kial vi ĉiam mumuras al vi mem?“

„Ha“, diris la junulo, „mi volus, ke mi timu, sed neniu povas instrui tion al mi.“

„Ĉesu stulte babili“, diris la veturigisto. „Iru kun mi, mi provos havigi tranoktejon

al vi.“

La junulo iris kun la veturigisto. Kaj vespere ili atingis gastejon, kie ili intencis tranokti. Enirante en la ĉambron, la junulo diris denove tute laŭte: „Aĥ, se mi povus timi! Aĥ, se mi povus timi!“ La mastro, aŭdinte tion, ekridis kaj diris: „Se vi avidas tion, tiukaze vi ĉi tie certe havos okazon.“

„Aĥ, silentu“, diris lia edzino, „ĵam multaj kuraĝuloj devis lasi sian vivon, estus plendinde kaj domaĝe pri la belaj okuloj, se ili ne plu ekvidus la lumon de la tago.“ Sed la junulo diris: „Eĉ, se tio estus kiel ajn malfacila, mi ja foje volas lerni tion, tial mi ja foriris hejmen.“

Li ne lasis en paco la gastejstron, ĝis tiu rakontis, ke ne tre malproksime staras malbenita kastelo, kie homo ja povus lerni timi, se li tie pasigos tri noktojn sen dormo. La reĝo, li diris, promesis al tiu, kiu havas la kuraĝon, ricevi ties filinon kiel edzinon, kaj ke ŝi estas la plej bela, kiun iam prilumis la suno. Kaj li diris, ke en la kastelo estas grandaj trezoroj gardataj de malicaj spiritoj; tiuj tiukaze akireblus kaj tiel farus malriĉulon sufiĉe riĉa. Multaj kuraĝuloj laŭ li jam eniris, sed ankoraŭ neniam iu reaperis. La junulo iris je la alia mateno al la reĝo kaj diris: „Se vi permesos, mi pasigos tri noktojn sendorme en la malbenita kastelo.“

La reĝo rigardis lin, kaj ĉar li plaĉis al li, li diris: „Vi povas kunpreni aldone tri aĵojn, sed ili devas esti senvivaj, kaj tiujn vi rajtos kunpreni en la kastelon.“

La junulo do respondis: „Mi petas pri fajro, pri tornilo kaj lignaĵista stablo kun tranĉilo.“

La reĝo ordonis alporti ĉion ĉi en la kastelon, kiam la tago ankoraŭ estis hela. Kiam eknoktiĝis, la junulo iris supren en la kastelon. Li bruligis en ĉambro helan fajron, metis la lignaĵistan stablon kun la tranĉilo apud ĝi kaj sidiĝis sur la tornilo kaj diris: „Aĥ, se mi povus timi! Sed ankaŭ ĉi tie tion mi ne lernos.“ Ĉirkaŭ noktomezo li volis inciti foje la fajron, kaj kiam li blovis, jen subite io kriis el angulo: „Ve, miaŭ! Kia malvarmo!“

„Ŝtipkapuloj“, li vokis, „kial vi krias? Se vi frostotremas, proksimiĝu, sidiĝu al la fajro kaj varmigu vin.“

Apenaŭ li tion diris, proksimiĝis saltigante du grandaj nigraj katoj, sidiĝis ambaŭflanke de li kaj rigardis lin tute sovaĝe per ardantaj okuloj. Post iom da tempo, kiam ili varmigis sin, ili ekparolis: „Kamarado, ĉu ni kartludu?“

„Kial ne“, li respondis, „sed montru foje viajn piedojn!“ Jen ili etendis siajn ungegojn.

„Ha“, li diris, „kiajn longajn ungojn vi havas, atendu, tiujn mi unue devos fortranĉi.“

Tiam li kaptis ilin ĉenuke, levis ilin sur la lignaĵistan stablon kaj firmŝraŭbis iliajn piedojn kaj diris: „Mi rigardis viajn ungegojn, kaj tial mi perdis la emon kartludi kun

vi.“ Li mortbatis la katojn kaj ĵetis ilin eksteren en la akvon. Apenaŭ li silentigis ambaŭ katojn kaj denove volis sidiĝi al la fajro, jen venis el ĉiuj anguloj nigraj katoj kaj nigraj hundoj ligitaj al ardantaj ĉenoj, pli kaj pli el ili, tiel, ke li ne plu povis forpuŝi ilin. Ili kriis terure, paŝadis sur lia fajro, disĵetis ĝin kaj volis estingi la fajron. Tion li rigardis trankvile dum iom da tempo, sed kiam tio fariĝis tro petola al li, li prenis sian stablotranĉilon kaj ekkriis: „For, fia bando!“ Kaj li draste batis ilin. Parto forsaltis, la aliajn li mortbatis kaj ĵetis ilin ekstere en la lagon. Kiam li revenis, li blovante incitis el la fajreroj sian fajron kaj varmigis sin. Kaj kiam li sidis tiel, la okuloj ne volis plu malfermiĝi kaj li deziris dormi. Li ĉirkaŭrigardis kaj vidis en angulo grandan liton. „Tio estas la ĝusta“, li diris kaj enlitiĝis. Sed kiam li volis fermi la okulojn, ekveturis la lito per si mem kaj veturadis en la tuta kastelo. „Bone tiel“, la junulo diris, „sed pli rapide!“ Jen la lito plu veturis trans sojlojn kaj ŝtuparojn, kvazaŭ ĝi estus jungita al ses ĉevaloj, supren kaj malsupren; kaj per unu fojo, hop, hop, ĝi renversiĝis, tiel, ke ĝi kuŝis kiel monto sur li. Sed li forĵetis la litkovrilojn kaj kusenojn flanken, eliĝis kaj diris: „Nu, nun veturu tiu, al kiu plaĉas!“ Li kuŝigis sin ĉe sia fajro kaj dormis ĝis komenciĝis la mateno. Matene venis la reĝo, kaj kiam li vidis lin tie kuŝi sur la planko, li opiniis, ke la fantomoj mortigis lin, kaj ke li estas morta. Tial li ekparolis: „Estas ja domaĝe pri la bela homo.“

Tion aŭdis la junulo, leviĝis kaj diris: „Ankoraŭ mi vivas!“ La reĝo ekmiris, sed ĝojis kaj demandis, kio okazis al li.

„Mi fartas sufiĉe bone“, la junulo respondis, „unu nokto pasis, kaj pasos ankaŭ la du ceteraj.“

Kiam li venis en la gastejon, la mastro tre miris. „Mi ne pensis“, li diris, „ke mi denove vidos vin vivanta. Ĉu vi nun lernis timi?“

„Ne“, li respondis, „ĉio estas vana, se nur iu povus klarigi tion al mi!“

En la dua nokto li iris je plia fojo supren en la malnovan kastelon, sidiĝis ĉe la fajro kaj ripetis sian kanton: „Ah! Se mi povus timi!“ Kiam noktomezo proksimiĝis, aŭdeblis bruo kaj pumpumado, unue malproksime, poste pli kaj pli laŭte, kaj tiam estis kvieto dum iom da tempo, fine kun laŭta kriado iris duono de homo tra la kamentubo kaj falis antaŭ li. „He vi!“ la junulo kriis, „ankoraŭ plia duono apartenas al vi, unu parto estas tro malmulte.“ Tiumomente komenciĝis la bruo denove, muĝis kaj hurlis, kaj ankaŭ la alia duono falis antaŭ li.

„Atendu“, diris la junulo, „unue mi volas ekflamigi la fajron por vi.“ Kiam li faris tion kaj returniĝis, kunis la du partoj kaj terura homo sidis tie sur lia loko. La junulo diris: „Tion ni ne interkonsentis, la benko estas mia.“

La viro volis forŝovi lin, sed la junulo ne cedis kaj forte forpuŝis lin kaj denove sidiĝis sur sia loko. Jen falis eĉ pli da viroj malsupren, unu post la alia. Ili alportis naŭ gambojn de kadavroj kaj du kraniojn, ili starigis la gambojn kaj komencis ludi

keglojn. Ankaŭ la junulo deziris ludi kaj li demandis: „Aŭskultu, ĉu mi povos kunludi?“

„Jes, se vi havas monon!“

„Sufiĉe da mono“, li respondis, „sed viaj kugloj ne estas sufiĉe rondaj.“ Tial li prenis la kadavrajn kraniojn, metis ilin en la tornilon kaj tornis ilin, ĝis ili estis rondaj. „Do, nun ili pli bone ruliĝos“, li diris: „Hola! Nun fariĝos gaje!“ Li kunludis kaj perdis iom de sia mono, sed kiam la horloĝo eksnorigis noktomezon, ĉio malaperis antaŭ liaj okuloj. Li kuŝiĝis kaj trankvile ekdormis. Je la sekva mateno venis la reĝo por informi sin. „Kio ĉifoje okazis al vi?“ li demandis.

„Mi ludis keglojn“, li respondis, „kaj mi perdis kelkajn helerojn.“

„Ĉu vi ne timis?“

„Ho, ne“, li diris. „Mi amuziĝis. Se mi nur scius, kio estas timo.“

En la tria nokto li sidigis denove sur sian benkon kaj diris tute grumble: „Aĥ, se mi povus timi!“

Kiam fariĝis malfrue, venis ses altaj viroj kaj alportis ĉerkon. La junulo diris: „Haha, tiu estas certe mia kuzĉjo, kiu mortis antaŭ kelkaj tagoj“. Li logis lin perfingre kaj vokis: „Venu kuzĉjo, venu!“

Ili metis la ĉerkon sur la plankon. Sed li proksimiĝis al ĝi kaj demetis la kovrilon. Morta viro kuŝis en ĝi. Li pripalpis lian vizaĝon, sed ĝi estis malvarma kiel glacio. „Atendu“, li diris, „mi iom varmigis vin.“ Li iris al la fajro, varmigis manon kaj metis ĝin sur lian vizaĝon, sed la mortinto restis malvarma. Poste li elprenis lin, sidigis lin ĉe la fajro kaj metis lin sur sian sinon. Li frotadis liajn brakojn, por ke la sango denove ekmoviĝu. Sed kiam ankaŭ tio ne helpis, li ekhavis la ideon, ke tiukaze, se kuŝas du homoj en lito, ili varmigas sin reciproke. Li enlitigis kaj kovris lin kaj sternis sin apud li.

Post certa tempo ankaŭ la mortinto fariĝis varma kaj komencis moviĝi. Jen diris la junulo: „Nu, kuzĉjo, se mi vin ne estus varmiginta...!“ Sed la mortinto rektiĝis kaj kriis, ke li sufokas lin permane.

„Kio? Ĉu tio estas la danko? Vi tuj denove estu en via ĉerko.“ Li levis lin, ĵetis lin en la ĉerkon kaj fermis ĝin per la kovrilo. La ses viroj reaperis kaj forportis lin. „Mi ne povas timi, ĉi tie mi neniam lernos timi!“

Tiumomente enpaŝis viro, kiu estis pli alta ol ĉiuj aliaj kaj li aspektis ture; sed li estis maljuna kaj havis longan blankan barbon.

„Ho, fia bubo!“ li kriis, „nun vi baldaŭ lernos, kio estas la timo, ĉar vi mortos.“

„Ne tiel rapide“, respondis la junulo, „se mi mortu, mi devos partopreni.“

„Vin mi ja kaptos“, diris la abomenulo.

„Pli memgardu, pli memgardu, ne tiom fanfaronu, tiel forta kiel vi, ankaŭ mi estas, kaj certe eĉ pli.“

„Tion ni kontrolu“, diris la maljunulo, „se vi estos pli forta ol mi, mi lasos vin foriri; venu, ni provu. Li kondukis lin tra malhelaj koridoroj al forĝista fajro, prenis hakilon kaj per unu bato malaperigis amboson en la tero.

„Similan mi povas fari eĉ pli bone“, diris la junulo. Li iris al la alia amboso. La maljunulo haltis apud li por observi tion, kaj lia blanka barbo pendis super la amboso. Jen la junulo prenis la hakilon, fendigis la amboson per unu bato kaj per tio enpinĉis ankaŭ la barbon de la maljunulo.

„Nun mi kaptis vin“, diris la junulo, „nun estas vico via morti.“

Tiam li levis feran stangon kaj batadis la maljunulon, ĝis tiu hurlete ekĝemis kaj petis, ke li ĉesu tion, promesante al li grandajn riĉojn. La junulo eltiris la hakilon kaj liberigis lin. La maljunulo rekondukis lin en la kastelon kaj montris al li en kelo tri kestojn plenajn de ormoneroj. „El tio“, li diris, „estu parto por la malriĉuloj, alia por la reĝo kaj la tria estu via.“

Dum la horloĝo sonoris dekdufoje, malaperis la spirito. Tial restis la junulo en la malhelo. „Mi ja tamen trovos vojon al ekstere“, li diris, palpis kaj trovis la vojon en la ĉambron kaj endormiĝis tie ĉe sia fajro.

Matene venis la reĝo kaj diris: „Nu, ĉu vi nun lernis timi?“

„Ne“, li respondis, se mi nur sciis tion. Mia morta kuzo ĉeestis kaj barbulo venis, kiu tie malsupre montris al mi multe da mono, sed kio estas timo, tion neniu instruis al mi.“

La reĝo do diris: „Vi malsorĉigis la kastelon kaj tial vi edzinigu mian filinon.“

„Tio ĉi estas tute bone“, li respondis, „sed tamen mi ankoraŭ ne scias, kiel tio estas, se oni timas.“

Poste oni portis la ormonerojn supren kaj festis la geedziĝon. Sed la juna reĝo, kvankam li tre amis sian edzinon kaj tre plezuriĝis, diris ankoraŭ tiam: „Aĥ! Se mi povus timi! Aĥ! Se mi povus timi!“

Tio fine ĉagrenis ŝin.

Ŝia ĉambristino diris: „Mi volas havigi helpojn; li ankoraŭ lernu timi.“ Ŝi iris eksteren al la rivereto, kiu fluis tra la ĝardeno kaj ordonis alporti sitelon plenan de gobioj. Nokte, kiam la juna reĝo dormis, lia edzino devis fortiri lian litkovrilon kaj verŝi la sitelon plenan de malvarma akvo kaj la gobioj sur lin, tiel, ke la fiŝetoj saltadis ĉirkaŭ li. Li vekigis kaj kriis: „Aĥ! Kiel mi timas! Kiel mi timas! Kara edzino! Jes nun mi scias, kio tio estas, se oni timas.“

Originalo: Märchen von einem der auszog, das Fürchten zu lernen

Foto: Jakobo kaj Vilhelmo Grimm: Infan- kaj domfabeloj, Eldono lastmana, eldonejo Reclam

kontrolis Vladimir Türk



elgermanigis Dorothea kaj Hans-Georg Kaiser (Germanio)

Shen Jiji (ĉ.750-800)

La magia kapkuseno

aŭ Songŝo en Handan

En la sepa jaro de Kaiyuan (*kaj-jŭan*)-erao (719 p.K.) estis taoisto Lü (*Lju*), kiu akiris la senmortan arton de feo. Dum sia vojaĝo al Handan li ripozis en malgranda hotelo. Demetinte ĉapon kaj malzoninte rubandojn, li sidis sin apogante al pakaĵo. Tiam venis juna homo Lu, vestita en kruda talivesto, rajdante sur nigra ĉevalo al kamparo, ankaŭ ripozis en la hotelo. Li sidiĝis sur la sama mato kun la taoisto kaj ili ĝoje interbabilis longan tempon. Poste, rigardante al sia ĉifona kaj nepura vestaĵo, Lu ekĝemis vekriante: "Ho, kiel malfeliĉa estas mi, la sortfuŝato!"

"Rigardu vin mem—nun sana, sendolora, kaj ĵus en babilado gaja, kial subite ĝemas pri malfeliĉo?" diris la taoisto.

"Ba, mi nur vegetas! Ĉu tia vegetado ankaŭ indas nomiĝi vivo?" plendis Lu.

"Se tia ne, do kia jes?" demandis la taoisto.

"Por viro, miaopinie," respondis Lu, "la vivo devas esti kun jenaj enhavoj: Krei meritojn, ĝui famon, funkcii kiel generalo aŭ ministro, frandi laŭ nobela stilo, aŭskulti al si plaĉajn muzikojn, fari sian familion kaj klanon prospera kaj riĉa. Nur kompletan da tio mi nomas inda vivo! Iam, mi ankaŭ diligente studis kaj rezultigis erudito rigardante ne tro malfacila sukceson en ŝtata ekzameno. Sed ĝis nun, en matura aĝo, mi ankoraŭ devas okupi min per terkulturo, ĉu mi vivas ne tro malfeliĉa?"

Findirinte, li eksentis sin laca kun pezaĵ palpebroj kaj volis iom dormi. tiam la mastro de hotelo ĝuste estis kuiranta miliojn. La taoisto prenis el sia pakaĵo kapkusenon, transdonis ĝin al Lu kaj diris: "Dormu kun mia kapkuseno kaj realiĝos viaj revoj pri honora kaj feliĉa vivo!"

La kapkuseno estis el blua porcelano, kun aperturoj ĉe ambaŭ ekstretoj. Kiam Lu klinis sin al ĝi, li trovis ke la aperturoj iom post iom pli grandiĝis kaj heliĝis. Lu stariĝis, eniris tra la aperturo kaj—jam venis al sia hejmo.

Post monatoj, Lu edzinigis al si tre belan fraŭlinon el nobla Cui (*ĉuj*)-familio de Qinghe (*ĉinghe*), kun pli abunda riĉaĵo. Lu ekstazis. De tiam liaj vestoj kaj veturiloj ŝanĝiĝis pli kaj pli luksaj.

La sekvantan jaron, Lu estis rekomendita kiel kvalifikita kandidato por la metropola ekzameno kaj, sukcese trapasinte la nomitan ekzamenon li estis la unuan fojon nomumita kiel ŝtatoficisto en la kortega sekretariato. Poste, li partoprenis ankaŭ en la speciala kortega ekzameno kaj estis promociita al kapitano de Weinan

(vejnan). Post nelonge, transpostenigita al inspektoro, imperiestra kronikisto, kaj pli poste, sekretario por preparo de imperiestra ediktoj.

Tiel forpasis tri jaroj. Li funkciis sinsekve kiel prefekto de Tongzhou (tongĝou) kaj provincestro de Shaanzhou (*ŝanĝou*). Kun ambicio je akvutiligo, Lu konstruigis ekde Shaanxi (*ŝansi*) kanalon je 80 lioj longan, kiu alportis grandan favoron al la loĝantoj kaj la lokanoj starigis ŝtonan monumenton honore je lia merito. Tiam li estis transpostenigita kiel provincestro de Bianzhou (*bjanĝou*), samtempe kontrolisto super Henan-kantono, kaj fine kiel estro de la ĉefurbo.

Tiun jaron, la imperiestro lanĉis militon kontraŭ la sovaĝaj nomadoj Rong (*ĵong*) kaj Di por pliampleksigi teritorion. Profitante la ŝancon, la militestroj Simolo de Turfan kaj Mangbuĝi de Zhulong (*ĝulong*) faligis fortresurbojn Guazhou (*ĝuaĝou*) kaj Shazhou (*ŝaĝou*), mortigis la armeestron Wang Junhuang (*vang ĝunhuang*), kio sensacie skuis la imperion. La imperiestro ekmemoris pri la komanda talento de Lu kaj komisiis lin ĉefinspektoro kaj armeestro de Hexi (*heŝi*)-kantono. En decidiga batalo Lu gajnis brilan venkon, falĉinte sep mil kapojn de malamikoj, kaj militakiris naŭcent liojn da teritorio. Li konstruigis tri grandajn muregojn por gardi la limojn. Kaj la lokaj popolanoj starigis monumenton sur Juyan (*ĝujan*)-monto por laŭdi lian meriton. Lu revenis al la Kortego por ricevi lordtitolon en soleno ekstreme impona. De posteno de la vicministro de Ministerio pri Mandarenaj Aferoj li promociiĝis al tiu de la ministro de Civilaj Aferoj kaj estro de la Imperia Centra Inspektejo. Lu ĝuis grandan reputacion kaj bonan famon tiel en Kortego kiel inter popolanoj, sed lin enviis la tiam funkciaĵa premiero, kiu do disvastigis fifamojn por kalumnii Lu, tiel ke Lu estis malpromociita kiel prefekto de Duanzhou (*duaĝou*). Post tri jaroj li tamen estis revokita al la kortego kaj komisiita kiel imperiestra konsilanto. Post nelonge, Lu fariĝis premiero en la Imperia Konsilio kaj dum pli ol dek jaroj administris la ŝtatajn aferojn kune kun la maldekstra kaj dekstra ĉefministroj Xiao (*ŝjau*) Song kaj Pei Guangting (*pej ĝuangting*). Okazis eĉ, ke dum unu tago li ricevis trifoje de la imperiestro konfidencajn dekretojn, kaj li ĉiam asistis la imperiestron per prudentaj konsiloj. Konsekvence li ĝuis la famon kiel saĝa premiero. Sed la ceteraj korteganoj pro envio lin insidis, denuncante ke li kovis uzurp-intrigon en koluzio kun militaristoj limgarnizonantaj. Tial la imperiestro severe ordonis ke Lu estu enkarcerigita por speciala juĝado. Kiam la kapitano kun gvardistoj urĝe venis al lia domo por lin aresti. Lu en granda konsterniĝo diris al siaj edzino kaj filoj:

"En nia hejmloko oriente de Huashan (*huaŝan*)-monto, ni ja havis kvincent muojn da fekunda agraro, kiuj sufiĉis por nin bone vivteni kaj for de malsato, kaj for de malvarmo, por kio do mi ankoraŭ penis ĉasi la honoron? Nun, falinte en ĉi tian malfeliĉon, mi eĉ ne povas reakiri la malnovan vivon ke mi vestita en kruda talivesto, rajdante sur nigra ĉevalo, senĝene vojaĝis sur vojo de Handan. Ho ve!"

Lu ekprenis spadon por sinmortigo, sed lia edzino malhelpis lin fari tion.

Ĉiuj implikitoj de la kazo estis ekzekutitaj, escepte nur de Lu savita dank' al protekto de iu eĉnuko.

Anstataŭe li estis ekzilita al Huanzhou (*hǔanĝōu*).

Post kelkaj jaroj, la imperiestro konsciis ke Lu estis maljuste verdiktita, li redonis al Lu la malkondamnito, postenon de premiero kaj honora rango de Yanguo (*jangŭo*)-duko kun multe da neordinaraj favoroj.

Al Lu naskiĝis kvin filoj, nome: Jian (*ĝjan*), Chuan (*ĉŭan*), Wei (*vej*), Ti kaj Yi (*ji*), ĉiuj talentaj. El ili la plej aĝa, Jian, sukcese trapasis la metropolan ekzamenon kaj estis nomumita kiel vicburoestro de la Ministerio pri Mandarenaj Aferoj. La dua, Chuan, funkciis kiel prokuroro. La tri, Wei, kiel respondeculo de la Imperia Kapelo. La kvara, Ti, kiel kapitano de Wannian (*vannĵian*), kaj Yi, la plej distingiĝa, fariĝis la maldekstra konsilanto jam en sia 28-a jaraĝo. Ili edzinigis al si fraŭlinojn senescepte el la plej famaj kaj noblaj familioj. Nepoj nombriĝis pli ol dek.

Lu travivis multon: dufoje ekzilojn al malproksimaj sovaĝejoj; eksteratenditan revenon al Kortego; malsamajn vivojn jen en la metropolo, jen en la limregionoj; honorajn funkciojn de inspektoro kaj premiero; kun altrangula impono dum pli ol 50 jaroj. Lu ankaŭ estis disipema kaj ĝuema homo. Ĉiuj kantistinoj kaj dancistinoj en lia domo senescepte estis la plej belaj tra la lando. Al li premidonaciĝis sennombre da fekundaj bienoj, imponaj domegoj, belaj knabinoj kaj famaj ĉevaloj.

En sia oldaĝo Lu iom post iom fariĝis malforta. Plurfoje li petis forpermeson por emeritiĝo, sed ĉiufoje la imperiestro malkonsentis. Fine, li malsaniĝis. Tiam la senditoj de la imperiestro vizitadis lian hejmon unuj post aliaj seninterrompe por informiĝi pri lia sanstato, kaj lin kuracis la plej eminentaj doktoroj kaj la plej bonaj medikamentoj, sed vane. Sentante la alproksimiĝon de sia morto, Lu sendis al la imperiestro skribaĵon:

"Mi estis banala instruitulo en Shandong (*ŝandong*), origine sin okupis per terkulturado. Hazarda fortuna vicigis min inter viaj korteganoj kaj vi favoris min per tro multe da promocioj, ke mi funkciis sinsekve kiel arneestro kaj premiero dum multaj jaroj. Mi bone konsciis ke mi vere ne indas tion!

Tiel, kun ĉiama maltrankvilo en koro, mi eĉ ne rimarkis la alvenon de mia maljuneco. Nun, mi aĝas jam pli ol 80 jarojn, travivinte la honoron de premiero. Mankas al mi jam tempo kaj kadukiĝas al mi kaj korpo kaj energio. En mia lastaj horoj mi havas nenion por rekompenci vian grandan favoron. Adiaŭante al via sankta epoko mi vere sentas senfinan sopiron kaj per tio ĉi esperimas mian profundan dankon."

En la imperia edikto la imperiestro respondis:

"Dank' al via bonvirto vi fariĝis mia ĉefministro. Vi funkciis landlime kiel brava ĉefgeneralo kaj kortege kiel saĝa ĉefkonsilano. Dank' al via bona servo en nia imperio regis prospero kaj paco dum du dekduoj da jaroj. Mi ja esperis ke tagon post tago vi resaniĝos, sed ne atendis ke la grava malsano tiel senkompatite turmentas vin. Nun mi sendas la Grandan Piaoji (*pjkaŭĝi*)-generalon Gao Lishi (*gaŭ liŝi*) por pridemandi vian farton. Do, prenu kuracon kaj zorgu vian sanon por mi, kiu ankoraŭ forte esperas ke vi povus resaniĝi eĉ sen helpo de medicinaĵoj."

En tiu nokto Lu mortis.



...sin etdante, la juna Lu vekigis el la sonĝo. Tiam li vidis ke li mem ankoraŭ kuŝis en la sama hotelo, kun la sama taoisto ankoraŭ sidanta apude, kaj en kaldrono de la hotelmastro la milioj eĉ ankoraŭ ne elkuirigis, resume, ĉio restis ankoraŭ la sama kiel antaŭ lia sonĝo. Lu ekstaris kaj demandis kun miro:

"Ĉu ĉio ĉi tio estas nur sonĝo?"

"Jes, kaj same ankaŭ tio, kion vi nomas inda vivo," respondis la taoisto.

Lu dronis en meditado longan tempon. Poste, li diris kun danko al la taoisto:

"Ho, finfine mi komprenas pri la deveno de honoro kaj malhonoro, la ŝanco de fortuna kaj malfeliĉo, la leĝo de akiro kaj perdo, la sekreto de vivo kaj morto. Jen vi, mia instruisto, per tio forigis de mi avidojn pri vantaĵoj. Mi nepre ne forgesu vian instruon!"

Lu profunde riverencis refoje kaj foriris.



elĉinigis **Guozhu** (Ĉinio)

Liang Xiaosheng (1949-)



aŭtoro, Liang Xiaosheng

Sekvatage mi malsaniĝis. Tiel forte febranta, en pluraj tagnoktoj, mi dormis kun la vestoj sur mi, envolvita en vataĵon kaj buligita sur mato sterniĝanta sur cementa planko.

Tiun tagon, kiam la febro cedis, mi vidis la mornan kaj belan vizaĝon de knabino kiu min rigardis. Mi sciis, ke ŝi flegis min, dum mi restis en malsaneco, kaj kiam mi vidis la ruĝan brakbendon kiun ŝi portis, mi eksentis intimecon ĉe ŝi.

Mi diris: “Dankon, franjo!”

Aspekte, ŝi estis pli aĝa ol mi je du aŭ tri jaroj.

Sur ŝia vizaĝo emergis rideto subtila kaj hezita.

Ŝi demandis: “Kial vi sola venas de la nordo por fari ‘kontakton’ en la sudo?”

Mi diris al ŝi, ke mi volas tie kontakti neniun, kaj ke mi sopiras al mia patro, ĉar li laboras en Leshan (leŝan) kaj mi ne vidis lin dum multaj jaroj. Mi konfidis al ŝi sendon de telegramo al mia patro, petante ke li venu por min akcepti.

En la sekvanta tago mi penis leviĝi, ĉar ŝi denove min vizitis. Ŝi transdonis al mi la respondon de mia patro: Rapide revenu al Harbino.

Malesperante ĝiskulmine, mi ploris.

Ŝi konsolis min: “Vi devas aŭskulti vian patron kaj ne maltrankviligu lin por vi.

Nun en Leshan okazas armita interbatalado³. Estas tumultege!”

Tiam mi ektrovis, ke ŝi portas ne ruĝan brakbendon, sed nigran.

Mi diris: “Kiel mi revenas? Mi havas nur kelkdekajn cendojn!”

Kvankam estas senpage veturi trajne, tamen la milkilometra vojo postulas iom da elspezo.

Hezitante momenton, ŝi malrapide etendis sian manon en poŝon kaj poste eltiris kvin juanojn. Ŝi honte diris: “Mi estas studento de tiu ĉi lernejo kaj ido de la ‘nigraj

Perdita pampelmuso

En la periodo de “Granda Kontakto¹”, de Harbino mi venis al Chengdu kaj tie loĝis en meteorologia lernejo, kiam mi aĝis dek sep jarojn. Tio estis unuafoje, ke mi sola faris longan vojaĝon, nur danke al brakbendo de “Ruĝa Gvardio²”, kiel amuleto.

kvin kategorioj⁴”. Mia patro ĵus forpasis. Ĉiumonate mi havas nur naŭ juanojn por vivtenado. Nu kvin juanoj, akceptu ilin!” Ŝi enmanigis la monon al mi kaj, preninte balaŭdon, iris purigi necesejon.

Sekvatage, kiam mi pretis foriri, ŝi venis por min akompani. Ĉe la pordo de la lernejo ŝi haltis kaj flustris: “Mi povas vin akompani ĝis ĉi tie, ili malpermesas al mi transiri la pordon.” Ŝi prenis pampelmuson el sia librosako kaj donis al mi: “Survoje kun ĝi, kiu povas valori unu kruĉon da akvo.”

En la aero fluis la aromo de pampelmuso. Mi parolis: “Franjo, donu al mi vian adreson!”

Ŝi fiksas rigardon sur min dum minuto, murmurante: “Ĉu vi povus leteri al mi?”

Mi diris: “Jes!”

Ŝi tiom ĝojis, ke ŝi deŝiris de sia notlibro unu folion kaj serioze skribis sur ĝi adreson. Kiam ŝi donis ĝin al mi, ŝi diris: “Ĉu ne estas skulptaĵo de cigno en Harbino? Ĉu vi ne volas esti tiel afabla kaj foti vin antaŭ la skulptaĵo kaj sendi la foton al mi?”

Mi kapjesis senvorte. Foririnte jam malproksime, mi turnis min kaj vidis, ke ŝi ankoraŭ staras tie gapante kaj akompanante min per la okuloj.

Survoje, mi ne havis trinkakvon, tiel ke mia buŝo sekiĝis kaj fendetiĝis, sed mi ne volis manĝi la pampelmuson. Ĉe la interŝanĝo de trajno ĝi estis ŝtelita.

En la dua tago post mia reveno al Harbino, mi iris fari foton ĉe la bordo de la rivero Songhuajiang (songhūāĝiang), sed la statuo de cigno jam estis detruita. Ĉie estis pecetoj de la statuo. Ĉiu peco kvazaŭ estis vivanta kaj sanganta.

Mi ne volis, ke ŝi sciu ke la cigna statuo estas detruita, do mi ne skribis al ŝi...

Pasintjare, mi aŭdis, ke en Harbino oni refaris skulptaĵon de cigno, kaj sekve mi speciale iris al Harbino kaj faris koloran foton apud la skulptaĵo. Laŭ la adreso sur la folio jam flaviĝinta mi sendis leteron kun la foto al la fratino, kiu gravuriĝis sur mia koro. La letero estis resendita. Sur la koverto estis krudaj vortoj skribitaj per globokrajono: “Kontrolite, ne estas tiu homo”.

Kie ŝi estas?

Kiam mi memoris, ke tiom da miaj samaĝuloj “malaperis” en la tohuvabohuo de la dekjara Kultura Revolucio, mian koron aflikto ekkaptis.

notoj:

1) “Granda Kontakto” estas laŭlitera traduko de 大串联, kiu okazis en 1966. Tiam diverslokaj universitatoj kaj mezlernejoj (kiuj estis nomataj “ruĝaj gvardianoj”) iris al Pekino por tie kontakte interŝanĝi revoluciajn spertojn kun pekinaj studentoj kaj gimnazianoj, kiuj samcele vojaĝis en aliaj lokoj. Ilia veturo, manĝo, loĝo, ĉiu estis senpaga.

2) “Ruĝa Gvardio” (红卫兵) estis popolamasa organizaĵo el universitatoj kaj mezlernejoj, kiuj kutime portis ruĝan brakbendon. Kun ĝi ili havis povon frakasi

ĉiajn kontraŭrevoluciajn objektojn (ekz. la statuon de cigno en tiu ĉi rakonto) kaj eĉ personojn (ekz. la fratinojn, kiu devenis de la “nigraj kvin kategorioj”).

3) Armita interbatalado (武斗) estis tutlanda armita konflikto inter malsamaj organizaĵoj, fakte inter ribeluloj kaj konservativuloj, en la komencaj jaroj de la Kultura Revolucio (1966-1976).

4) Tiujn homojn, kiuj estis bienuloj, riĉaj kamparanoj, kontraŭrevoluciuloj, malbonuloj kaj dekstruloj, oni nomis ĝenerale “nigraj kvin kategorioj”(黑五类) dum la Kultura Revolucio.



tradukinto, Minosun (Ĉinio)

Mikronovelo

Ĉu trompisto?

En restoracion eniris homo kun malpura vesto. Li petis de la mastro bovlon da nudeloj. Li diris, ke li perdis la monujon kaj ne povas reiri hejmen, kaj ke nun li sentas teruran malsaton. Sen ajna vorto la mastro iris en la kuirejon kaj alportis bovlon da nudeloj al li. Post kiam li voreme formanĝis nudelojn, la mastro donis al li tricent juanojn. Aliaj klientoj asertis, ke la mastro estas trompita kaj li estas trompisto. La mastro nur diris, ke li ne metis salon en la nudelojn.

Elĉinigis *Herbeto*

Jiang Zilong (1941-)



aŭtoro, Jiang Zilong

Serĉi “ĉapon”

elĉinigi Minosun

Jin Liu estas mirkonfuzita ĉi-momente, kiam, apud la florbedo meze de la granda korto de la eduka buroo, li staras ŝtipe kaj idiote, kiel maljuna velkinta narciso prujnodifektita. Propre li estas tia homo, kia kondutas fleksiĝeme kaj ideomanke, kaj nun li vere volus sin ĵeti morte sur rokon de la florbedo. Ĉiuj dekstruloj en la sama vilaĝo, kiuj, unu post la alia, estis senigitaj je la “ĉapo” (kondamna etikedo) kaj rehabilititaj, revenis al urboj laŭ la plenumita politiko. Restas nur li, pri kiu neniu zorgas. Hodiaŭ li venas al la origina laborejo – la eduka buroo por fari pridemandon. Iu kamarado de la organiza fako, esplorinte arkivojn, konstatas, ke ĉiuj dekstruloj jam estis rehabilititaj kaj revenis al urboj laŭ la politiko kaj en la origina registrolibro de dekstruloj ne estas la nomo de Jin Liu. Nun kiam komence oni ne metis sur lin la ĉapon de dekstrulo, li devas fari nenion alian ol foriri.

“Ho ve! Sendube, tiam oni altrudis al mi la ĉapon de dekstrulo. Alie, kial ili forpelis min en kamparon?”

“Tion ni ne scias. Tiamaj homoj, kiuj persekutis vin, jam ne estas en la eduka buroo.”

De pli ol dudek jaroj, la ĉapon de dekstrulo Jin Liu kaj abomenas kaj timas. Kaj nun ĉi tiu ĉapo fariĝas senkompare grava por li, kvazaŭ aŭspicia birdo aŭ la dio de riĉeco, sed ĝuste ĉi-hore la ĉapo forflugis de li. Sen ĝi lia reputacio ne povas esti reakirita, nek la politiko efektivigita ĉe li. Kie eblas serĉi tiun ĉi ĉapon komence ricevitan kaj nun perditan? Lao Wang en la pordistejo trovas lin kompatinda kaj iras frapeti lian ŝuldron, sincere dirante al li:

“Iru al Lao Sui, petante ke li faru ateston por vi.”

Prave. Kiam Jin Liu estis persekutata, Lao Sui rolis kiel partia sekretario de la eduka buroo. Li povas atesti lin dekstrulo. Jin Liu pridemandas kvindek homojn kaj

kuras kvindek lokojn, fine li trovas, ke Lao Sui estas en malgranda kunvenejo de altklasa hotelo. Apenaŭ komenciĝas la interparolo, Lao Sui ekmemoras, ke tiu ĉi stultulo, kiel dekstrulo, estis raportita al la supera nivelo, kiu tamen ne aprobis. Poste, same kiel dekstruloj, li estis sendita al kamparo. Kiel likvidi la ŝuldon nun? Lao Sui parolas kun firma decidemo: “Kamarado Jin Liu, kiam mi estis partia sekretario de la eduka buroo, absolute mi ne altrudis al vi la ĉapon de dekstrulo, kaj tio povas esti kontrolita en la arkivo.”

Jin Liu kaj koleras kaj afliktiĝas. Li volas apologii pri si mem. Lao Sui svingis la manon: “Nun mi havas gravan kunvenon. Pri via afero mi jam bone klarigis. Vi ne havas la demandon pri kiel efektiviĝi la politikon, kaj nun vi revenu kaj bone laboru.” Jin Liu faras nenion alian, ol foriri de la hotelo, murmurante en sia buŝo: “Ĉapo, mia ĉapo...”

Mikronovelo

Forgesemo

Miaj geavoj estas tre forgesemaj. Hieraŭ post vespermanĝo avinjo volis, ke avĉjo prilavu manĝilaron, kaj li kolereiĝis, dirante: “Kial vi volas, ke mi prilavu manĝilaron? Mi jam faris tion dum la tuta vivo. Mi ne faru tion.”

Avinjo ankaŭ kolereiĝis: “Vi oldulaĉo! vi devas fari tion post manĝado.”

Avĉjo des pli ekscitiĝis: “Mi povos fari tion, sed vi devas formanĝi la reston de la rizmanĝaĵo en la bovlo.”

Kun retenita kolero ŝi finmanĝis la reston de la rizmanĝaĵo en la bovlo. Tuj post tio li zorgeme demandis: “Ĉu vi jam finmanĝis? Do ni promenu ekstere.”

Ŝi diris: “Hej, oldulaĉo, ni ŝajne ĵus kverelis. Pro kio?”

Elĉinigi ***Herbeto***

Chiung Yao (1938-)



aŭtorino, Chiung Yao

En profunda korto (4)

Elĉinigiĝis Vejdo

4.

Prenante la maneton de Tingting, Fang eniris en la pordon de la bieno de Familio Bai.

Ĝi estis ĝardeno kun vasta spaco. Meze de la ĝardeno kuŝis larĝa aŭtovojo. En florbudoj estis plene plantitaj diversspecaj floroj, kiaj krizantemoj, siriaj kaj ĉinaj hibiscoj, kaj kamelioj. Laŭ ambaŭ flankoj de la cementa vojo bonorde staris po spaliro da cipresoj kaj kelkaj banjanarboj pritonditaj ronde kaj ombrelforme. La ĝardeno impresis bonorde, freŝe kaj lukse, sed al ĝi mankis eleganteco, precipe, je ŝia eltrovo, neniŭ rozujo troviĝis sur la tuta tereno. Al Fang, kiu tre ŝatis rozojn, tio estis bedaŭrinda manko. La domo estis duetaĝa konstruaĵo, al kiu aldoniĝis remizo, kie parkis helblua Chevrolet. Suprenirinte kelkajn ŝtupojn, Fang puŝmalfermis du grandajn pordklapojn kaj ŝi jam sin trovis en luksa salono, kies planko estis pavimita per tabuloj de pampelmusligno kaj kie troviĝis kompleto da malhelruĝaj sofoj, antaŭ kiuj sterniĝis diketa ruĝa tapiŝo. Ĉe ambaŭ flankoj de la salono staris po fenestropordo kun pendanta kurteno de blanka gazo. La du aliaj muroj estis masonitaj per krudaj ruĝaj brikoj, sur kiuj pendis pentraĵoj de abstrakta skolo. Kvankam la tuta salono estis lukse meblita, ĝi tamen impresis ŝin, kiel la ĝardeno, per pli da riĉeco, sed malpli da eleganteco. Se ŝi estus la dekoranto de la salono, ŝi certe adoptus kremkoloran kaj kafkoloran tonojn. En ŝiaj okuloj, ruĝo povis aplikiĝi al litĉambro kaj tiu en salono ne estis de bona gusto.

“Instruistino, bonvole sidiĝu,” krie diris Tingting, kaj poste laŭtigis sian voĉon, “Yazhu! Yazhu!”

Envenis okulplaĉa servistino, kiu portis bluan aŭtutkon, kaj rigardis ridmiene

al Fang.

“Yazhu, jen estas instruisto Fang. Alportu tason da teo al ŝi!” ŝi diris. Mallaŭtigante, ŝi demandis, “Kie estas mia paĉjo?”

“Supre,” Yazhu fingromontris la supran etaĝon, ridetante kuraĝige al ŝi. Vidinte tion, Fang komprenis, ke la servistino tre ŝatas sian etan mastrinon. “Via panjo jam foriris antaŭtagmeze,” ŝi daŭrigis aŭtomate. Rideto intensiĝis sur ŝia bonkora kaj juna vizaĝo.

“Ĉu vere?” La knabino levis siajn brovojn, kaj ĝojo tuj brilis sur ŝia vizaĝeto. Tenante sian librosakon, ŝi tuj diris, “Mi iru vidi paĉjon sur supera etaĝo!” Returninte sian kapon, ŝi parolis al Fang, “Instruistino, atendu momenton. Mi tuj akompanos mian panjon malsupreniri!” Rigardante Tingting duobligis sian paŝadon laŭ la ŝtupoj, Fang sidigis en sofona. Tiumomente, ŝi rimarkis, ke la ŝtuparo troviĝas trans la manĝejo, kiu ligitis kun la salono, nur apartigita per blanka ajura ekrano.

Yazhu alportis tason da teo kun delikata aromo, kaj Fang akceptis ĝin, la blankan fajnan porcelanan tason, en kiu freŝe verdaj tefolioj kolorigis la tutan tason da akvo per helverdo. Ŝi suĉis te-akvon per trinketo. Kiel aroma! Kiel palatoplaĉa! Ĝi certe estas el la te-plantejo de Familio Bai! Ŝi ekpensis pri la te-plantejo kaj te-prilaborejo de Familio Bai, kiujn Li Yusheng menciis al ŝi. La buŝpleno da te-akvo enfluis kun delikata dolĉeco ĝis ŝia interno. Ŝi tuj sentis mensan konfuzitecon kaj malfacile klarigeblan strangan humoron tra sia korpo. Kio troviĝas en tio? Ŝi abrupte rektigis sian korpon. Strio da malvarmo kuris tra ŝia spino, kaj eta voĉo el ŝia interno petis, “Foriru de ĉi tie! Foriru de ĉi tie! Foriru de ĉi tie!”

Kial? Ŝi rezistis, rezistis kontraŭ la malfacile klarigebla forto. Ŝi sentis sian kapon iom turniĝema, sian vidon iom malklara, sian spiriton iom konfuzita... kvazaŭ ŝi fuŝus gravan aferon. La voĉo en ŝia interno plilaŭtigis, kriante, “Foriru de ĉi tie! Foriru de ĉi tie! Foriru de ĉi tie!”

Kio okazas al mi? Ĉu mi estas ensorĉita? Pensante, ŝi forte svingis sian kapon, kaj jen ĉio kalmis kaj malaperis. Sammomente, prenante la manon de sia patro, Tingting malsupreniris laŭ la ŝtuparo. La knabino montris rideton sur la plena vizaĝo, dum tiu de la blindulo estis malhela, serioza kaj sensenta.

“Paĉjo, jen estas instruistino Fang!” Tingting kondukis sian patron antaŭ la sofona.

“Bonan tagon, sinjoro Bai,” salutante, Fang laŭkutime etendis sian manon, sed tujtuje, ŝi trovis, ke ŝia salutito ne kapablas vidi, kaj ŝi hasteme retiris sian manon.

“Oho!” Lia vizaĝesprimo subite ŝanĝiĝis, kaj singardemo rampis sur lia vizaĝo. Li tuj demandis, “Ĉu ni intervidiĝis? Ŝajnas, ke mi aŭdis vian voĉon de kie mi ne scias.”

“Jes,” Fang malkaŝeme konfesis, “antaŭ kelkaj monatoj, mi renkontis vin sur la ruino de Hanyan Bieno. Kaj post kelka babilado, mi akompanis vin ĝis la pordego

de la lernejo.”

Li denove ohois. Eble pro tio, ke la vortoj “Hanyan Bieno” en la parolo tuŝis lian nervon, lia vizaĝo ektordiĝis. Kaj samtempe li ŝajne estis skuita. “Ĉu vi estas la knabino, kiu volas kolekti materialojn por verki,” li parolis kvazaŭ al si mem.

“Vi eraras,” diris Fang kun retenita rido. “Mi neniam diris, ke mi volas kolekti materialojn por verki, kaj krome mi ankaŭ ne estas knabino, ĉar mi jam ne plu estas tiel juna.”

“Ĉu ne?” li demandis penseme, kaj sidiĝis en sofion. Turninte sian kapon, li diris al sia filino, “Vi ne diris al mi, Tingting, ke instruistino Fang estas la onklino, kiu akompanis min al la lernejo tiutage.”

“Ho,” Tingting aspektis iome surprizite, rigardante al Fang kun larĝe malfermitaj okuloj. “Mi jam ne povas rememori pri tio, paĉjo, mi ne rekonis ŝin.”

“Infanoj ne povas havi tiel bonan memoron,” diris intervene Fang, ĉirkaŭrigardante, kaj ŝi volis ŝanĝi la paroltemon. “Via salono estas bele aranĝita, sinjoro Bai.”

“Ĉu ĝi donas al vi bonan impreson?” li demandis. “Ĉu la ruĝa koloro? Mia edzino faris tion, mi pensas.” Li eklevis siajn ŝultrojn. “Ruĝa, nigra kaj blua koloroj pensigas pri kafejoj en Parizo. En salono, oni prefere uzas kremajn kaj kafajn kolorojn.”

“Ho,” Fang ekstremis kaj ŝi fikse rigardis al li. “Kial vi ne dekoris ĝin per kremaj kaj kafa koloroj?”

“Kial? Koloroj servas al tiuj, kiuj kapablas aprezi kolorojn. Ĉiuj koloroj estas egale nenio por mi, ĉar mi ne povas vidi. Do lasu ŝin, kiu povas vidi, dekori laŭ sia plaĉo. La salono ne estas aranĝita de mi.”

Radio da ĉagreno fulmis tra la koro de Fang. Rigardante al Bai Peiwen, la patro de la knabino, ŝi ne sciis, kion diri.

“Mia filino diris al mi, ke vi havas grandan zorgon pri ŝi.”

“Tion mi devas fari, ĉar ŝi estas mia lernanto!” Fang tuj eldiris. Tuj poste, ŝi trovis tiujn vortojn hipokrita ceremoniaĵo, tiel ke ŝia vizaĝo ruĝiĝis pretervole.

“Ĉu nur pro tio, ke ŝi estas via lernanto?” Bai premis ŝin per tiuj akraj vortoj.

“Kompreneble ne tute,” Fang maltrankvile ekridetis. Turninte sian kapon, ŝi rigardis al apudstaranta Tingting kun okulplaĉa rideto. Etendinte sian manon, ŝi tiris ŝin en sian sinon, ridete dirante, “Via filino kaj mi estas ligitaj sorte. Je la unua vido, mi jam ekhavis ŝaton al ŝi.”

“Mi tre ĝojas aŭskulti viajn tiujn vortojn,” diris Bai. Sur lia vizaĝo alnaĝis neofta rideto. Poste, li diris al Tingting, “Tingting, diru al Yazhu, ke ŝi servu manĝon. Mi jam malsatas, kaj mi pensas, nia gastino ankaŭ malsatas.”

Elturniĝinte el la sino de Fang, Tingting rapide kuris eksteren. Tiam Bai Peiwen

abrupte demandis kun mallaŭtigita kaj dezirema voĉo, “Diru al mi, fraŭlino Fang. Ĉu mia infano estas tre aminda?”

“Ho!” Fang ekhavis la senton de ŝtoniĝo, kaj ne povante regi sian tonon, varme diris, “Sinjoro Bai, vi devus kompreni ŝin, ĉar ŝi estas via filino!”

“Ĉu vi signifas...”

“Ŝi estas la plej aminda infano en la mondo!” ŝi preskaŭ kriis.

“Kiel strange,” diris Bai enpense, “ŝi diras, ke vi estas la plej bona instruistino en la mondo, kaj vi asertas, ke ŝi estas la plej aminda infano. Laŭ mi...” Li restis senparola dum momento. “Vi ambaŭ ja estas destinitaj al reciproka laŭdado.” Ĉe tio Fang ruĝiĝis pro nenio.

Tingting kure revenis. Dum mallonga tempo, Yazhu dismetis manĝilarojn sur la tablo. Manĝantoj konsistis el tri personoj: Bai Peiwen, Bai Tingting kaj Fang Siying. Yazhu preparis entute ses pladojn kaj supon, riĉan manĝon. Videble ŝi rigardis Fang kiel honoran gastinon. Kun scivolemo, Fang fikse rigardis Bai-n manĝi, ne sciante dubeme, kiel blindulo povas trovi la ĝustajn poziciojn de bovloj, sed ŝi tuj trovis, ke ne malfacilas por Bai manĝi, ĉar Tingting atenteme zorgas pri sia patro. Manĝante prekaŭ nenion, ŝi senĉese prenadis manĝaĵon per manĝbastonetoj en la bovlon de sia patro, dirante, “Jen estas kuboj de kokidaĵo, paĉjo. Jen estas legomo kaj freŝaj fungoj, paĉjo.”

“Mi ĉerpis bovleton da supo por vi, paĉjo. Jen ĝi estas tuj antaŭ vi.”

Ŝia voĉo sonis tiel milde kaj ameme, impresante, ke ŝajnis natura afero por ŝi zorgi pri sia patro, kaj videble ŝi provis eviti maltrankviliĝon de la zorgato. Tiu sceno tiom kortuŝis kaj surprizis Fang-n. Tiu ne sciis, kiu zorgas pri manĝado de la blindulo, kiam Tingting havas lecionojn en la lernejo. Ŝajne travidinte la perpleksecon de Fang, Tingting ridete diris al ŝi, “Kutime mia patro ne malsupreniras por manĝo. Hodiaŭ li malsupreniris honore al vi. Ni preparis gamelon, tiel ke li oportune prenas manĝon.”

“Oho,” eĥis Fang, ne sciante, kiel respondi. Ŝi, nur sentis, ke ĉio, kio okazis antaŭ ŝiaj okuloj, plenigis ŝian koron per amareco, kaj ŝiaj okuloj malsekiĝis aŭtomate. Manĝado finiĝis en relative silentema etoso. Post manĝado, ili revenis en salonon. Post kiam ili sidiĝis, Yazhu preparis aliajn du tasojn da teo. Prenante tason en la mano, Fang fikse rigardis la verdetan likvon en la taso, demandante ridete, “Ĉu tiuj estas tefolioj el la te-plantejo de Familio Bai?”

Bai Peiwen eligis unu cigaredon kaj precize bruligis ĝin. Lia mano kun fajrilo haltis en aero momente. Kvankam lia paro da senvidaj okuloj aspektis malvigle, liaj buŝanguloj kaj brovoj tamen estis esprimriĉaj. Fang rimarkis, ke moka esprimo alnaĝis al lia buŝangulo. “Vi jam aŭdis pri la te-plantejo de Familio Bai,” li diris.

“Jes. Ĉi tie estas urbeto, kaj plie Familio Bai estas tro fama.” Fang rekte rigardis

al Bai. Tio estas la avantaĝo, ke oni povas senskrupule okulmezuri kaj esplori la blindulon, kiam ili sidas vidalvide al blindulo.

“La plej bona speco de teoj estas tiu kun rozflora bonodoro. Estas domaĝe, ke vi ne povas ĝui ĝin nuntempe,” li diris distreme.

“Kial ne?” Ŝi fikse rigardis lin.

“Ni jam ne plu produktis tiun specon delonge.” Lia vizaĝesprimio impresis iom triste. Li silentis longan tempon, kvazaŭ profundiĝante en pensado. Poste, li subite turnis sian kapon, demandante, “Ĉu vi troviĝas ĉi tie, Tingting?”

“Jes.” La knabino hasteme aliris kaj kaptis la manon de sia patro. “Jen mi estas ĉi tie!”

“Bone,” li diris, kun iom da ordona tono. “Supreniru nun por fari hejmtaskojn. Mi volas interparoli kun instruistino Fang pri kelkaj aferoj. Ne ĝenu nin!”

“Bone,” diris malrapide kaj obeeme Tingting, sed ŝi ne tuj moviĝis pro tio, ke ŝi pli malpli inkliniĝis al la interparola rondo. Alvizaĝe al Fang, ŝi senĉese palpebrumadis, komprenigante, ke ŝi ne malkaŝu la sekreton inter ili. Fang ridete kaptis por trankviligi ŝin.

Ne elteninte plu, la blindulo laŭtigis sian voĉon, “Nu, ĉu vi ankoraŭ ne supreniras, Tingting?”

“Ho, jam, mi jam foriris,” kriante senĉese, la knabino unuspire enkuris manĝejon kaj rapideme suprenkuris.

Post kiam la figuro de Tingting tute malaperis, Fang klinis sin malantaŭen en sofo. Trinketinte gluton da te-akvo, ŝi, rigardante profunde la viron antaŭ si, treniĝeme demandis, “Ho? Sinjoro Bai?”

Li profunde suĉis la cigaredon sen paroli dum kelka tempo, kaj silente elŝprucis fumon. Post longe, li eligis abruptan demandon, “Kiom da jaroj vi havas, fraŭlino Fang?”

Ĉe tio, ŝi stuporiĝis momenton kaj iom maltrankviliĝis, ŝajne por eviti ion. Ŝi elturniĝeme diris, “Mi jam diris al vi, ke mi ne estas tro juna, nek tiel maljuna. Eksterlande oni ne tiel bruske demandas pri la aĝo de fraŭlino, kiel vi.”

“Sed nun ni troviĝas enlande.” Li, tirinte siajn ŝultrojn, forlasis la paroltemon kaj pludemandis, “Vi estas ankoraŭ ne edzinigita. Kial?”

Ŝi denove stuporiĝis. “Ho, sinjoro Bai,” ŝi diris flegme, “mi ne scias, kion vi volas scii. Vi invitas min ĉi tien por enketi pri mia travivaĵoj, ĉu ne?”

“Kompreneble ne,” li diris, “mi nur trovas tion stranga, kial la bela ino kia vi forlasis la luksan vivon en Usono kaj laboras kiel instruistino en la kamparo.”

“Bela?” Ŝi eklevis siajn brovojn. “Kiu diris al vi, ke mi estas bela?”

“Tingting.”

“Tingting?” Ŝi ekridetis. “Tio estas nur infana parolo.”

“Se mi ne eraras,” li diris senĉirkaŭfrazo post kiam li elblovis bulon da fumo, “vi suferis ian malsukceson de sento en Usono, ĉu? Tial vi restadas ĉi tie por kuraci vian vundon, aŭ por eviti kelkajn aferojn, travivaĵojn de amo aŭ unu personon, ĉu ne?”

Fang tute dronis en stuporo. Ŝi gapis al li longan tempon, ne sciante, kion ŝi devas diri. Kaj post longe, ŝi eligis malpezan elspiron kaj malforte ekkriis, “Ho, sinjoro Bai!”

“Nu, ni ne babilu pri ĉi tio,” li tuj diris, “mi pardonpetas, ke mi menciis ĉi tion. Mi nur volas scii, ĉu vi ne revenos al Usono dum mallonga tempo.”

“Mi pensas, ke ne.”

“Do, tre bone.” Li ekbalancis la kapon. La cigareda stumpo preskaŭ brulis ĝis liajn fingrojn, kaj li palpis sur la tablo por serĉi la cindrujon. Ŝi aŭtomate ŝovis ĝin en lian manon. Li akceptis la ujon kaj estingis la cigaredan stumpon. Li diris duonvoĉe, “Dankon.” Ŝi ne respondis. Ŝi silente trinketis teon, iome distriĝema.

“Mi esperas, ke miaj tuj vortoj ne malgajigu vin,” li diris base kaj mildvoĉe kun iom da bedaŭro.

“Ho, ne, neniel,” ŝi ekvigligis.

“Do, mi volas interparoli pri mia celo inviti vin ĉi tien, ĉu bone?”

“Jes.”

“Mi kredas...” li paŭzis momenton, “ke vi vere ŝatas Tingting.”

“Jes.”

“Tial mi esperas, ke vi transloĝiĝu ĉe nin.”

“Ho? Sinjoro Bai?” ŝi ekskuiĝis de surprizo.

“Tio, kion mi volis diri, estas inviti vin ĉe nin kiel guvernistinon de Tingting. Mi divenas, ke ŝia lernado ne estas tiel bona, ĉu ne?”

“Ŝi povos sin plibonigi...”

“Sed, ŝi bezonas bonan instruiston,” li intermetis.

Ŝi maltrankvile ekmovis sian korpon.

“Ho, sinjoro Bai...” ŝi heziteme diris, “Se mi ne loĝos en via hejmo, mi ankaŭ povos ripari ŝian lernadon. Fakte, ĉiutage...”

“Jes, mi scias,” li rompis ŝian parolon, “ke vi faras tion unu horon ĉiutage, sed vi ne akceptas pagon. Vi ŝajne ne estas tiu, kiu jam ricevis edukadon en Usono.”

Ŝi ne parolis.

“Mi scias,” li daŭrigis, “ke vi ne donas atenton al mono. Do, mi pensas, ke se mi dirus al vi, ke vi ricevos altan pagon, tio certe ne ektuŝus vin.”

Ŝi ankoraŭ ne parolis.

“Kiel pri tio, fraŭlino Fang?” li sin klinis iome antaŭen.

“Ho,” ŝi perplekse kuntiris siajn brovojn. “Mi ne havas klaran komprenon, sinjoro Bai. Se vi konsideras, ke unu horo por ripari ŝian lernadon ne sufiĉas, mi povos pliigi

la tempon ĝis du aŭ tri horoj. Ĉiuvespere mi alvenos ĉi tien post vespermanĝo, kaj reiros hejmen post riparado. Mi kredas, ke ne necesas por mi loĝi ĉi tie.”

Li eligis alian cigaredon, kaj lia vizaĝesprimo aspektis iome urĝeme.

“Fraŭlino Fang,” li malfacile diris, mordetinte siajn lipojn, “mi kredas, ke vi aŭdis pri miaj onidiroj.”

“Jes,” ŝi diris mallaŭte.

“Do, ĉu vi komprenas min?” Li peze spiris, kun sombra mieno. “Ŝi estas infano, kiu perdis sian patrinon.”

“Jes,” ŝi ankaŭ ekmortetis siajn lipojn.

“Do, vi devas kompreni. Mi ne nur volas havigi al la infano guvernistinon, sed ankaŭ personon, kiu povas vere atenti pri ŝi, flegi ŝin kaj zorgi pri ŝi, tiel ke ŝi kreskadus sane kaj ĝoje.”

“Sed, mi aŭdis...” ŝi sentis sian voĉon seka kaj obtuza, “ke vi jam havigis al la infano duonpatrinon.”

Li ekŝokiĝis, kaj longa peco da cigareda cindro falis sur lian ĉemizon. Li ekhavis longan vizaĝon. Dum momenteto, li aspektis kaj pale kaj maljune, kaj lia voĉo fariĝis mallaŭtigita kaj subpremita.

“Tio estas unu el la kaŭzoj, kial mi invitas vin ĉi tien,” li diris, kun iom da malfacile neretenebla ekscito. “Sciu, ŝi ne estas ordinara infano. Se ŝi estis traktita maljuste, ŝi neniel diris unu vorton pri tio antaŭ mi. Eĉ se ŝi estus torturita ĝis morto, ŝi ankoraŭ prenus min ĉirkaŭ mia kolo, dirante, ‘Kiel mi ĝojas!’ Ĉu vi komprenas, fraŭlino Fang?”

Ŝi subite deturnis sian kapon flanken, sentante du varmajn fluojn ŝpruciĝi en siajn okulkaŭzojn, tiel ke ŝia vidkampo fariĝis malklara. Io kortuŝa, ekscita kaj preskaŭ ĝojiga fulmis en ŝi. Ho, ĉi tiu patro ne estas tiel senscia, nekomprenebla nek nezorgema pri sia infano, kiel ŝi imagas! Ŝi flagrigis siajn palpebrojn kaj nerimarkite froviŝis larmojn de la vangoj. Dum ĉi tie momento, ŝi fine komprenis, komprenis la triston apartenantan al la blindulo. Tiu ĉi homo ne sole havigas al sia filino protektanton, li eĉ petas helpon de ŝi!

“Kiel pri tio, fraŭlino Fang?” li demandis urĝeme.

“Ho, mi...” ŝi falis en konfuzitecon. “Mi ne scias... Mi pensas, ke mi devas konsideri pri tio.”

“Pri kio konsideri?”

“Vi scias, ke mi estas instruisto de Zhengxin Lernejo, kaj Tingting mia lernanto. Se mi nun servus kiel ŝia guvernistino, tio ŝajnas ne deca kaj krome kaŭzus klaĉojn de aliaj...”

“Hm! Kia sensencaĵo!” li diris rikane, “Multas instruistoj de elementaj lernejoj, kiuj servas kumule kiel guvernistoj. Vi neniel estas ununura guvernisto. Se vi vere

donas atenton al tio kaj volas eviti klaĉojn, do, rezignu la oficon de Zhengxin Lernejo! Mi donos duoblan pagon, kiun vi ricevas de Zhengxin Lernejo.”

Ŝi nereteneble montris flegman rideton. Nebulo da abomeno estiĝis en ŝi. Ŝi ne komprenis, kial tiuj riĉuloj emas atingi la celon per mono, kvazaŭ ili povus aĉeti per mono ajnan aĵon en la mondo.

“Ĉu vi alkutimiĝas fari tiajn aĉetojn?” ŝi diris moke. “Sed tre domaĝe, ke mi simple estas...”

“Lasu do,” li interrompis ŝin. Stariĝinte, li lerte iris al la ĝisplanka fenestro kun sia dorso al ŝi. Li diris mallaŭte kaj morne, “Ŝajnas, ke mi uzis eraran metodon, sed vi ne povas nei, ke tiu metodo estas la plej efika por homoj solvi problemojn. Nu, se mi diras, ke Tingting vin bezonas, ĉu tio efikas?”

En ŝia koro fontis acideco. Ŝi aŭde distingis el la tono de la viro senhelpecon kaj petemon. Stariĝinte, ŝi laŭvole alproksimiĝis al li. Ekster la fenestropordo brilis luno kaj, sub la lunlumo, disflorantaj floroj skuiĝis, ĵetante ombrojn sur la teron. Profunde enspirinte, ŝi rigardis altan florarbeton, dirante, “Kiel bona rozarbeta!”

“Kio?” li surprizite ekkriis, kvazaŭ elektrofrapite. “Kion vi diris? Rozarbeta? Ĉu troviĝas rozarbetaj en mia ĝardeno?”

“Ho, ne, mi erare nomis ĝin.” Ŝi fikse rigardis al lia paliĝinta vizaĝo. “Ĝi nur estas hibiska arbeta. Mi ne scias... Ĉu vi ne ŝatas rozojn? Kial? Vi devus ŝati ilin, ĉar ili estas la plej bonodoraj, dolĉaj kaj belaj, precipe la flavaj rozoj.”

Li kaptis per mano la anson sur la fenestropordo, kun rigidiĝitaj muskoloj sur sia vizaĝo.

“Ĉu vi ŝatas rozojn?” li demandis senemocie.

“Kiu ne ilin ŝatas!” ŝi respondis ankaŭ senemocie. Rigardante ekster la fenestron, ŝi staris kelkan tempon. Poste, ŝi subite ekvigliĝis. Turninte sian kapon, ŝi direktis sian rektan rigardon al li, kaj diris decideme, “Ĵus mi jam faris pripenson, sinjoro Bai, kaj mi akceptas vian inviton. Sed mi ne povas rezigni la oficon de Zhengxin Lernejo. Tial mi loĝos ĉe vi. Ĉiutage mi kaj Tingting kune iros al la lernejo kaj revenos kune. Mi esperas, ke mi havu apartan ĉambron, salajron de 2000 dolaroj, kaj— tutan liberecon.” Post paŭzo, ŝi aldonis, “Mi transloĝiĝos ĉi-sabate!” Sin turninte, ŝi iris al sofo kaj prenis sian mansakon.


Li urĝeme turnis sian kapon, kun brilanta vizaĝo.

“Ĉu decidite?” li demandis.

“Decidite!”

(daŭrigota)

Tiberio Madonna (Italio)



poeto, Tiberio Madonna

Sen ni

La floroj
en la mallumo
ne havas kolorojn
kaj la luno
defalinta en la malamon
perdis la helecon.
La suno
kiu brilegos morgaŭ matene
pli eta ol oranĝo
pluvigos
sian acidan sukon
sur niajn okulojn
soifajn
kaj bruligos
kiel senutilajn paperaĉojn
la songojn
kvankam jam cindriĝintajn.
Kaj kiel faros intertempe
la nokto
por trinki la tutan akvon
de ĉi freza
fulmotondro
kaj viŝi la nubojn
malkovrante
ke ĝi perdis la lunon?
Kie ni trovos

helfarban pentraĵon
por povi eniri kaŝite
kaj promeni en ĝi?
Horloĝoj kaj kalendaroj
diras nenion plu
al niaj fantazioj
kaj l' atendoj
longaj
lacigantaj
kaj dolĉaj
dronis
kun siaj falsaj promesoj
en unu guto
da fumo.
Kion ni diros
al niaj koroj
kaj kion ni rakontos
al la emocioj?
Aeron
silentojn
kaj pluan aeron
plenigitan per vakuo. De vi.



Mikaelo Bronŝtejn (Rusio)



poeto, Mikaelo Bronŝtejn

Inundo reva

La alta akvo de april'
diskrete memorigas pri l'
senzorga tajdo normandia.
Mi plaŭde paŝas ĉe l' domar',
kaj revas pri la fora mar'
plu malkvieta koro mia.

Ho, ne pri ostroj kun ĉampan',
sed nur pri la amika man',
al mi svinganta nun salute.

En hela fundo de la rev' -
mi rememoras re kaj re
la travivaĵojn pominate.

Pardonu, mi ne pretas por
forgesi pace pri l'angor',
premanta, kvazaŭ stretaj botoj.
Humidas leze la proksim',
kaj ne plu certas tiu lim',
trans kiu mankas idiotoj.

Rememoraĵo

Pace pompas la montrofenestroj
en urbetoj de suda Francio,
kvazaŭ ĉiam plu daŭras la festoj
ekde ĝuo kaj ĝis senkonscio,

kvazaŭ mankas aferoj aliaj
por loĝantoj, liberaj dumvive,
krom promenoj – ja tutfamiliaj

por gapadi al varojn na ĵve

aŭ por sidi en restoraci' kun
pokaletto da ruĝa aŭ blanka,
aŭ por gaje viziti la cirkon
kaj la tag' rezultigis senmanka.

Kredu, karaj, ke mi sen envio
ĉi-konkludojn aroge prezentas.
Ja ĉeestis mi en via vivo
dum semajno nur. Sed mi kontentas.

Vojaĝis mi en vagonar' de
Sankt-Peterburgo ĝis Helsinko,
minutoj flugis tro bastarde,
vokante min al tuja drinko.

La sid' komforta eĉ aldonis
deziron gajan min ekdistri,
najbar'-barbulo ne admonis -
kundrinkis pokaletojn – ĝis tri.

Forestis paŭzo ĉelandlima,
ni gajaj plu veturis glate,
al stacidomo malproksima
la trajno venis akurate.

Kaj gaje pasis horoj vantaj
en kompani' esperantista,
kaj sonis la ŝatataj kantoj,
kaj mankis eĉ momento trista

en niatempa kontinuo
dum la kortuŝa kant-kunsido...
Ve, ne plu eblas tia ĝuo -
pro la altranga fidecido.

Odor' de la printempo
proksimiĝanta,
senteblas en la neĝo
ĵus griziĝinta,
en la promenotento,
en vanta, kanta
dumtaga revsieĝo,
en ĉirpo tinta -
voĉetoj de paruoj -
senzorga ĝojo,
en voka elokvento
de l'rid' virina.
Kaj fuĝas for l' instruoj
de l'vivovojo,
kaj ŝajnas por momento,
ke l'viv' - senfina.

En la senkompata blag'
de la ĉiutaga vivo
plu glimetas perspektivo,
neviŝebla el imag'.

Do, se benos la destin'
min per tuŝo de la sano,
kaj se plumon tenos mano,
min pelante el rutin'

spite pigron kun obstin'
al elspiro de l'eventoj,
certe, miaj puraj sentoj
daŭre plu atingos vin.

Rita Mkrtĉjan (Armenio)



poetino, Rita Mkrtĉjan

Poeto

Ne estis li Poeto fama,
Poet' - amanto, tiel nomis sin,
Sed poezio estis flamo,
La lumo, senco de la viv'.

Li verkis pri belec' de l' tero,
Pri revoj, pri espero, pri dolor',
Pri suna varmo kaj pri ombro de ekzisto,
Pri ĉiopova kaj sindona homa kor'.

Li dankis Dion pro la gajaj tagoj,
Pro senresponda fora amo,
Pro tio, ke ne gravas tute, ke...
Ne estis li Poeto fama.

Memoro

La memor'- kiel pord' malfermita,
Bildoj ĉiuj rapide ŝanĝiĝas,
Povas esti ridet' aŭ larmoj,
Kiuj sur la vizaĝo frostiĝis.

Povas iĝi memor' la Femido
Kaj verdikto eksonos severe,
Aŭ kiel la varmo patrina,
Nin brakumi karese, tenere.

La memor'- kiel libro amata,
La enhavo-konata, proksima,
Flugas vicoj de voĉoj karegaj,
Kies sonoj forgesos neniam.

Povas ĝi memoriĝi karulojn,
Kaj de ĝoj' nin devigi ekkrii,
Foliumas memoron denove,
Kaj forgesi ni timas eĉ ion.

La memoro similas dolĉaĵon,
Sed maldolĉas tre ofte la kerno,
Ni superas kaj ĝojas samtempe,
Sed ne povas la pardon batfermi!

Virino

Virino estas forta uragano,
Malvarmo, pika glaciet'
Virino estas monta akvofalo,
Ŝi estas nokta neghovent'.

Virino estas tago nubkovrita,
Ŝi estas furioza mar'
Nekomprenebla, kiel songo, kosmo
Danĝera kaj mirakla, kiel fair'.

Virino estas vera kataklismo,
Sed... Post tuŝet' karesa de printemp'
Virino iĝas flubruet' de rivereto
Ŝi estas floro, pepas kun birdet'

Virino iĝas brila sunradio,
Dancanta papilio estas ŝi,
Ŝi estas stelo, fora kaj proksima,
Virino estas amo, estas mond' por ni!

Mi amas fotojn...

Mi amas fotojn, kiel la amikojn
Aperas ĉiam, se alvokas ni
Kaj pri eventoj, gajaj aŭ sopiraj
Rakonti povas de komenc' ĝis fin'.

Por ĉiu estas kara la juneco
En fotoj estas juna la patrin'
Senzorga kaj kvieta infaneco
La granda ĝoja rond' de famili'.

La rememoroj, kiuj ne foriras
Vizaĝoj karaj en pasinta temp'
La larmoj, aŭ feliĉ' de nia koro
Nur scias fotoj pri anima sent'!

Juvelo (Ĉinio)

Trans tempo-diferenco

Mia horloĝo ĉiam adaptiĝas al via horo,
kvankam vialoka tempo malsamas ol la mia,
mi ĉiam vekigās je via libera horo.
Aŭdinte vian dolĉan voĉon el la ekzota lando,
leginte viajn vortojn klare fluantaj kiel rojon,
mi povas endormiĝi en sonĝo kun frando.

Mia horloĝo ĉiam adaptiĝas al via horo,
kvakam vialoka tempo malsamas ol la mia
mi ĉiam atendas kun granda pasio
vian vekigon el peza dormo por vin matensaluti,
nur post tio mi povos labori kun energio.

Mia horloĝo ĉiam adaptiĝas al via horo,
kvankam vialoka tempo malsamas ol la mia,
mia sango pulsas samritme kun via korbato.
Trans barantaj montegoj kaj oceano,
ankaŭ mi sentas nin en intima rilato.

2024-4-7

Hans-Georg Kaiser (Germanio)



Printempo estas juna vir'

Printempo dormis sur herbej',
konfide! Konfide!
La najtingaloj vekis ĝin,
jubilas hele kaj sen fin'.
En rojoj sonas laŭ muzik'
por nia kara koramik',
rapide! Rapide!

Printempo iras tra la val'!
Senbride! Senbride!
Ĝi vestis sin per bunta vest'
por danci en printempa fest'.
Ĝi volas kun tulipoj danci
kaj en la balo ekbonŝanci,
rapide! Rapide!

Printempo frapas al la pord',
konfide! Konfide!
La vintro ŝtelas sin nun for.
Jam venis ties lasta hor'.
Postrestis de ĝi nur la rust'.
Printemp' nin premas al la brust',
rapide! Rapide!

Printempo kuras tra la dom',
Senbride! Senbride!
Ĝin sekvas tuj la sunobril'
kaj ventokirl' kun laŭta tril'.
Ĝi kuras haste tra l' ĝarden',
gajecon semas kaj sen pen',
rapide, rapide.

Printempo iĝas mem infan',
konfide! Konfide!
Infane kuras kiel vent'.
Ha, kia bela hela sent'.
Printemp' tulipon fine trovas.
Mateno mem la fluton blovas,
rapide, rapide!

Printempo dancas tra la strat',
Senbride! Senbride!
Salutas dolĉe ĝin odor'
kaj laŭte batas ĉiu kor'.
Printempo estas juna vir'
kaj ĉiam venu laŭ dezir',
rapide, rapide!



Lily (Ĉinio)

Surluniĝo

1

Cirkulas ĉina mit-rakonto pri Chang'e,
kiu antaŭe vivis alte sur ĉielo,
kaj kies edz' Yi, meritplena brava fe'
mortigis ĉieldian filon kun ribelo.

Pro tio ilin teren pelis Ĉieldi',
kaj l' par' feliĉe vivis memkontente.
Yi lertis en militaj artoj kun defi',
defendis la vilaĝon jen ĉiumomente.

Bravuloj multaj ĵuris obeiĝon al li,
kaj inter ili enmiksiĝis jen aĉulo,
kiu deziris la profiton sur lin fali,
kaj sin ŝajnis jen fidela sen mav-brulo.

Lernigis Yi al ili militarton pene,
vicaro lia sin ekzercis vigloplene.

2

L' patrin' de Ĉieldi' kompatis pro forpelo
la paron kaj donacis unu fe-pilolon
al ili, tiel ke ilia viv' en vero
eterne daŭros eĉ sen perdi tempocolon,

post kiam ili ĝin englutos po duono
da fe-pilolo, sed se unu voros sola
ĝin, li aŭ ŝi ekflugos al ĉiel' en zomo.
Ĝojplene ili tenis ĝin en kest' memora.

L' aĉul' sciiĝis pri l' sekret' per fi-rimedo,
kaj li decidis gajni l' fe-pilolon prove.
Post kelkaj tagoj Yi foriris por ĉas-predo

kaj Chang'e sola restis hejme ja senmove.

L'aĉul' eniris ŝian domon tute ŝtele,
eltrudis de ŝi la pilolon malsincere.

3

Panike ŝi elprenis la pilolon fine
kaj tuj englutis ĝin eĉ sen lia konsci'.
Li ne sukcesis ĝin akiri kaj deprime
foriris nure kun despera agoni'.

Tiame Chang'e sentis korpon en leĝero,
ne povis stari firme ŝi kun paŝo skua.
Tuj poste ŝi ekflugis lante en aero,
tra densaj blankaj nuboj ĝis ĉielo blua.

Kiam Yi de ĉasad' revenis, ne sukcesis
ŝin trovi ie, li ŝin serĉis ja ne plu
je la ekpenso pri l' pilolo. Li karesis
la bruston kaj rigardis al ĉiela blu'.

Jen li ŝin vidis en la blanke brila luno,
verŝajne ŝi ridetis kontraŭ li en nuno.

4

Ja Chang'e ekis loĝi en la luno vere,
kaj l' edzo kun klinita kresto veis ade.
Li volus flugi ankaŭ al ĉiel' prefere,
sed ĉu sen fe-pilolo iri nub-boate?

Ha, nun jam surluniĝis lunsondilo ĉina
sur foran flankon de la luno jen stabile.
Ankoraŭ mi ne scias, ĉu l' sondil' fascina
jam ŝin renkontis, kaj rekonis laŭdezire.

La revo de Yi baldaŭ realiĝus certe,
se li anoncus sin pli frue por vojaĝo,
ĉar la spacŝipo homportanta laŭaserte

pafiĝos por atingi l' lunon kun kuraĝo.

Yi, nia praprapatro, flugu kun fervoro
al lun' por vidi vian karan en la koro.

Aprilo

Vent' aprila
pigre blovas,
per peniko movfacila
verde farbas montojn,
per la broso kolorŝmira
la tapiŝon herban helverdigas,
per kareso mansimila
estaĵetojn jam vivigas
el la dorm' trankvila.

Sun' aprila
lumas varme,
per flaveto eliksira
kolzon ja ornamas,
per magi' inspira
persikflorojn ruĝetigas,
per arĝento brila
pur-blankigis la pirflorojn
jam el stat' senila.

Pluv' aprila
gutas teren,
per fridet' elspira
vekas nian vervon,
per humid' subtila
urĝas nin al pensoj,
per nebul' altira
spronas vipe
nin al ont' aspira.

Yi Qiao (ĉino en Germanio)



poeto, Yi Qiao

La printempa belo

Brizo tenera
susuras tra l' kamparo
verde prospera.

Serena lumo
mirindas brilkolore
inter nubfumo.

Sankta animo

prilumas koron nian
grace sen limo.

Vi 'stas kapabla
ĝui l' printempan belon
laŭ pad' agrabla.

Justa potenco
sur la Tero ĉeestas
sen dekadenco.

Benata vivo
plenas d' espero verda
kun altmotivo.

Spirita forto
tendencas ŝanĝi l' mondon
tra nova sorto.

Revelacio de printempo

Briz' printempa flirtas jen tenera,

inter nuboj glimas hela lumo.
Vasta tero viglas nun prospera,
mar' da floro ondas sub nubfumo.

Belas la natur' sen ajna limo,
laŭ la pad' migradas mi agrabla.
Flagras jen printempa la animo,
kore konsolante min afabla.

Revas ni pri aspirplena vivo,
en justeco estas viglo forta.
Ni klopodu kun la altmotivo,
baldaŭ frontos ni al ŝanĝo sorta.

Bonaŭgura restas la tendenco,
honestuloj vervas kun potenco.

Printempa brizo

Briz' printempa jen susuras
tiel dolĉa kiel kiso
kun aromo de narciso,
kaj ĉi jaron bonaŭguras.

Vent' printempa jen murmuras
tra la mar' de glora floro
kun aroma bonodoro,
dum la vastĉiel' lazuras.

Spir' printempa flustre kveras
kiel fajna mildkareso
kun amika am-promeso,
dum justeca fort' prosperas.

Jen zefir' printempa blovas
kiel linda amatino
kun fidela korinklino,
ni aspiri arde povas.

Bedo de Ĉinesko

Luiza Carol (Israelo)

Sopiro

—laŭ ĉinesko Sopir-al-sudo*

1. Januaro

Forflugas
la bird' el kaĝo;
sopiras al suda sun',
al pli bongusta manĝo...
revas pri ŝanĝo...

2. Februaro

Tremtimas
la bird' en vento
en frosta brua urbo,
malsatas sur tegmento
sed sen lamento.

3. Marto

La birdo
sur fenestrobret'
manĝas bonajn panerojn.
Ridetas gaja knabet' ...
Kiom bona sent'!

4. Aprilo

Kunulon
la birdo trovas,

preparas neston ame.
La brizo milde blovas.
La vivo novas.

5. Majo

El ovoj
eliris idoj
kun fragilajflugiloj,
okuloj kiel bidoj,
gajaj pepstridoj.

6. Junio

Feliĉo
signifas amon,
komfortan etan neston,
la familian varmon
kaj plenan sanon.

7. Julio

Birdidoj
ĝojasflugante,
soras super la parko,
ludas en sun' kantante,
pepas mirante.

8. Aŭgusto

Feliĉo
estas libere
flugi super la mondo,
vivi tute sincere
kaj sendanĝere.

9. Septembro

Vetero
jen malvarmiĝas.
Birdoj sopiras al sud',
multaj brue arighas
kaj deteriĝas.

10. Oktobro

Flugas
brua birdaro
super dezerta kampo,
super flava arbaro,
super la maro.

11. Novembro

Alvenas
la birda paro
al suda varma insul'.
Parfumas foliaro,
ĝojas idaro.

12. Decembro

En sudo
ĉio en ordo,
sed bird' songas pri nesto,
sopiras ĉe marbordo
al fora nordo.

Veĵdo (Ĉinio)



aŭtoro, Veĵdo

Sorĉa povo kontraŭ pluvo

rakonto pri Afanti

—laŭ ĉinesko Sopir-al-sudo*

La reĝo
iris ĝojplene
ĉasi kun korteganoj
dum Afanti ĉagrene
sekvis sintrene,

ĉar ili
rajdis impone
sur kurĉevaloj kaj li
sur poneo dispone
jen laŭordone.

Dumvoje
tondris subite,
fulmadis kaj pluvegis,
ĉiuj ja surprizite
fuĝis evite.

Kaj ili
galopis grege
en urbon por ŝirmi sin
sed en vestar' malseka
pro bat' pluvega.

Afanti

pro fi-ĉevalo
ne povis rapidi sed
nur haltis dum pluvfalo
ĝis la finalo.

Li saltis
de ĝi rapide
kaj demetis la veston
kaj ĝin ŝovis konfide
sub selon glite.

Post pluvo
aperis suno.
Li surmetis la veston
kaj rajdis kun kant-zumo
en plena junio.

Kiam li
palacon iris,
jen la reĝo vidis lin
en seka vest' kaj miris,
“Kiel akiris

sekecon
vi en pluv-kovro,
dum ni tramalsekiĝis?
Ĉu estas sorĉa povo
en via movo?”

Afanti
diris ridete:
“Ne, via reĝa moŝto,
kiam vi fuĝis cede,
pluvo obsede

vin sekvis,
dum al ĝardeno
bela mia ĉevalo
min kondukis sen peno
kaj ajna ĝeno.

Jen tie

brilas la suno,
pompas floroj kaj birdoj
kantas en arb-brakumo,
lirlas roj-rumo.

Ĝi estas
jen en la mondo
la plej bela ĝardeno,
al mi plaĉis la montoj
kaj klaraj ondoj.

Pro tio
iom malfrue
mi revenis al palac',
staras ĉe vi genue
kun tim' senbrue."

La reĝo
gapis kun envi'
tre deziris iri al
loko plena de magi'
kaj, ha, fantazi'.

Jen ili
en la dua tag'
iris ĉasi denove.
Ilin trafis pluv-atak'
dum ilia vag'.

Ĉifoje
Afanti rajdis
sur reĝa ĉevalo sed
tiu poneon ŝatis
kaj vipe batis.

Ĉe ekpluv'
Afanti donis
vipadon al ĉevalo,
ĝin galopi ordonis
kaj plue spronis.

Apenaŭ

pluvguto eta
lin kaptis post reveno
per kurĉeval' impeta
kaj longpieda.

Sed tamen
la stulta pone'
haltis pro tim' al tondro,
rifuzis rapidi tre
dum pluva akme'.

En pluvad'
la reĝ' mizere
tramalsekiĝis ĝis haŭt',
embarasiĝis vere
veis sufere.

Vidinte
Afanti-n, brule
de kolero la reĝo
muĝis: "Vi senskrupule
trompis min mule!"

Afanti
diris ridete:
"Se sub selon vi metus
la vestojn, vi tutcerte
povus complete

reveni
seka tuttute
kaj ne viaj vestaĵoj
malsekiĝis pluv-gute
ja absolute!"

**Sopir-al-sudo (ĉine: Yijiangnan): ĉina fiksfirma poemo el kvin versoj de 35,77,5 silaboj laŭ rimaranĝo xa,xa,a (x=senrima).*

Rovere Emanuele (Italio)



tradukinto, Rovere, Emanuele

Kvin kanttekstoj

La knabo de strato Gluck

Jen la rakonto pri unu el ni, same naskita en Strato Gluck, en domo malriĉa, ekster la urbo, trankvilaj homoj, tre laboremaj.

Tiam herbejo estis tie, sed estas urb' nun;
kaj tiu domo tra l'verdaĵ' nun jam perdiĝis tra l' fum'.

Tiu ĉi knabo de Strato Gluck kutimis ludamuziĝi kun mi,
sed, iun tagon, al mi diris plore "Mi devas foriri, translokiĝi en urbon".

Mi lin demandis "Ĉu vi ne ĝojas? Fine vi povos enurbe loĝi:
tie vi trovos ĉion, kion vi ne havas tie ĉi;

vi povos lavi vin endome, ne surkorte, sen plu malvarmiĝi".

"Kara", li diris "Ĉi tie mi naskiĝis kaj en ĉi domo mi lasas la koron.

Certe vi devus facile kompreni, ke estas bonŝanco, ke daŭri vi povos
ludi nudpiede sur la herbejoj, dum en l'urbocentro mi enspiros cementon".

Sed venos tago, kiam tien ĉi revenos mi;

l'amikan trajnon mi reaŭdos, alvene, fajfadi.

La tempo pasas, ok longaj jaroj, dum tiu knabo fariĝas riĉulo.

Li ne forgesas la malnovan domon, li havas monon por ĝin aĉeti.

Sed, ĉe l' reveno, li jam plu ne trovas tiamajn geamikojn, nur gudron, betonon.

Tiam herbejo estis tie, sed estas urb' nun; kaj tiu domo tra l' verdaĵ',

nun jam, perdiĝis tra l' fum', tra l' fum'.

Mi ne komprenas kial oni daŭrigas konstrui turdomojn, aŭtoŝoseojn

kaj herbon ne lasas, detruas herbejojn kaj arbarojn. Ne... ne... ne!

Se ne venos ŝanĝo, kiu scias, kia estos la fino, la malbona fino, kiun ni faros...?

Nur gudro, betono kaj fumo de aŭtomobiloj, kamentuboj, petrolo, kemiaĵoj, venenoj... polucio de la medio... nia medio...! Ne, ne... ne! Se oni ne ĉesos malpurigi la teron, ĉielon kaj maron, kia estos la fino, kiun ni faros... ni faros...?

Muziko: Detto Mariano

Vortoj: Celentano Adriano

Vokis mi nur por diri, “mi amas vin”

La novan jaron ne celebros mi, ĉokoladkoretojn ne ricevos plu de vi;
printempoj venos sen floroj kaj sen ĝoj’, tagoj enviciĝos ĉiam grizaj por refoj’.
Ne florigos plu la aprila ros’ rozojn por la nupta festo en pompa etos’;
vi forviŝis ĉion, sed ne ŝanĝiĝos jam, la promeso, kiun al vi faris mi kun am’.

Vokis mi nur por diri, “mi amas vin” kaj, ke vi estas valorega por mi.

Vokis mi nur por diri, “mi amas vin”: frazo venas el la kor’ de mia kor’.

Ne plu ferio en varma julio, ne promenadoj sub somera luna bril’;
plu ne karesos min ventet’ aŭtuna, dum folioj falas birdoj flugas suden al la sun’.
Plu ne venos festoj, amuzaj karnavaloj,
ne plu kialo danki vin pro kristnaskaj regaloj,
sed pli kaj pli fortiĝas al vi mia amosent’, kiu ne forlasas min eĉ por unu moment’.

Vokis mi nur por diri, “mi amas vin” kaj, ke vi estas la nura amo por mi.

Vokis mi nur por diri, “mi amas vin”: tio venas el la kor’ de mia kor’.

Muziko / vortoj: Wonder Stevie

Amas mi

Amas mi la venton, kiu tiklas vin, kiam ĝi ludas tra via hararo,
kiam vi fariĝas dancistino, por ĝin sekvi kun movoj graciaj.
Amas mi, kiam vi ĝojplene rapidas, por vin ĵeti en miajn brakojn,
kiam vi mienas kvazaŭ infano por sidi sur miaj genuoj.

Amas mi la sunon sterniĝantan sur vian haŭton karessoifan,
kiam, matene, ĝi vekas nin, imagas mi, ke nur por ni ĝi brilas.
Amas mi vian manon, kiu min sekurigas, se mi perdiĝas tra timoj

kaj duboj kaj via voĉo dolĉe flustras: fidon ĝi redonas kaj esperon.

Amas mi l'okulojn sincerajn viajn, kiam ili min surŝutas
per amaj rigardoj kaj poste, en perfekta harmonio,
mia frunto serenripozas sur via kor'.

Muziko / vortoj: Adamo Salvatore

Rezignu

Viaj kisoj min fajrigas, dezir' mia freneziĝas
kaj mi scias, ke vi same sentas fajron en la kor'.
Donu, amatino kara, amon vian, ne estu avara!
Nun kuŝiĝu en brakoj miaj, sub la lunbrila kares'.
Steloj mil, al posteuloj, rakontados la fabelon
pri ĉi amo, poreterne: vi kaj mi, feliĉa par'.

Ĉu bonvolas vi rezigni reziston vian al mi?
Por ĉiam estu mia, por ĉiam, por ĉiam!

Do, bonvolu vi rezigni reziston vian al mi.
Por ĉiam estu mia, por ĉiam, por ĉiam!
Muziko: De Curtis Ernesto

Vortoj: De Curtis Giambattista

Vortoj

Vortoj banalaj estas tre oftaj: evitas mi ilin kaj ankaŭ vi.
Do, kiam mi diris "Kara, mi amas vin",
profundan signifon enmetis mi.
Stultajn vortojn mi neniam uzis,
ekde nia plej frua renkontiĝo,
ĉar pli bonas vortoj seriozaj,
kiuj venas senpere el mia kor'.
Kiam mi prenos vian manon por ĉiam,
ĝoje kantos ĉiuj sonoriloj de l' mondo
kaj ni diros "Jes, mi volas": eternan amon sigelos ni.
Muziko: Singleton C./Cavanaugh J.

Vortoj: Bertini U

Haizi (1964-1989)



poeto, Haizi (Ĉinio)

Ok poemoj

Haizi naskiĝis en Anhui-provinco, Ĉinio. Li vivis en la kamparo. Kaj poste li studis en leĝa fakultato de Pekina Universitato. Dudek-ses-jara li sin mortigis sur reloj.

elĉinigis Yanke

Alvizaĝe al la maro, kun printempaj floroj en prospero

De morgaŭ, mi volos esti hom' feliĉa
 Ĉevalon bredi, haki lignon kaj veturi tra la mondo
 De morgaŭ mi zorgos pri nutraĵoj kaj legomoj
 Mi havas domon, alvizaĝe al la maro, kun printempaj floroj en prospero

De morgaŭ mi ekkorespondos kun karuloj ĉiuj
 Rakontos pri feliĉo mia jen al ili
 Mi tion, kion la feliĉa fulmo diris,
 Al ili ĉiuj diros

Kaj donos varmajn nomojn al ĉiu river' kaj ĉiu monto
 Fremdulo, ankaŭ mi prezentu bondeziron al vi
 Deziras mi estonton brilan al vi
 Deziras mi al vi kuniĝon kun amata de vi ino
 Deziras mi al vi akiri feliĉecon en la homa mondo
 Mi volas nur vizaĝi al la maro, kun printempaj floroj en prospero

Juli' ne foras

—dediĉe al Qinghai Lago, bonvole estingu mian amon

juli' ne foras
 naskiĝ' de genroj ne foras
 ne amo foras—ĝuste sub la nazo de ĉevalo

la lag' entenas salon

do, Qinghai-Lag' ne foras
ĉe la lagrand' troviĝas stakoj da abelujoj
min igas izolita sed alloga:
en verdaj herboj pompas freŝaj floroj

sur Qinghai-lago
soleco mia ŝajnas surĉiela ĉevalo
(pro tio la ĉevalo surĉiela ne foras)

mi estas tiu galantulo: la sovaĝa floro en poemo
la nura venena sovaĝa floro en la ventro de la surĉiela ĉevalo
(Qinghai-lago, bonvole estingu mian amon!)

la verdaj tigoj de sovaĝaj floroj ne foras
l' antikvaj familinomoj en medikamenta kesto ne foras
(aliaj vagabondoj kiuj resaniĝis pro malsano
jam al hejmlok' revenis, mi volas nun viziti ilin)

trans montoj kaj rivertoj, tial, la morto ne foras
skeleto pendas tra mia tuta korpo
kvazaŭ branĉoj sur la blua akvo

ho, Qinghai-lago, la akvosurfaco en krepuska lumo
ĉio prezentiĝas antaŭ okulparo!

aro da birdoj kun nur kvinmonata vivo jam forflugis
la unua birdo trinkinta mian gemon jam forflugis
nur restas Qinghai-lago, la kadavro de la gemo
la akvosurfaco en krepuska lumo

Via manoj

la nordo
je l' mano tiras vin
la manoj
demetas gantojn
du etaj lampoj ili estas

du miaj ŝultroj
malnovaj domoj estas
entenas tiom
eĉ tiujn noktojn
kaj viaj manoj
sur lia supro
prilumas ilin

do sekvis la mateno de disiĝo
en matenlumo
tenante bovlon da rizkaĉo
mi pensis pri transmonta kaj transakva
la nordo
du lampoj tie
karesi povas nur de malproksime

Novedzino

kabano, manĝobastonetoj, vaz' da pura akv' hejmlokaj
kaj multaj postaj tagoj
jen de vi estas prilumataj

hodiaŭ
mi diru ja nenion
mi lasu onin diri
mi lasu diri l' boatiston sur rivero malproksima
ekzistas lampo
ĝi estas malhela okulo de l' rivero flagranta
ĝi dormas ĉinokte en mia domo

post tiu ĉi monat', la pordon ni malfermu
sur alta arbo kelkaj floroj elkreskiĝos
sub ter' profunda kelkaj fruktoj produktiĝos

Poemo dediĉita al la nigra nokto

nigra nokto leviĝas el la vasta tero
ŝirmas la brilplenan ĉielon
el la malplena tero post riĉrikolto

nigra nokto leviĝas el via interno

ve venas el la foro, mi iras al la foro
longlonga kurso trapasas ĉi tien
en la ĉielo troviĝas nenio
kial doni al mi konsolon?

sur la dezerta tero post riĉrikolto
oni forprenas tutjaran gajnon
forprenas grenon kaj rajde forpelas ĉevalojn
tiuj restantaj homoj profunde kuŝas sub la tero

herfolioj briletas, pajlo amasiĝas sur la fajro
rizgreno stakiĝas en malluma grentenejo
kie regas troo da mallumo, kvieto kaj riĉrikolto
ankaŭ sentiĝas dezerteco, mi vidas la okulojn de submonda reĝo

birda aro flugas kiel nigraj plugutoj
de la vespero en la malluman nokton
la nigra nokto havas nenion
kiel doni al mi konsolon?

irante sur la vojo
mi kantas plengorĝe
ventego balaas la montojn
sin etendas senlima ĉielo supre

Azia kupro

azia kupro, azia kupro
avo mortis ĉi tie, ankaŭ patro, mi mortos ĉi tie
vi estas la nura loko por enterigi homojn

azia kupro, azia kupro
birdoj skeptikemas kaj flugemas, inundas ĉion la akvo
via mastro estas verda herbo, loĝanta en sia talio
kaj gardanta la manojn kaj sekretojn de sovaĝfloroj

azia kupro, azia kupro

ĉu vi vidas, ke tiuj blankaj kolomboj estas forlasitaj de Qu Yuan sur sablejo
ni, ni kaj la rivero surportu ilin

azia kupro, azia kupro
post tamburado ni nomas la luno la dancantan koron en mallumo
la luno konsistas ĉefe el vi

La maro en julio

vilaĝanoj, tiuj, kiuj vidas vin sur la maro, estas feliĉaj!
ni ĉiuj perfidas nian naskolokon
ni prenas feliĉon por profesio heredigita de prapatroj
demetu suferplenajn poemojn en la mano

Hodiaŭ la blanka hulo tre altas! vilaĝanoj, ĝi altas [pli ol via grentenejo
se mi ĉesas preparoli, se mi senintence forgesas vin
kaj ĵetas mian naskovilaĝon flanken
kaj eĉ mi min, mi ne povas reveni al la aŭtunrikolto, al la hejmo de kampuloj

en julio mi certe ĉiam revenas al dezerteco subite
mi kaptas la lastan fojon
mi surportas ĉapon, naĝkostumon por morti en kvieto
en julio mi certe ĉiam revenas al dezerteco subite

kvar fratinoj

sur la dezerta montsupro staras kvar fratinoj
ĉiuj ventoj blovas kontraŭ ili
ĉiuj tagoj disrompiĝas por ili

tritikplantaĵo en la aero
leviĝas alte super mia kapo
mi min trovas en ĉi dezerta holmo
mi sopiras al mia malplena ĉambro polvokovrita

mi amis la kvar menskonfuzitajn fratinojn
kiuj radias disen per lumo
nokte mi tenas librojn kaj la teron sub la kapkuseno
mi ekpensas pri la klvara fratinoj en la blua foro

la kvar menskonfuzitaj fratinoj, kiujn mi amis
similas al la kvar poemoj ŝatataj sub mia plumo
ili akompanis min en bela kompanio
ili nombras je unu pli ol tri feliĉaj dioj
ili pelas belajn kaj palajn laktobovinojn al la lunforma
montsupro

kiam venas februaro, de kie vi venas
sur la ĉielo ruliĝas tondro de la printempo, kie vi venas
vi ne venas kune kun fremduloj
nek kun vartransportantaj ĉevalĉaroj
nek kun birda aro



la kvar fratinoj ĉirkaŭpremas la tritikplantaĵon
la tritikplantaĵon en la aero
ĉirkaŭpremas hieraŭan neĝon kaj hodiaŭan pluvon
morgaŭan grenon kaj cindron
ĝi estas malespera tritiko

diru al la kvar fratinoj: ĝi estas malespera tritiko
tiel samas por eterne
vento sekvas venton
super ĉielo sin trovas ĉielo
antaŭ la vojo sin etendas alia vojo

Gu Cheng (1956-1993)



Gu Cheng estas unu el la gravaj reprezentantaj poetoj de la ĉina nebuleca skolo kaj nomita kiel moderna spiritualista romantika poeto. Li lertis en verkado de malnov-stilaj, nov-stilaj poemoj kaj poemoj pri fabloj kaj rakontoj.

poeto, Gu Cheng

La generacio

La nokto donis al mi nigrajn okulojn
Per kiuj mi tamen serĉas lumon

Proksime kaj malproksime

Vi
Jen rigardas min
Jen nubojn
Mi
Sentas
Ke vi malproksimiĝas kiam vi rigardas min
Kaj proksimiĝas kiam vi rigardas nubojn

La strateto

La strateto
Kurba kaj longa
Sen pordo
Sen fenestro
Tenante malnovan ŝlosilon
Mi frapas je la dika muro


Antaŭ la pordo

Mi tiom esperas, ke ekzistas pordo
Frumatene, la sunradioj brilas sur herboj
Ni staras
Subtenante nin kun la mano sur la pordoklapo
La pordo estas malalta, sed la suno estas brila
La herbo donas semojn en si
La vento lulas ĝiajn foliojn
Ni staras, silente
Ja estas bone
Estas pordo nia, por kiu ne necesas malfermi
Ja estas bone
Frumatene, la nigra nokto ankoraŭ trampas
Ni transdonas al li gitaron
Ni ne iras for
Ni bezonas teron
Teron neniam detruitan
Ni bezonas ĝin
Por pasigi nian tutan vivon
La tero estas kruda, eĉ malvasta
Tamen ĝi havas historion
Pecon da ĉielo, da lunbrilo
Da roso kaj da mateno
Ni amas la teron
Ni staras
Per lignosandaloj fosante la teron
La pordo sunumas sin jam varma
Ni korpe tuŝas nin
Kaj tio estas bona
La herbo malantaŭ la muro
Ne povas kreski pli longe, nur per fingra pinto
Ĝi tuŝetas la sunradiojn

*Elĉinigis **Minosun***

2024/4/8

Vinícius de Moraes (1913 –1980)




Krom lirika poeto li ankaŭ verkis porteatrajn dramojn kaj dum certa tempo li rolis kiel diplomato de Brazilo eksterlande ĝis poste definitive sindediĉi al popolmuzikaj komponaĵoj, tiel kantataj de li mem kiel de aliaj interpretistoj. Kompreneble sian lirikismon li uzis en neforgeseblaj kanzonoj kies melodiojn li do ofte dividis kun kompetentaj aranĝistoj.

poeto, Vinícius de Moraes

Preterpasantino

L' inon pasantan mi volas, Di',
 ŝia dorsbril' 'stas kamp' el lili',
 ŝiahare sep koloroj kuŝas,
 al ŝi sep esperoj friskĉebuŝas!
 Kiom vi belas, pasanta in'
 min torture tra mia pasi',
 kaj tage kaj nokte, ve al mi!
 Ĉe vi la sentoj 'stas poezi',
 viaj ĉagrenoj melankoli',
 bona herbejo freŝa kaj mola,
 la vil' de vi.
 Viaj du brakoj 'stas dolĉaj cignoj
 sen zorg' la bruon de l' vent' en kri'.
 L' inon pasantan mi volas, Di'!
 Vin preterpasan adoras mi,
 ja vin, in' kiu satigas min
 ĉiumomente sen ŝajna fin'!
 De mi serĉata vi kvazaŭmite
 min simplignoras ĉi-viarite,
 via senspur' kiam ajn vi venas
 ĉe vi katenas ja plue min.

Tamen revenu ino pasanta!
Ĉar sen vi mankas al mi sentivo!
Vi tuj revenu al mia vivo
kiel motivo la plej konstanta!
Tuj vi revenu al mia vivo,
ne plu min voru ĉi dolor' lanta !
L' inon pasantan mi volas, Di'!
Al mi ĉu pluo de korenuo
min distancigu tiom de ŝi!?
Je l' sankta nomo de ĉi torturo,
Di', mi sub ĵuro, diru ne ĉesas
ĉi agonio, mi ne forgesas
ŝin, vin mi amu ĝis la fin', in'.
Pasantin' resta, tutnetempesta,
jen vi plenpaca sed ve, sengraca,
jam vi foresta iĝas, floseska,
in' en disfumo, senradikkreska.



tradukis **Wington Rocha** (Brazilo)

Qu Yuan (340-278 a.K)



Demandado al la Ĉielo

Elĉinigis Vejdo

Kiu povus diri al ni, kiel
statis la ĉielo kaj la tero,
kian formon ili prenis vere
antaŭ longa tempo de pelmelo?

Lumo kaj mallum' miksiĝis kune,
kiu povus vidi ilin klare?
Brilas tago kaj obskuras nokto,
kiel tio venas ja reale?

Cedas lum' al nigro kaj inverse,
kiel tio aranĝitas vere?
Kreskas mil estaĵoj en kaoso,
kiel tio ja ekestas ŝtele?

Kiu ja mezuris la altecon
de l' blua ĉiel' kun naŭ tavoloj?
Kiu konstruigis tian vorkon
eke per grandskalaj la laboroj?

Kia ŝnuro povas ligi l' volbon?
Kien sin etendas la ĉielo?
Kie ok kolonoj ĝin subtenas?

Kial sinkas sudeosta tero?

Kiel la Naŭ Sferoj dividiĝas
kaj interligiĝas ja perfekte?
Kiu scias, kiom da anguloj
kaj kunjuntaj nombroj kvardirekte?

Kie tuŝas la ĉiel' la teron?
Kiel vicas dekdu horoj orde?
Kiel sun' kaj luno pendas alte
kaj la steloj sidas ja akorde?

Se la sun' leviĝas el Lumvalo
kaj jen sinkas ĉe la Meng-rivero.
Kiom longe ĝi iradas tute
de aŭrora horo ĝis vespero?

Kian povon Luno havas vere
vivi kaj formorti ĉiam ronde?
Kian avantaĝon ĝi posedas
kun leporon en si, ho, volonte?

Fein-stelo ne edziniĝis,
kial ŝi naŭ filojn havas vere?
Kie trovas sin Vent-stelo kaŝe?
De kie blovas zefir' tenere?

Kiu pord' enlasas lumon enen?
Kiu pordo kaŝas lumon certe?
Antaŭ ol ekbrilas l' oriento,
kie l' Suno kaŝas sin inerte?

Gun ne taŭgas por jungi akvon,
kial elektitas li por tio?
“Ĉar neniu zorgas pri akv-jungo,
kial li ekagu kun racio?”

Birdoj kaj testudoj helpis al li,

kial tian helpon li meritis?
Tuj ĉe sukcesado de l' afero
kial puni l' Lordo lin decidis?

Kial retenitis li sur la Yu-monto
kaj tri jarojn vivis sen libero?
Li laŭdire generis la filon,
ĉu ĝi 'stas stranga afero?

Filo Yu (*ju*) daŭrigis lian vorkon,
kaj sukcesis en la entrepreno.
Kial lia patro falis kaj li
staris per malsama far' sen ĝeno?

Kiel Yu inundon bridis bone,
la profundan kaj ferocan vere?
Kiel li dividis l' agron norme
laŭ fekund' kaj magro naŭ-nivele?

Kiel Drak' desegnis teron veste
ke riveroj fluu al la maro?
Kion do Gun faris en akv-jungo?
Kiel venkis Yu en inund-baro?

Kiel Gonggong skuis monton forte,
ke oblikvis sud-eosta tero?
Kiel naŭ landpartoj sidis orde?
Kiel akvoj fluu kun modero?

Kial la riveroj fluas maren,
sed la mar' neniam ŝvelas plene?
Kiu do pli longas, kiu kurtas
el la kvardirektaj partoj ene?

Inter sud' kaj nord' ovalas tero,
kiom mezuriĝas la tereno?
Kie situus sur Kunlun-monto
la raviga, bela Fe-Ĝardeno?

Havas la ĝarden' naŭoblajn murojn,
kiom altas l' muroj kun impono?
Tra kvar pordoj ĉirkaŭ la monto
rajtus vole pasi kiuj homoj?

Du pordegoj nord-uestaj faŭkas,
Kia vent' tra ili blovas gire?
Sun' prilumi ĉien povas certe,
kial la Fajr-Drako lumas brile?

Antaŭ ol Sun-di' radiojn jetas,
kial lumas floroj de fabelo?
Kie ĉiam varmas en la vintro?
Kie ĉiam frostas en somero?

Kie trovas sin la ŝtonaj arboj?
Kiu bestoj povas ja paroli?
Kie estas drakoj ja sen kornoj,
kiu urson dorsportas sen foli?

Kie trovas sin stranga serpento
naŭkapa kaj facila en movoj?
Kie trovas sin senmorta lando?
Ĉu longvivuloj kun magi-povoj?

Kie trovas sin naŭ-branĉaj lemnoj?
Kie la kanabo floras bele?
Kiom longas korpo de l' serpento
kiu voras elefanton vere?

Kie sidas Nigra Roj' tinktura?
Kie staras Mont' de Tri Danĝeroj?
Se la longvivuloj ja ne mortus,
kiom ili daŭrus kun espero?

Kie vivas karp' kun hom-vizaĝo?
Kie nestas best' kun stranga kapo?

Kiel paffaligis Yi naŭ sunojn?
Kiel mortis sun-korv' sen eskapo?

Post inund-jungado Yu inspektis
la hom-mondon kun plagita tero,
kie li akiris belulinon
kaj amoris kun ŝi en arb-sfero?

Ĉar Yu jam amoris kun ŝi ame
kaj generis filon kun kontento,
kial li forlasis filon post li
nur por am-plezuro dum momento?

Qi (*ĉi*) provis uzurpi l' tronon de Yi (*ji*),
sed lin trafis puno en karceron.
Kial li finfine ja eskapis,
antaŭ ol li mortos en sufero?

Ĉiuj pafis lin per akraj sagoj,
sed li ne vundiĝis ja sekure.
Kial Yi 'stis renversita, dume
idoj de Yu multas senmezure?

De l' Ĉielo petis Qi favoron,
li akiris naŭ ĉielajn kantojn.
Kial lia filo ja mortigis
lian panjon jen kun eleganto?

Dio sendis sob Yi, l' arkpafiston,
por Xia (*ŝja*)-plebon vivantan suferi.
Kial li mortigis River-Dion,
kaptis lian edzinon prefero?

Yi tre lertis ja en arkpafado,
li apregojn ĉasis, pafis cele.
Kial lia viandoferaĵo
al Ĉiel' ne plaĉis tiom bele?

Perfidul' edzinon lian logis
kaj por lin mortigi jen komplotis.
Kial Yi kapabla pafi lerte
sub kunag' ilia triste mortis?

Ekzilitis Gun al okcidento,
kiel grimpi montojn kun facilo?
Li turniĝis do en brunan urson,
ĉu li reviviĝos kun trankvilo?

Gun instruis semi nigr-miliojn,
sarki la herbaĉojn por kultivo.
Ĉu li vere krimis ĝis ekstremo
kaj jam ekzilitis por viv-drivo?

Kial Chang'e (*ĉang'e*), lun-fein' vestitas
per pompanta ĉielarka vesto?
Kie ŝi akiris eliksiron
la senmortan ĉiam por ekzisto?

La Ĉielaj leĝoj neŝanĝeblas:
mort' ekestas se ja mankas lumo.
Kial l' Ora Korvo longe kriis,
kiam li foriris de la suno?

Kiel vokas pluvon Di' laŭplaĉe
kaj ĝi falas laŭ lia ordono?
Kiel la Vent-dio kun cerv-kapo
jen kunagas al lia bezono?

Testudeg' portanta montojn naĝus,
kiel montoj restus ja stabilaj?
La Giganto iris sur la tero,
kiel li hokfiŝis kun espero?

Kian peton Ao (*ao*) ĉe l'bofrantino
kiam li vizitis por amoro?
Kial senkapiĝis li tragike

de l'êcasisto en venĝa doloro?

Lia fratino kudris hejme,
dormis li kun ŝi en sama lito.
Kial ŝian kapon li dehakis
pro eraro sed ja sen hezito?

Kiel ellaboris planon grandan
Ao por fortikiĝi por batalo?
Kian manieron li ja uzis
ekrenversi l' ŝipon de l' rivalo?

Kion Reĝo Jie (*ĝje*) akiris kiam
li atakis Regnon Meng impete?
Kial lia edzino frivolis?
Ekzilitis ŝi de Tang dekrete.

Kial patro de Shun (*ŝun*) lasis tiun
vivi tute sola kiel fraŭlo?
Kial ne informis Yao (*jaŭ*) la patron,
ke Shun prenis al si princin-paron?

Kiu povus antaŭdiri l'onton
jen pri la afero dekomence,
ke l' dek-etaĝa jadturo signas
ke Shang (*ŝang*) putros klare dekadence?

Kiam la prareĝoj surtroniĝis,
kiuj ilin traktis kun adoro?
Nüwa (*njuva*), kreintin'en formo strangas,
kiu do ŝin kreis kun favoro?

Reĝ' Shun obeis al sia frato,
tiu tamen haton al li kovis.
Kial tiu hund' tiranis ĉiam
kaj Shun lin eskapi vere povis?

La antikva regno Wu (*vu*) jam daŭris

longan tempon en stabila stato.
Kiu povus ja klarigi tion,
ĉu du saĝaj princoj regis ŝtaton?

La cignaĵo en jadvaz' sendita
plaĉis al Tang de Shang (*ŝang*) kun frandemo.
Kiel li akceptis la senditon
kaj renversis Reĝon Jie sen peno?

Kiel Lordo Tang dum inspektado
diktis al ministro saĝa planon,
ke Reĝo Jie (*ĝje*) pune ekzilitis
kaj la plebo dronis en ĝoj-bano?

Kiel belulin' sur alta turo
eĉ akiris reĝan la favoron?
Kiel ŝi hirundan ovon manĝis,
gravediĝis por reĝa sinjoro?

Hai (*haj*), la inda filo de Reĝo Qi,
prenis sian patron por modelo.
Kial deĝnis paŝti li senpune
bovojn, ŝafojn vage sur step-tero?

Kiel lia danc' kun ŝild' allogis
la reĝinon kun vizaĝ' ĉarmplena?
Kiaj manĝaĵoj, trinkaĵoj igis
ŝian korpon svelta kaj sirena?

Kiel ilin en geiĝ' trovinte,
glavis ilin la paŝtist' en lito?
Kiel ili savis sian kapon
kaj eskapis vere sen hezito?

Kiel Heng, kun patraj virtoj, gajnis
bovojn, ŝafojn jen el lia frato?
Kial li por ĉasi rangon, riĉon,
ne revenis en la fora ŝtato?

Wei, sekvante l' spuron (*vej*) de l' patro Hai,
metis sian landon en malpacon.
Kial li diboĉis kun virino
en arbaro kvazaŭ en palaco?

Lia frato voluptemis troe
kaj diboĉis li kun flirtulinoj.
Kial en malvirta familio
posteuloj multas en legio?

Dum inspekto sia al easto,
Tang atingis Youshen (*jouŝen*) ĉe la limo.
Volis li akiris ja lakeon,
sed kiel li gajnis belulinon?

Beb' en morusarbo ĉe rivero
de knabin' trovitas jen en koto.
Kial ĝin regnestro abomenas
kaj ĝin sendis kiel ŝian doton?

Tang jen liberiĝis el karcerio:
kian krimon faris li al Lordo?
Li renversis Lordon pro kolero,
kiu lin instiĝis al ribelo?

Kiel la feŭduloj povis kune
kolektiĝi laŭ fiksita dato?
Kiu ilin al batal' komandis
Xia-n revversi en kaduka stato?

Fa dividis la kadavron de Zhou (*ĝouŭ*),
sed Dan malaprobis sen konsento.
Kial tiu helpis Fa-n starigi
la reĝlandon, sed kun trista sento?

Kiel la Ĉiel' konfidis al Yin (*jin*)
regi super ja la tuta tero?

Surtronigon sekvis tuj pereu,
kian kulpon faris ĝi en vero?

Kiel Reĝ' Wu (*vu*) fondis la armeon
el feŭdlandoj kun potenca forto?
Kiel li komandis la armeon
bati l' malamikon ĝis malordo?

Reĝ' Zhao (*ĝaŭ*) inspektis en militĉaro
kaj li haltis ĉe Chu (*ĉu*) en la sudo.
Kiajn bonojn li akiris el ĝi
krom fazanon blankan en apudo?

Reĝo Mu tre ŝatis ĉevalrajdon,
kial li vojaĝis tra la lando,
forlasante sian spuron ĉie?
Kion li serĉadis kun demando?

Kion kriis plengorĝe edzo
kaj edzino kune sur la strato?
Kiun Reĝo You mortigis fine?
Kie gajnis Baosi (*baŭsi*) li laŭ ŝato?

La Ĉielo kapricas laŭvole,
ĝi punas aŭ benas laŭ bontrovo.
Kiel Duko Huan (*hŭan*) naŭ fojojn strebis,
sed mortaĉis malgraŭ lia povo?

Kiu Reĝon Zhou de Shang kondukis
al tirana kaj kruela stato?
Kiel li ne kredis bonajn vortojn,
sed la mavajn klaĉojn kontraŭ l' ŝtato?

Kial lojalulo Bi Gan estis
kondamnita al eltir' de koro?
Kial Lei Kai (*lej kaj*), l' flatemulo estis
rekompencita per rang-honoro?

Kial saĝuloj kun sama virto
trafas la malsaman vivan sorton?
Kial Grafo Mei (*mej*) hakitas pece,
Jizi (*ĝizi*) ja simulis mens-distordon?

Ji (*ĝi*) 'stis unuenaskit' de Reĝ' Ku,
kial tiu ĝin malamamis vere?
Kial forlasitas ĝi sur neĝo,
birdoj ĝin varmigis ja prefere?

Plenkreskinte, Ji kapablis pafi
kaj talentis en agra kultivo.
Jam naskiĝo lia l' reĝon miris,
kial nask-prosperis lia vivo?

Duko Chang (*ĉang*) ĉe dekadenco de Yin (*jin*)
jam fariĝis ŝafpaŝtist' libere.
Kiel li forigis templojn ĉe Qi
kaj ekregis super ter' tutsfere?

Plebo translokis sin al Monto Qi,
kiel obeigi l' plebon bone?
Reĝ' Zhou jam sorĉitas de sireno,
kiel lin konvinki deadmone?

Reĝo Zhou hakigis filon pece,
Duk' Chang lin denunciis al Ĉielo.
Zhou punitas severe de l' Dio,
kial Shang pereis en danĝero?

Kiel Chang rekonis en buĉisto
grandan talentulon kun facilo?
Kial li, la onta reĝo ĝojis,
dum li aŭdis sonojn de rapiro?

Kial post mortigo de Reĝ' Zhou,
Reĝ' Wu ekflamis arde kun kolero?
Kial en funebro pri la patro

li urĝeme iris por konkero?

Kial do la lasta reĝo de Shang
sin pendigis ja sur la cipreso?
Tio skuis teron kaj ĉielon,
kiu povus timi ĝis eksceso?

La Ĉielo sendis la edikton,
kial reĝoj agis sen diskreto?
Kial ilin anstataŭis certe
la aliaj reĝoj jam en preto?

Dekomence Yi Yin (*ji jin*) nur ĉe Reĝ' Tang
servis, iĝis ĉefministro poste.
Kial ĝuis li honoron grandan
en la templ' de Reĝo Tang postmorte?

He Lu, estis nep' de Reĝo Shoumeng (*soŭmeng*),
juna, li vagadis en sufero.
Kial li plenkreska staris brave
kaj li famon ĝuis en landsfero?

Fazan-sup' de Peng Keng kuirita
plaĉis al Reĝo Yao ja plezure.
Peng longvivon ĝuis je mil jaroj,
kial kaŝe larmis li skrupule?

La feŭdestroj kune regis landon,
kial Reĝo Li jen brulis de kolero?
Kiel la formikoj, se amase,
kune donas forton de l' ĉielo?

Primokate de virinoj, kial
princoj du ne plukis plu vicion?
Kial ili iris norden vivi
la ermitan vivon sen anksio?

Duko Jing ferocan hundon bredis,

kial lia frato ĝin avide
volis ŝanĝi por cent militĉaroj?
Kion celis lia frat' inside?

Tondris en fulmado ĉe l' vespero,
kio ĝenas min en hejmeniro?
La prestiĝo ŝtata jam perdiĝis,
kiel taŭgas preĝa la deziro?

Jam kaŝanta sin en montkaverno,
kion Reĝ' aspiris pri la ŝtato?
Chu asiston petis por batalo,
kiel do ĝi daŭros sub sortbato?

Se la reĝ' sin jam korektus vere,
kion povus mi admoni al li?
Jam la regno Wu superis nin mem,
kiel ni persistus do ne fali?

Kial Zi Wen (*ziven*) naskiĝis surkampe
pro adulto de la reĝ' kun ino?
Kial diris mi al Xiong Yun (*ŝjong jun*) kaŝe,
ke Chu tuj pereos laŭ destino,
kaj ke l' stultan reĝon ja mortigu
kaj lin anstataŭu por domino?



Ljubov Serduniĉ



poetino Ljubov Serduniĉ

Ljubov Serduniĉ estas nuntempa ukraina verkistino, poetino, esploristino de popola kulturo. Ŝiaj verkoj estas publikigitaj en revuoj kaj gazetoj en Ukrainio kaj eksterlande (tradukitaj al la angla, franca, belorusa kaj rusa lingvoj). Gajninto kaj laŭreato de multaj literaturaj konkursoj kaj premioj. La aŭtoro de 26 libroj de diversaj ĝenroj por infanoj kaj plenkreskuloj.

Ni brodadas historion de l' nacio

Ukraina brodaĵo estas genetika kodo de la popolo saĝeco de generacioj, simbola mesaĝo de pragepatroj al la estonteco.

Pentras vigle bluon de l' ĉiel'
 Fadeneto tra generacioj -
 Triston, ĝojon kun viburna bel' -
 Ni brodadas historion de l' nacio.
 Rakontadas la brodaĵ' pri ni,
 Pri feliĉo kaj malharmonio.
 Tial do diverse kun pasi'
 Ni brodadas historion de l' nacio.
 Tio estas al futur' mesaĝ',
 Donacego el pase' eterna.
 Kaj kreiĝas per la kod' brodaĵ',
 Kaj brodiĝas per simboloj viv' moderna.



tradukis Petro Palivoda
 (Ukrainio)

KLUBO KARAPACO – LIBROJ

<https://cezartradukoj.blogspot.com/.../karapaco-libroj...>

KARAPACO-LIBROJ AĈETEBLAJ

Plej nova!

EDUARD PETIŜKA

MALNOVAJ GREKAJ MITOJ

Rete vendebla ĉe Bod <https://buchshop.bod.de/malnovaj-grekaj-mitoj-eduard-petishka-9783758363580>

Rete vendebla ĉe Amazon <https://www.amazon.de/MALNOVAJ-GREKAJ-MITTOJ-EDUARD-PETISHKA/dp/3758363586>

Nova!

F. KAFKA

LA PROCESO

La romanon tradukis Dorothea kaj Hans-Georg Kaiser
lasta tradukversio: 6-a de junio en la jaro 2023,

laŭ la originalo "Der Prozess"

aranĝis Frank Vohla ,

lingve kontrolis Vladimir Türk

Paperlibro, 306 paĝoj,

eldonejo BoD "Books on demand",

aperdato: 16.06.2023,

Lingvo: Esperanto

Bookshop BoD [<https://www.bod.de/buchshop/la-proceso-f-kafka-978375781355>

amazon (paperlibro)

Prezo: 14,99 €

La e-libro kostas 4,99 €

ISBN-13: 9783757842345

Valbona R. Hadri



Vivas kaj laboras en Prishtina.

La elementan kaj mezlernejan edukiĝon ŝi ricevis en Ferizaj. En la universitato de Prishtina Valbona studis pri la beletra kaj albana lingvo, poste magistriĝis pri Internaciaj Aferoj same en Prishtina. Valbona instruis ekde la jaro 1994 kaj tutan tempon sin okupis ankaŭ per seminarioj kaj sciencaj konferencoj surkampe de edukado. Aktuale ŝi estas inspektisto ĉe la Ministrejo pri Edukado, Scienco, Teknologio kaj Inovacio. Ŝi

komencis verki ekde la elementa lernejo. Lastajn jarojn Valbona eldonis tri libroj kun poeziaĵoj, akirante kelkajn premiojn.

La elmigrinto

Mi ploris dum la tuta mia vivo
 Mi kaŝis min ĉe anguloj
 Ĝemante pro la sopira doloro
 Serĉante vian amon,
 Jen tien, jen ĉi tien.
 Mi serĉadis la hejman korton
 Por ekĝui la sunradian guton
 Je la memoro pri la infanaĝo
 Mankis al mi tiuj stratetoj,
 Jam ŝanĝiĝintaj
 Kaj tiuj vidaĵoj kiam
 Mi forte tenis min per via mano,
 Levante ofte la rigardon
 Serĉante vian prezenton.
 Mi tuŝis la vizaĝajn liniojn
 Kie la larmoj lasis siajn spurojn
 Fojfoje mi trafolumis la historiajn paĝoj
 Por rapidkuri en la trovado de mirindaj vidaĵoj
 De naskiĝloko, por enspiri iom libere

Per larmoj mi estingis la sopiron por via voĉo,
Vekinta dum la printempaj someraj matenoj
Kaj restadon ĉe la mondorando

Iam

Via voĉo vekis zorgeme
Fariĝante sorĉa kanto por mi
Iam
La matena roso brilis en miaj okuloj
Per paradiza lumo
Iam
Kun, duonmalfermitaj okuloj, mi sentis
La mildecon de via kareso
Iĝante unu kun la pasio de arda amo

La revanto

Dum jaroj li kaŝis
La falsan sentimenton, ŝajniĝis anĝelo
Fojfoje vomis venenon kaj galon
Sed tamen oni komprenis
Dank' al nur unu diro,
Unu skribita vorto,
Unu dismetita pentraĵo
Fermokule li flustris silente la malbenon
Ĉar ricevis donacon de majestulo
La benon por esti homo.
Seklipulo fariĝis cindro ankaŭ ene de sia animo
Li ne scipovis aprezi almenaŭ unu pacan vorton.

Senvorte

Min forkaptas la belecoj
La bluecoj de ĉi tiu ondo
La pura larmo de la ĝojo
Plenigas miajn okulojn per kristaloj.

La blanka ŝaumo karesas la ŝtonojn
Kunfrapas la korpon malpeze sur sablo
La suno, la maro kaj la lasta radio
Fariĝis do el arĝento.
La lasta radio iras malantaŭ la monton
La vespero venas haste
La sunsubiro revivigas tiom da revoj
Kaj tiom da kantoj en mia animo.
Gustas mi la vesperan kafon
La ardan sunon enflamiĝinta

Ĉu vi diras

Ĉu mi ne plu aŭdos viajn korbatojn?
Ĉu via voĉo mankos dum la matenoj,
kiam la vintro iĝas somero?
Ĉu vi ne revenos,
Almenaŭ unu fojon, je mia favoro?
Ne diru ke vi ne atendos la rakontofinon
komencitan iam, ie..?
Vi promesis ke ni kunvojaĝos
kun flirtado de la flago en la tuta ardana tero.
Dum vi volas perdiĝi ne gustumante
ankoraŭ unu glason da vino?!
Ne faru tion mi petas,...ne faru,...!!!



elalbanuigis

Bardhyl Selimi (Albanio)

Ding Xilin (1893-1974)



aŭtoro, Ding Xilin

Post drinkado

Ding Xilin, ĉinaj famaj modernaj dramaturgo, fizikisto kaj soci-aktivulo (elĉinigis Gu Zi)

unuakta komedio

Ĉi tiu unuakta dramo naskiĝis el la novelo verkita de mia amiko Shuhua. Leginte ĝin en la ĵurnalo, mi trovis ĝin nove originala en signifo kaj taŭga en intrigo por adaptiĝi al unuakta dramo. Kaj miaj du amikoj, kiuj legis ĝin samtempe, ankaŭ aprobis mian penson kaj kuraĝigis min verki prian dramon. Sub la inspiro de la novelo kaj instigo de la du amikoj mi produktis ĉi tiun drameton. Nun samtempe kiam mi esprimas mian dankon al ili, mi faras klarigon al la legantoj. Se tiuj havas laŭdojn pri la signifo kaj intrigo, tiuj laŭdoj devas esti donitaj al la aŭtoro de la novelo; se ili havas malkontentojn pri la esprimivo en la dramo kaj la priskribado de la personoj de la dramo, tiuj malkontentoj devas esti atribuitaj al tiuj du amikoj de mi, ĉar ili volis, ke mi verku ĉi tiun dramon!

Personoj:

Edzo (*Yintang*),

Edzino (*Yimin*)

Gasto (*Zhiqing*)

Sceno: Profunda nokto de vintro. Luksa salono. Gasto, kiu ebriiĝas post drinkado, dormas sur kanapo. Viro, apenaŭ tridek-jara, senŝeligas frukton ĉe la tablo, sur kiu, krom pleto de fruktoj, kuŝas tekruĉo, tetaso kaj akvoboliganta forneto kun brulanta fajro. Regas kvieto kaj trankvilo en la salono, krom siblado el la tekruĉo. Post ĉirkaŭ duonminuto eniras junulino kun botelo de tefolioj en unu mano kaj litkovrilo en la

alia. Unue ŝi demetas la litkovrilon sur la seĝo apud la viro kaj poste iras al la tablo kun la botelo de tefolioj en la mano.

Edzino: Mi alportas ĝin. Kovru lin per ĝi.

Edzo (*okupiĝas pri manĝado de frukto kaj volas embarasi ŝin*): Bone, kovru lin. Vi faras tion pli bone ol mi. (*Dirinte, li jetas ekrigardon al ŝi.*)

Edzino (*ankaŭ jetas ekrigardon al li kaj demetas la tekruĉon*): Ĉu vi pensas, ke mi ne kuraĝas fari tion? Ne vidu tion stranga. Mi faru tion do. (*Ekpreninte la litkovrilon, ŝi senbrue iras kovri la gaston per la litkovrilo.*)

Edzo: La akvo bolas. (*Edzino alvenas. Ŝi lavas la malplenan kruĉon kaj verŝas la lavitan akvon en la sputujon.*)

Edzo: Leviĝu, ho, Zhiqing. Leviĝu por trinki teon, kaj poste dormu.

Edzino: Jen, ne veku lin, por ke li dormu pli da tempo. (*metas tefoliojn en kruĉon, verŝas akvon, estingas la fajron kaj metas kovrilon sur la kruĉon.*)

Edzo (*faras kelkajn englutojn de frukto*): Ve, se mi ne vekus lin, supozeble li ne vekigus tra ĉi nokto. Ĉu mi atendus lin ĝis morgaŭ?

Edzino: Vi jam manĝis tiel multe. Ĉu vi povus endormiĝi? Eĉ se vi povas endormiĝi, vi havas malkomfortan dormon.

Edzo: Ne tre juste por mi. Vi lasas al li dormi komferte tie, dum mi atendas lin en mizero.

Edzino: Li jam estas ebria, sed vi ne. Vi kaj kelkaj aliaj drinkadis rivale kontraŭ li sola...

Edzo (*ĝustigas ŝin*): Kontraŭ vi du.

Edzino: Kontraŭ ni du? Mi trinkis nur duonbotelo da alkoholaĵo. Nun mi sentas rapidan korbataĉon. (*sidiĝas en la sofo.*)

Edzo: Vi ne drinkis, sed vi pledis por li.

Edzino: Mi ne devus pledi por li, ĉu?

Edzo (*finmanĝis la frukton, viŝpurigis manojn kaj sidiĝis en la sofo*): Jes, vi devas, devas. Sed lasu min kuŝiĝi momenton. Ĉu jes? (*kuŝigis sin en ŝian sinon.*)

Edzino: Ĉu tiel fari estas juste?

Edzo: Do?

Edzino: Li kuŝas sur la kanapo, dum vi...en la sino de virino.

Edzo: Tio estas tre justa. Ĉar li jam ebriiĝas kaj eble sputas elvomaĵon, kiu malpurigus vian veston, do li ne povas dormi en via sino. Mi ... ne drinkis ĝis ebrieco.

Edzino: Ho, kia odoraĉo de alkoholaĵo! Moviĝu flanken. (*forpuŝas lin kaj donis al li talikusenon de post sia dorso. Li prenas la kusenon kaj ankaŭ de sur la alia seĝo transdonis la kusenon al ŝi.*) Dankon, ankaŭ mi sentas komfortecon eĉ sen ĝi.

Edzo (*prenas du kusenon kaj elpoŝigas paketon da cigaredoj*): Ĉu mi povus fumi?

Edzino: Ne, neniel!

Edzo (*eligas suspiron*): Ve, ĉio via estas bona, sed ĉi tio estis la nura manko en via perfekteco.

Edzino: Ha, estas tre multaj mankoj: la ĉambro ne komfortas, la manĝaĵoj ne bongustas, kaj la edzino ne belas...

Edzo: Ne montru vin tiel fieraca!

Edzino: Kiu fieracas?

Edzo: Jen vi!

Edzino: Ĉu mi ja fieracas?

Edzo: Ĉu vi opinias, ke tiu, kiu fieracas, certe fanfaronas? Nur kiam mankas al li memfido, li fanfaronas, kaj kiam li sin montras memmodesta, li plejeble sin tenas tromemfida.

Edzino: Mi tute ne estas tromemfida. Mi mem scias, ke mi ne faris ĉion bone. Sed vi devas helpi min.

Edzo (*malvigle*): Ho, Yimin...

Edzino: Ve.

Edzo: Mi ofte pensas, ke la homoj, kia mi, povas ĝui tian feliĉon kaj mi nur dankas Dion, sen ajna aroga deziro. Tamen unu aferon, kiam mi mortos, mi metos en mian testamenton.

Edzino: Kian aferon?

Edzo: Mi farigos unu grandan keston, plenigos ĝin per cigaredoj kaj metos ĝin en mian ĉerkon. (*Post tiuj vortoj ambaŭ eksplodis per ridoj. Kaptinte la ŝancon, li ree falas al ŝia korpo.*) Ah, mia kara, tio estas la vivo en la paradizo, tio estas la vivo en la fea palaco, tamen tio ankaŭ estas la vivo por mi. Kiam la homo naskiĝis en ĉi tiu mondo, li devas vivi tian vivon... almenaŭ unu tagon... unu horon... eĉ momenton (*ekpremas ŝia manon*), ĉu mi pravas, laŭ vi?

Edzino: Yintang, mi opinias, ke ĉiuj feliĉoj estas falsaj, kaj nur la feliĉo kun amo estas la vera.

Edzo: Ha, tio estas la temo, pri kiu vi plej fieras... Nu, pardonon, parolu plu (*rektigas sian korpon*).

Edzino: Mi opinias, ke, se la homo en la mondo ekhavas amon, li povas esti konsiderata naskiĝi en la mondo, sed se mankas al li amo, li povas esti konsiderata nur vivi en la mondo.

Edzo: Do, kiel distingi inter "naskiĝi en la mondo" kaj "vivi en la mondo"?

Edzino: Se unu homo en la mondo ekhavas amon, li sin konsideras kiel homaranon. Li sentas, ke la mondo ankaŭ apartenas al li. Li esperas, ke ĉiuj havas feliĉon, kaj li sentas ĉies suferon. Tiel li povas esti konsiderata naskiĝi en la mondo. Se al unu homo mankas amo, li sentas, ke li estas nur apudrigandanto. Li estas li, dum la

mondo estas mondo mem. Li volas manĝi, ĉar sen manĝi li malsatus ĝis morto. Li volas sin vesti, ĉar sen sin vesti li frostiĝus ĝis morto. Ĉio, kion li faras, nur celas eviti morton, tial li estas nur konsiderata vivi en la mondo.

Edzo: Laŭ via difino, almenaŭ tricent kaj naŭdek milionaj kaj naŭdek centmil kaj naŭdek mil homoj el la ĉinaj kvarcent kaj kvardek milionoj da loĝantoj nur vivas tie, sed ne naskiĝis tie.

Edzino: Do mi pensas, ke se homo ne havas amon nek konas amon, li estas la plej kompatinda homo en la mondo.

Edzo: La homo, kiu ne havas amon, ankaŭ ne estas la plej kompatinda homo, nek la homo, kiu ne konas amon. La plej povrinda homo estas tiu, kiu konas amon, sed ne akiras amon, aŭ tiu, kiu jam akiras amon, sed la socio ne permesas al li ami.

Edzino: Vi aludas...(*turnas la kapon kaj ekrigardas al la gasto*) Zhiqing, ĉu ne?

Edzo: Jes.

Edzino (*silentas momenton*): Kial neniu amas lin, Yintang?

Edzo: Ĉar li jam edziĝis.

Edzino: Aĥ, edziĝis! Ĉu tio ankaŭ nomiĝas “edziĝo”? Li neniam kunloĝas kun sia edzino.

Edzo: Tio ne gravas. La ĉinaj virinoj edziniĝas, ne zorgante pri amo aŭ neamo. Origine tio estas ĝusta, ĉar ĝi estas socia sistemo, kiu estas destinita por tiuj, kiuj vivas en la mondo, sed ne por tiuj malmultaj, kiuj nur naskiĝis en la mondo.

Edzino: Laŭ via eldiro la sistemo de geedzeco devas esti rompita.

Edzo: Sed tio ne estas aprobinda. En la pasinteco homoj konsideris, ke la geedziĝo signifas amon. Tion oni jam ne toleras. Nuntempe nemalmultaj konsideras, ke negeedziĝo montras amon. Tion des malpli oni toleras.

Edzino: Do, la homoj, kia li, solecu tra la tuta vivo, ĉu?

Edzo: Ĉu vi volas, ke li edziĝu? Se vi volas, ke li edziĝu, estas facile. Donu al li iom da veneno kaj instigu lin morte veneni sian edzinon hodiaŭ, kaj morgaŭ iu edziniĝos al li. Se vi konsideras venenadon malhumana, do forpelu ŝin, aŭ akuzu ŝin pri manko de naskpovo, aŭ pretekstu, ke ŝi suferas de mensmalsano. Kvankam tiuj metodoj malsamas, la celo samas. Tio estas la regulo difinita por tiuj, kiuj ankoraŭ vivas en la mondo.

Edzino: Yintang, mi vere lin kompatas.

Edzo: Ne necesas kompati lin. Kvankam li ne akiras amon, li tamen ne nur bone vivas tie, sed ankaŭ naskiĝis tie. Ne konsideru, ke li dronas en malespero, spite al tio, ke li aspektas kvieta kaj flegma. En lia interno fajro brulas. Kvankam ni ne povas vidi la fajron, ni tamen ofte vidas la fajrerojn eljetitajn el lia korpo.

Edzino (*ekpensas pri alio*): Vi scias, ke, kiam mi komence konatiĝis kun li, mi iom timis lin.

Edzo: Kaj nun?

Edzino: Nun ni jam familiariĝas kaj mi ne plu timas lin.

Edzo: Jes, mi kredas, ke, kiam multaj virinoj komence vidas lin, ili certe timas lin. Fakte li sin montras multe tenera al la virinoj.

Edzino: Mi certis pri tio jam frue.

Edzo (*ŝajne ekpensas pri io*): Ho, mi pensas, ke li proksimas al la ideala viro, kiun vi havas en via koro.

Edzino: Kiel aspektas la ideala viro, kiun vi havas en la koro?

Edzo: Li devas havi firman volon kun tre profunda sento, kaj fidelan amon sen facilanimeco. Se li enamiĝas al iu, li neniam ŝanĝas sin. Eĉ se tiu virino, kiun li amas, ne indas sian amon, tio ja estas lia kulpo kaj li povas fari nenion alian ol sin ĵeti en la maron por memmortigo.

Edzino: Kia aspektas la ideala viro, kiun vi havas en la koro?

Edzo: La ideala viro, kiun mi havas en la koro, tute samas kiel mi!...

Edzino: Ba! (*fosas en la poŝo por la mantukon.*)

Edzo: Alie, ĉu mi povus esti tiel feliĉa?

Edzino: Ĉu vi vidis mian mantukon?

Edzino (*prenas mantukon el la alia seĝo. En ŝia cerbo naskiĝas stranga ideo. Ŝi apogas sin al la tablo, enpenseme*) Yintang, ĉu vi diris, ke ĉe la Printempa Festo vi donos al mi donacon?

Edzo: Jes, kion vi volas, ke mi donacos al vi?

Edzino: Nun mi ne volas, ke vi al mi donacos ion ajn.

Edzo: Kial? Kial vi volas, ke mi donacos ion al vi?

Edzino: Mi volas elmeti peton al vi. Mi ne scias, ĉu vi promesas al mi.

Edzo: Se nur mi povas plenumi, mi promesas al vi.

Edzino: Vi povas plenumi. Tre simpla peto.

Edzo (*leviĝas*): Kia peto?

Edzino: Promesu al mi unue kaj mi diros ĝin al vi.

Edzo: Mi promesas.

Edzino: Ĉu vere?

Edzo: Jes, vere.

Edzino: Zhiqing dormas tie. Lasu min doni kison al li.

Edzo: Kio?

Edzino: Mi donu al li kison.

Edzo (*ridaĉas*): Neeble! (*sidiĝas sur la seĝo.*)

Edzino: Kial?

Edzo: Tion... vi ne devas fari.

Edzino: Kial mi ne devas fari tion? Ĉu edziniĝinta virino ne havas liberecon esprimi sian volon? Ĉu ŝi ne rajtas montri sian admiron al alia viro?

Edzo: Nature vi havas liberecon esprimi vian volon, sed montri vian admiron... ĉu per tia maniero?

Edzino (*ree sidiĝas sur la seĝo*): Kial ne eblas por mi fari tion? Ĉu vi naskas ĵaluzon? Vi certe ne ĵaluzas, mi certas!

Edzo: Nu, ne. Mi ne tre aprobas tian manieron montri admiron. Mi ne ĵaluzas. La ĉinaj viroj ne konas ĵaluzon.

Edzino: Kaj la ĉinaj virinoj?

Edzo: La ĉinaj virinoj... samas kiel la virinoj de aliaj landoj!

Edzino: Ne ĉiuj virinoj samas. Kaj miaflanke, mi neniam konas ĵaluzon. Mi tre malŝatas, ke virino ĵaluzas!

Edzo: Ne tiom malalte taksu "ĵaluzon". Ĝi havas sian propran guston. Kiel virino, se ŝi tute ne ĵaluzas, ŝi, samkiel la viroj, kiuj tute ne drinkas vinon, sentas sin seke sengusta. Tamen troa drinkado vomigas, dum troa ĵaluzado ankaŭ vomigas. Se ŝi ĵaluzas ĝis la grado de vomigo, ŝi vekas nenian guston ĉe viroj.

Edzino: Mi kredas, ke se unu homo posedas la veran amon, li ne naskas ĵaluzan senton.

Edzo: Bone, tiu, kiu posedas la veran amon, ne ĵaluzas, kaj tiu, kiu vere ne havas amon, ankaŭ ne ĵaluzas. Do, tiu, kiu vere havas duonon da amo, vere emas ĵaluzi, ĉu ne?

Edzino: Ho, vi komprenas min. Mi volas diri, ke, nur kiam du homoj starigas plenan fidemon inter si, ili ekhavas la veran amon, kaj neniel okazas ĵaluzo.

Edzo: Mi kredas, ke vi havas plenan fidemon al mi. Nun se mi volus kisi virinon, ĉu vi konsentas?

Edzino: Mi certe konsentas.

Edzo: Ĉu vere?

Edzino: Vere. ... Sed vi devas akiri mian permeson kaj kisi antaŭ mia vizaĝo.

Edzo: Ho! Antaŭ via vizaĝo mem, al kiu mi donus kison? Ĉu tio havas ajnan signifon por mi?

Edzino: Mia peto ĝuste estas ke mi kisu viron antaŭ via vizaĝo.

Edzo: Jes ja. Tio same ne havas ajnan signifon, tial mi ne aprobas tion.

Edzino (*ne trovas decajn vortojn*): Neeble. Vi jam promesis al mi.

Edzo (*vidinte, ke ŝi vere volas fari tion*): Ĉu vi vere volas kisi lin? Se vi vere volas kisi lin, mi tuj konsentas al vi.

Edzino: Ĉu vi konsentas al mi?

Edzo (*sincere*): Mi konsentas.

Edzino: Do, mi iru! (*starigas.*)

Edzo (*tre aplombe*): Jen iru do.

Edzino (*moliĝas*): Ĉu li scios pri tio?

Edzo (*moke*): Ĉu vi volas, ke li sciu aŭ ne?

Edzino (*konsolas sin*): Ho, li ne scios pri tio.

Edzo (*ĝeneme*): Mi diru al vi iun agmanieron. Se vi ne volas, ke li scios, faru tion pli malpeze; se vi volas, ke li scios, faru tion peze. (*stariĝas*.) Nun mi foriru.

Edzino (*ekster sia atendo*): Ne foriru! Kial vi foriru?

Edzo: Strange! Kion mi faru laŭ vi?

Edzino: (*premas lin sur la seĝon*): Ne foriru. (*Ŝi faras kelkajn paŝojn kaj haltas*.) Yintang, mi iom timas.

Edzo: Ne timu. Kolektu vian kuraĝon. (*Ŝi ne iras antaŭen*.) Iru nun.

Edzino (*kolektante sian kuraĝon, firme iras al la kanapo, sur kiu kuŝas la homo. Post kelkaj paŝoj, ŝi turnas la kapon*.) Ni iru kune.

Edzo: Ho, kia sentaŭgulino! (*Ŝi faras pliajn paŝojn kaj staras heziteme*.)

Edzo (*kaŝe iras al la pordo*): Mi donas al vi absolutan liberecon. (*eliras*.)

Edzino (*retropaŝas pro timo*): Yintang, Yintang, Yintang! (*La gasto vekiĝas pro surprizo*.)

Gasto: Aĥ! (*tuj al la sida pozo*.)

Edzo (*eniras. Vidante, ke la gasto sidas, li falas en malesperon*): Ne plendu kontraŭ mi... Estas vi... (*Edzino ĵetas al sia edzo ekrigardon*.)

Gasto (*kun dormemaj okuloj, aliras al la tablo*): Kioma horo estas nun?

Edzo: Kioma horo! Kial vi ne dormas pli da tempo?

Gasto: Kial?

Edzo: Kial? Ĉar...

Edzino: Yintang!

Edzo: ... ĉar iu...

Edzino: Yintang!

Edzo: ...ĉar iu...

Edzino: Yintang, ne diru!

Edzo (*martelas la vortojn*): ...estas...volanta...

Edzino (*maltrankviliĝas. Haste aliras lin kaj kovras lian buŝon permane*): Ne diru...

Edzo (*deŝiras ŝian manon*): iri al vi... (*Lia buŝo kovriĝas denove*.)

Edzino: Ne diru! (firme kovras lian buŝon sen forlasi sian manon) Diru aŭ ne? Diru aŭ ne? (*Li lasas siajn manojn falantaj kaj ne plu baraktas*.)

Gasto (*jam konfuzemense verŝas la trian tason da teo. Tute ne rimarkinte, kio okazas en la ĉambro, alportas tason da teo al la homo, kies buŝo ankoraŭ estas kovrita*.)

Trinku teon.

(La kurteno falas.)

Rafael Henrique Zerbetto (Brazilo)



aŭtoro, Rafael Henrique Zerbetto

Komence de tiu ĉi jaro, estis eldonita de Vinilkosmo la kvina bitalbumo de ĴeLe Stacioj de l'amo. Ĝi estas la kvina el serio da bitalbumoj kompilitaj kun la kantoj kolektitaj de Lena inter 1987 kaj 2020, por ke la vasta kanzonaro de tiu ĉi duopo tre kara al la Esperanta komunumo estu pli facile alirebla de esperantistoj kaj amantoj de Esperanta muziko tra la mondo.

Stacioj de Amo: Pasia bitalbumo de ĴeLe



Stacioj de l'amo, 16-traka bitalbumo, prezentas kantojn pri amo, kaj estis plejparte registrita dum la pandemio de KOVIM-19. La delikata melodio de "Stacio de l'amo", la unua kanto, prezentas la ĉefajn trajtojn de la bitalbumo: la piano estas ludata trankvile, senhaste, akompanata de dolĉa flustra voĉo. Amon oni ĝuas malrapide kaj trankvile.

La vorto amo tuj alportas al ni rememorojn pri travivaĵoj rilataj al amo, kiel tiuj prezentataj de kantoj

kiel "Renkonto", "Pensis mi", "Diru al mi" kaj "Mirinda momento".

Amo ankaŭ alportas al ni heziton, angoron, timojn. "Amokanto" traktas pri tiu mikso da sentoj, kiuj turmentas homan koron, sed sen kiuj vivo estus vana kaj sengusta. En ĝi la fortaj notoj de piano kontrastas kun flustra kantado por tuŝi la koron de la aŭskultanto per la spirito de tiu ĉi kanto.

Tango de amoro alprenas la sensualan melodion de tango por rakonti pri volupta

amo. En tiu ĉi kanto, amo kaj amoro duope dancas, kaj ĉiu paŝo de tiu ĉi tango spicas homan vivon.

Sed amo ankaŭ alvokas familion: Lena verkis la kanton "Patrino" omaĝe al sia patrino, kiu porĉiame vivas en ŝia memoro kaj en ŝia koro. Ŝi ankaŭ verkis "Mia steleto" omaĝe al sia filino Ĵenja, kiu kun ŝi kantas en tiu ĉi albumo. Al la listo de kantoj pri familia amo mi ankaŭ aldonas "Atendas", biografia kanto pri la vivo de virino, ĉar tiu biografio estas profunde markita de familiaj rilatoj.

Ankaŭ necesas paroli pri la amo inter amikoj: la nura kanto ne komponita de Lena en tiu ĉi albumo estas "Kiam mi rigardas vin", verkita de ŝia amikino Marina Korotj. Du aliaj amikoj aliĝis al tiu ĉi albumo, Lisa Mallow ĉe la violonĉelo kaj Mike Hesche ĉe gitaro, iliaj kontribuoj aldonis belecon kaj kvaliton al kelkaj kantoj de tiu ĉi albumo.

Ankaŭ bestoj amas: Nigra Kato, kun gaja melodio, prezentas rakonton pri Stanislaŭ, bela kaj flirtema kato vivanta en vilao, kiu restis kun rompita koro post enamiĝo al katino, kiu lin ne ŝatis. Kompatinda Stanislaŭ!

Homoj ankaŭ amas liberon. "Nun liberas mi" havas gajan melodion kaj duopan kantadon. Vi ne devas tro zorgi pri tio, kion homoj diras aŭ pensas pri vi, vi estas libera por ĝui vian vivon.

"Kredu al amo" havas belan kaj kuraĝigan tekston, kio instigas nin iri antaŭen kaj ne rezigni pri la vivo. Malfacilo ja estas multaj, sed la flamo de amo brulas en niaj koroj por nin instigi persisti por realigi niajn revojn. Gravus ami aliulojn, sed oni unue devas ami sin mem.

Ankoraŭ mankas unu tre speciala speco de amo: nia amo al Esperanto! "Esperantolando" traktas ĝuste pri tiu tre speciala speco de amo, kiu kunigas ĉiujn esperantistojn!

En la retejo de Vinilkosmo vi povas senpage aŭskulti peceton de la kantoj kaj aĉeti la bitalbumeton: <https://www.vinilkosmo-mp3.com/eo/kanzono-tradicia-progresiva/%C4%B5ele/5-stacioj-de-lamo.html>

Abonantoj de Vinilkosmo-ABONKLUBO povas senpage aŭskulti la tutan katalogon de Vinilkosmo per elsendfluo. Vi povas aboni ĝin ĉe <https://www.vinilkosmo-mp3.com/eo/vinilkosmo-abonklubo.html>

El EPĈ (El Popola Ĉinio)

Zhang Yue (Ĉinio)



Esperanto – utopio en mia koro

Mia Esperanto-lernvojaĝo komenciĝis en 2018, la jaro kiam mi estis akceptita en la Esperanto-fako en Zaozhuang-a Universitato. Kia lingvo estas Esperanto? Tiu ĉi demando ĝenis min tiutempe. Tiatempe eĉ en la interreto mi ne povis trovi klaran respondon. Kun tia maltrankvila humoro, mi venis al la granda familio de Esperanto-lernado.

aŭtorino, Zhang Yue (Ĝoĵa)

Post mallonga lernoperiodo de Esperanto mi trovis, ke ni estas la generacio de studentoj, sur kiujn la instruistoj metas grandan esperon. Niaj instruistoj venas el diversaj landoj. Estas speciala Esperanto-muzeo en la universitato. Niaj studagadoj estas enviitaj de aliaj fakoj. Ni eĉ povas iri eksterlanden por partopreni en esperantaj kongresoj... Eĉ tiel, ni ankoraŭ naskis multajn dubojn: Kia lingvo estas Esperanto? Kiel vi trovos laboron estonte per ĝi? Kial vi elektis ĉi tiun fakon? ktp.. Kiam mi alfrontas tiajn demandojn, mi ĉiam ŝatas uzi la sciojn, kiujn mi lernis, por respondi ilin. Tiutempe, la plej granda parto de mia fido kaj forto venis de miaj instruistoj: profesoro Li Weilun de Pekina Lingva kaj Kultura Universitato, kiu prenis plurajn horojn da altrapida fervojo de Pekino al Zaozhuang por instrui nin ĉiusemajne; sinjoro Sun Mingxiao, la eksa direktoro de la Esperanto-Muzeo, kiu ege klopodas por la Esperanto-agado de la universitato; miaj afablaj eksterlandaj instruistoj Bak Giwan, Jian Maqi kaj Sato, kiuj sindoneme transdonis al ni la scion pri Esperanto; sinjorino Wu Juan kontribuis al nia lernvivo kaj diplomiĝo. La instruistoj priatendas, ke ni faru atingojn en Esperantujo kaj sukcesos en niaj studoj. Ili silente kontribuas al la afero de Esperanto. Tiaspeca kortuŝo kaj zorgado estas io, kion mi neniam antaŭe spertis. La zorgado de la instruistoj instigis min esti pli diligenta en miaj studoj kaj strebigis min kontribui al la disvolviĝo de la Esperanto-edukado. Tiel Esperanto fariĝis lingvo kiu donis al mi fidon kaj forton.

Mi ankoraŭ memoras, ke antaŭ ol ni iris al la Koreio, sinjoro Semio kaj profesoro Bak Giwan sendis retroŝtojn al KEA por klarigi nian situacion. Tio ege helpis nin en Koreio. En Koreio ni provizore loĝis en la hejmo de korea esperantisto. Ĉar ni

ankoraŭ estas studentoj, preskaŭ ĉiuj manĝaĵoj estis liveritaj de lokaj esperantistoj. Ni ankaŭ renkontis gestudentojn de prof. Bak, kaj ni multfoje surpriziĝis pri la influo de prof. Bak en la korea Esperanto-rondo. Ni iris al lokaj universitatoj, temploj kaj lanternaj festoj sub la gvido de lokaj esperantistoj. Tiu sperto estis unu el la plej bonaj momentoj en mia vivo. Tio estas la unika beleco, kiun Esperanto alportis al mi. Esperanto, kiun mi konas estas amika kaj helpema, kaj ĝi ne havas landlimojn. Belgoj, japanoj, koreoj kaj ĉinoj sidis sur la planko kaj parolis pri siaj spertoj en Esperantujo. Esperanto estas kiel ponto, kiu kunligas homojn el la tuta mondo. Mi esperas, ke kiam mi laboros estonte, mi ankaŭ povas provizi tian platformon por esperantistoj, por ke pli da esperantistoj povu sperti la gastamon de Ĉinio.

Estas multaj mirindaj aferoj tiaj en mia bakalaŭra studkariero, sed mi ankaŭ renkontis grandegajn defiojn en lernado de Esperanto. Lerni Esperanton ne estas tiel glata navigado kiel mi imagis. Partopreninte en la 104-a UK, mi malkovris miajn mankojn. Miaj aŭskultkapabloj kaj vortprovizoj estas malproksime de la postulo povi libere konversacii kun eŭropanoj. Malsamaj prononcutimoj igas, ke Esperanto ŝajnas surhavi malsaman vestaĵon. Eble ĉiuj opinias, ke Esperanto estas facile lernebla, sed kiam mi iris eksterlanden kaj Esperanto fariĝis vera helpplingvo, mi ekkonis, ke la prononco kaj parolrapideco de esperantistoj el la tuta mondo estas io, al kio mi bezonis alkitimiĝi kaj atenti. Antaŭ ol ĉeesti la UK mi ankoraŭ estis memkontenta, sed la realo forte embarasis min. Post pluraj tagoj de memdubo, mi reakiris mian konfidon pri lernado de Esperanto. Mi ekpensis pri mia propra Esperanto-lernado. Mi trovis, ke mia lernado estas tro supraĵa. Mi kontentiĝis nur pri la esperanta vortprovizo, gramatiko kaj ĉiutaga komunikado instruataj en la lecionoj. Mi ankoraŭ ne konis multajn Esperanto-revuojn kaj asociojn, kio malmultigis mian ŝancon komunikiĝi kun aliaj fremduloj. Mi devas ne nur koncentriĝi pri klasĉambra enhavo, sed ankaŭ aŭskulti pli alilandajn Esperanto-elsendojn kaj legi pli da esperantaj libroj kaj revuoj por plibonigi miajn kapablojn. Do post kiam mi revenis al la universitato, mi havis plian celon por mia volontula laboro en la Esperanta Muzeo, kiu estis lerni kiel eble plej multe pri la kulturaj konotacioj kaj aktualaj agadoj de Esperanto.

Kun la sperto de ĉi tiuj du eksterlandaj kongresoj de Esperanto, mi pli avidas studi Esperantan magistran studon en Pollando. Trapasinte plurajn malfacilaĵojn, mi finfine akiris la ŝancon studi en Pollando, kie mi daŭre lernis la kulturalan scion de Esperanto kaj pli profunde okupiĝis pri Esperanto-agado. Mi bonŝance renkonti alian grupon de profesiaj Esperantaj instruistoj: la eleganta profesorino Koutny, doktorino Stria, kaj la humura sinjoro Farris. Ili ne nur faras grandajn atingojn en la instruado de Esperanto, sed ili ankaŭ scipovas multajn aliajn lingvojn. Dum la leciono ni ĉiuj miras pri la erudicio de niaj instruistoj. Tiu, kiu plej admirigas min

estas profesorino Koutny. Kvankam ŝi estas pensiiĝonta, ŝi ĉiam estas plena de energio en sia klaso. En Pollando la leciono daŭras unu kaj duonan horojn, kio egalas al duoblo de la ĉina leciontempo. Por ni tia leciono jam estas tre intensa, sed por ŝi ĝi estas preskaŭ nenio. Eĉ se temas pri eta temo, profesorino Koutny povas vekti nian intereson, do ni neniam enuiĝas.

En Pollando ni ĉefe studas kursojn rilatajn al la lingvo Esperanto, Esperanto-lingvuzo, Esperanto-kulturo, interlingvistiko, lingvopolitiko kaj planado, la angla kaj informa administrado. Ni lernas pli profundajn gramatikajn sciojn kaj akiras pli bonan komprenon de la fonetiko, morfologio, pragmatiko, sintakso de Esperanto kaj la karakterizaĵoj kaj uzado de ĉiu vortspeco. Esperanto-lernado fariĝas pli profunda kaj sistema, kvazaŭ la tutaj Esperanto-kursoj de la bakalaŭra periodo estus ligitaj en serio. Ni havas ankaŭ pli da ŝancoj partopreni en Esperanto-agadoj eksterlande: Germana kongreso de Esperanto, trejnado de esperantaj instruistoj, interretaj kaj fizikaj postdiplomaj interlingvistikaj studoj ktp. La plej multaj el la eksterlandaj kongresoj estas dediĉitaj al la pli profunda disvastigo de la Esperanto-kulturo, ekz. la historio de la Esperanto-movado, la koloro-kulturaj diferencoj inter Ĉinio kaj Eŭropo, la ĝentila esprimo de Esperanto en la internacia kunteksto ktp. Per tiuj ĉi agadoj, ni povas vere ligi Esperanton, Esperanto-edukadon kaj kulturajn komunikadojn inter diversaj landoj. Esperanto helpas nin kompreni reciproke la kulturajn diferencojn kaj lingvajn trajtojn, kaj ankaŭ povas helpi klerulojn el ĉiuj vivniveloj pli bone fari komparan analizon de Esperanto kaj aliaj lingvoj. Sen bona lingva fundamento, mi ne havas kapablon digesti kaj absorbi ĉi tiun scion. Danke al mia bakalaŭra studado, kiu firmigis mian lingvan fundamenton, mi povis lerni Esperanton en Pollando kiel fiŝo en akvo. La vivo en Pollando donis al mi pli konkretan tuŝon al Esperanto. Partoprenante en diversaj esperantaj kongresoj, mi sentus, ke mi jam fariĝas grava membro de Esperantujo.

Esperanto donas al mi multe pli ol la lingvo mem. Ĝi estas pli kiel utopio en mia koro. Ĝi reprezentas esperon, egalecon, kaj amikecon trans limoj. Survoje mi havis dubojn kaj malstreĉon en la lernado de Esperanto. Sed profunde pripensante tion, kiam ajn mi renkontos malfacilaĵojn, mi pensos pri la subteno kaj helpo donitaj de la elstaraj esperantistoj. Senkonscie, ĝi fariĝis sinonimo de “beleco” en mia koro. Nun, duono de mia magistra studado jam pasis, kaj mi estas denove alfrontonta la elekton de la vivovojo. Tamen, negrave ĉu mi okupiĝas pri laboro rilata al Esperanto estonte aŭ ne, mi faros mian plejblon por transdoni tiun ĉi belecon kaj lasi pli da homoj koni ĝin.

La vojo de la vivo estas zigzaga sed la estonteco estos hela kaj prospera. Mi pensas, ke mia rakonto kun Esperanto ĵus komenciĝis...